

MIĤAIL KOROTKOV

# *Io devas okazi*



Rakontoj, fabeloj, pripensoj

**MIĤAIL KOROTKOV**

***Io devas okazi***

**Rakontoj, fabeloj, pripensoj**

**Literatura suplemento  
al  
*La Ondo de Esperanto***

**Kaliningrado  
Sezonoj  
2020**

**Miĥail Korotkov**  
**IO DEVAS OKAZI**  
**Rakontoj, fabeloj, pripensoj**

Kompostis: Miĥail Korotkov kaj Aleksander Korĵenkov.  
Redaktis kaj enpaĝigis: Aleksander Korĵenkov.  
Postparolo kaj piednotoj: Aleksander Korĵenkov.  
Provlegis: Halina Gorecka.

Sur la kovropaĝo estas uzita libera ilustraĵo (licenco CC0):  
<https://www.pexels.com/photo/background-book-cover-composing-cover-459393/>

Ĝi estas bitlibro (elektronika libro) eldonita laŭ la normoj pdf kaj epub.

Oni ne rajtas plene aŭ parte publikigi ĉi tiun tekston papere aŭ elektronike sen la permeso de la aŭtoro kaj de la redakcio de *La Ondo de Esperanto*.

**Korotkov, Miĥail Gavriloviĉ**

*Io devas okazi: Rakontoj, fabeloj, pripensoj* / Postparolo de Aleksander Korĵenkov. — Kaliningrado: Sezonoj, 2020. — 117 pagoj. — (Literatura suplemento al *La Ondo de Esperanto*, 2020).

© Korotkov M. G., 2020  
© Korĵenkov A. V., postparolo, 2020  
© Elektronika eldono. Sezonoj, 2020

# Mamutĉasisto

En minaj laboroj ĉe la urbeto Kolberi apud skeleto de mamuto estis trovita objekto de nekomprenebla destino el metalo kaj plasto. Tiu sensacio famiĝis tra ĉiuj gazetoj de la mondo, kaj kelkaj diverslandaj sciencistoj sendepende unu de la aliaj proponis hipotezon pri aliplaneda origino de la objekto. Poste la hipotezo estis refutita.

*El gazetoj*

*La 10a de aprilo.* Mi estas freneze, freneze, freneze feliĉa! Realiĝis mia revol! Edna iĝis mia edzino! Jam la kvaran tagon mi ne plu sidiĝas ĉe la pentrostablon. Por ke tiuj tagoj de sovaĝa ĝojo restu kun mi por ĉiam, mi decidis skribi la taglibron. Edna estas miraklo de la naturo, la perfekteco mem, mi deklaras tion kompetente, kiel pentristo. Sed eĉ ne tio estas ĉefa; mi kun Edna havas eksterordinaran parencecon de la animoj. Mi malkovris tion ĉe la konatiĝo. Kiam mi estis ekdeklamanta iun el miaj amataj poemoj de Walton aŭ Shakespeare, Heine aŭ Armstrong, Edna tuj daŭrigis ĝin.

Mi ne trovas, ne trovas vortojn! Nu, por hodiaŭ mi estas devigita fini. Edna preparis manĝotablon kaj vokas min. Ni trinkos nian ŝatatan vinon, legos poemojn, parolos pri pentroarto... Mi iras, iras.

*La 13a de aprilo.* Hodiaŭ, finfine, mi sidiĝis ĉe la stablon, decidis dediĉi la tutan tagon al la laboro. Edna foriris fari aĉetojn kaj viziti siajn geoldulojn. Mi, memkompreneble estis kontraŭ. Ili ne plaĉas al mi, precipe la bopatro. Ne, sendube, mia malamikeco al tiu maljuna stultulo neniom koncernas Ednan. Edna estas surtera anĝelo. Sed la maljuna babilulo, kvankam li portas la stelon de la aparteno al la Ligo de la Bonhonesto Moralo kaj ĉiel reklamas tiun ĉi apartenon, laŭ mia opinio, tamen komercaĉas en la nigra merkato. Kia indigniga hipokriteco! Kia abomena malhonoro al la Kodo de

la Ligo! Sed mi estas preskaŭ certa, ke li estas ligita kun la nigra merkato. Se ne, el kie li havas tiom freneze multan monon? Jes, li direktas ĉiujn modajn atelierojn kaj restoraciojn de la urbo, sed la ŝtato limigas la profiton de la privataj entreprenistoj. Kaj laŭ la Kodo de la Ligo ĉiujn restojn super la raciaj bezonoj endas fordoni en la publikajn fondusojn. Tiaj homoj kiel mia bopatro apartenas al la Ligo nur laŭvorte, sed fakte ĉiam pretas meti unu aŭ du milojn en sian poŝon.

Estas interese, ĉu Edna konjektas tion? Mi opinias, ke ne, tio estus por ŝi terura bato. Ŝi estas ja edukita laŭ la plej bonaj ekzemploj de la literaturo kaj de l' arto de la Humana Klerigado.

Sed mia bopatro iru al diablo! Ja Edna estas kompleta kontrasto al li, kaj nia socio plu progresas. Irante surstrate oni vidas ĉe ĉiu dua pasanto la stelon surbruste. Kaj de tag' al tago ilia nombro multiĝas.

Nu, sufiĉas, mi iras labori, krei!

*La 14a de aprilo.* Hieraŭ vespere mi kaj Edna estis ĉe limo de granda kverelo. Kompreneble – pro ŝia paĉjo. Antaŭnelonge li aĉetis tempoveturilon (tiu aĵo kostas frenezan monon – do, mia supozo pri la nigra merkato ne estas senmotiva). La lastan semajnfino la geolduloj pasigis en la 19a jarcento. Nur tio indignigis min. Ĉu tiuj homoj estas indaj pro vojaĝado tra la tempo? Ili tie ja ne studis la kulturon kaj kutimojn de la epoko. Plejŝajne li aĉetis iujn bagatelaĵojn kaj nun vendas ilin al fiamatoroj de antikvaĵoj.

Ili promesis al Edna, ke sekvafoje ili kunprenos ankaŭ nin. Iru ili al diablo! Miaopinie, tio estas senmorala – kaŝe ŝtelobservi homojn el la pasintaj epokoj. Kaj krome mia amiko Rajmondo, adepto de la skolo de la filozofia-matematika pentroarto, diris, ke tiuj vojaĝoj povas rezultigi neinvertigeblajn deformiĝojn de l' historio. Mi ne scias, ĉu Rajmondo estas prava aŭ ne, sed mi estas certa, ke kiam la tempoveturiloj iĝos vaste uzataj, oni nepre listigos koncernen punkton en la Kodon.

Edna longe ne konsentis kun mi, ni preskaŭ kverelis, sed finfine mi ŝin konvinkis kaj konsilis al ŝi malpli ofte renkontiĝi kun la patro.

*La 20a de aprilo.* Tre malagrabla tago. Min kun Edna en nia modesta loĝejo degnis viziti ŝia patro. Ni tiutempe parolis pri filozofiaj aspektoj de l' poezio de Walton, sed li venis kaj komencis pri siaj restoracioj kaj atelieroj. Idioto!

Antaŭ ĉio li klerigis nin pri la lastaj modoj en la sfero de la vestaĉoj kaj manĝaĉaro kaj emfazis artiklojn el mamutaj feloj: ĉiaspecaj peltoj, mansaketoj, pelerinoj. Kaj en restoracioj laŭmodiĝis manĝaĵoj el mamutaĵo, kaj

cetero, kaj cetero. Tiu maljunega stultulo havas ankoraŭ sufiĉe da energio por ekstermi ĉiujn mamutojn en la mondo. Malfeliĉaj animaloj. Ilin, verŝajne, atendas la sorto de l' sabrodentaj tigroj. Aperis modo, poste oni listigos ilin en la Ruĝa libro, sur kiun la ŝtelĉasistoj malkaŝe kraĉas, kaj ĉiuj ĉi peltoj kaj retikuloj moviĝos tra la nigra merkato per ankoraŭ pli forta torento.

La entrepreno de mia bopatro ege prosperas danke al tiu modo, sed malhelpas nur bagatelo – sur la tero restas ne tre multaj mamutoj. Nur la licenco por pafmortigo de mamuto kostas tri mil stelojn. Poste oni devas veturi en nordajn forstojn, elspezi kelkajn tagojn por trovi beston, kaj kiam ĝi estos mortigita, oni devas dungi fridujon. Tro grandaj estas la malprofitoj.

Sed ĉu povas tia fiaferisto, kia estas mia bopatro, ne trovi elemparasiĝon? Mamutojn oni povas akiri helpe de la tempoveturilo el la antaŭglacia epoko. Kaj sen ajna dubo li proponis okupiĝi pri tio al mi. Nature, pro bona pago. Mi ne komprenas, kiel oni povas arogantiĝi ĝis tioma grado! Kaj tian malpuran negocon proponas membro de la Ligo! Kaj al kiu? Al la homo, dediĉinta sian vivon al la servo de la alta arto. Memkompreneble, mi ĝentile rifuzis kaj enanime insultis lin per malafablaj vortoj.

La bopatro adiaŭis sufiĉe senemocie. Forirante, li apenaŭ rimarkeble, sed multsignife ridetis.

Kiam li foriris, mi en kategoria formo deklaris al Edna, ke la vizitoj de ŝia paĉjo malhelpas al mi enpenŝiĝi en la kreadon. En tiu tago mi unuafoje kverelis kun ŝi.

*La 10a de majo.* Mizeraĵ filistroj! Hodiaŭ mi volis vendi iun pentraĵon, sed – ve! Pasos, verŝajne, ne malpli ol cent jaroj antaŭ ol la tipa filistro atingos la altecon de la vera arto.

En la hejmo jam delonge forestas vino, mi kun Edna ekzistas nur per tre modesta tagmanĝo. Mi ne havas eĉ etan sumon por aĉeti tolonojn kaj farbojn. Ŝajne ankoraŭ neniam mi trovis min en tia stulta situacio.

Mi tre bedaŭras Ednan. La trajtoj de ŝia vizaĝo akriĝis, kaj sub la okuloj aperis rondoj. Ne estas eliro krom veturi ĉasi mamutojn.

*La 12a de majo.* Mi revenis de la ĉasado, ricevis de la bopatro kontentigan sumon. Mi povas pace-kviete okupiĝi pri pentrado, sed min turmentas neklarigebla konfuza maltrankvilo. Dum mia foresto io ŝanĝiĝis. Estas timige vidi la homojn: indiferentaj rigardoj, apatiaj vizaĝoj. Sed plej terure – io okazis al Edna: ekstere ŝi restas kvazaŭ sama, kiel antaŭe – miraklo de la

naturu, sed jen... Tute alia konduto al mi, sinteno, lingvo, gestoj. Ŝi asertas, ke antaŭhieraŭ antaŭ la ĉaso mi certigis ŝian patron, ke mi veturados ĉasi tri fojojn semajne. De kie tiuj novaĵoj? "Sed kiam mi pentros?" – mi demandis. "Vi desegnaĉos dum la interrompoj", – respondis Edna kaj vulgare ekridis. Ŝi diris "desegnaĉos"! Ĉio ĉi estas influo de ŝia abomena paĉjo!

Edna ne intencas ŝanĝi sian opinion. Por ke ne aperu kverelo mi konsentis ankoraŭfoje veturi al ĉasado.

*La 14a de majo.* La ĉasado estis malsukcesa. Kiam mi estis senfeliganta mamuton, pro laodoro de la sango alkuris ega aro da sabrodentaj tigroj. Mi sukcesis transporti en la veturilon ne pli ol cent kilogramojn da viando kaj pecon da felo. Mi mem apenaŭ restis viva.

Kiam mi revenis, mi elspezis nemal multe da streĉoj por retrovi mian domon. Mi ne komprenas, kio okazis, mi apenaŭ rekonas la bone konatajn lokojn. Jen la domo de mi kaj Edna, kaj la mebloj en ĝi estas preskaŭ la samaj. Preskaŭ. Nur je supraĵa rigardo. Sed se rigardi atente – ĉio estas fremda. Jen, ekzemple la kostumo. Kvazaŭ samas, bruna, sed ĝi estas sen-gusta, mi neniam aĉetus tian. Jen la pasporto en poŝo. Nu certe, tio estas mi – G. D. Montag. Naskiĝjaro... Naskiĝloko... Familia stato – *fraŭlo*.

Kion do ĉio ĉi signifas? Kie estas Edna?

Ŝajnas, ke mi febras, plej verŝajne mi kaptis infekton en *tiu* tempo. Eĉ malpli bone, mi ŝajne perdis mian gamo-desinfektilon, kiam forkuris de la tigroj.

Mi volis iri al apoteko aĉeti novan ilon, sed la monon riceviton por la unua mamuto mi ne trovis. Kunpremite la dentojn, mi iris al la bopatro. Lian domon mi ne sukcesis trovi. Sur la loko kie ĝi staris, nun estas iu sensuka skvareto.

Mi trovis lin en unu el malriĉaj restoracioj, sed... Ŝajnas ke li tute ne estas mastro ĉi tie, sed simple maljuna babilema vinĉerpisto. Li ne rekonis min, kvankam niaj rigardoj kelkfoje renkontiĝis. Ni diris al li, ke mi kunveturigis mamutaĵon kaj pecon da felo.

– Mamutaĵon? – li redemandis. – Junulo, mamutoj formortis delonge antaŭ la naskiĝo de Kristo. Ĉu vi falis de sur Luno?

(Denove io nekutima, en *mia* tempo oni diris: de sur Marso.)

– Ho jes, mamutoj! – li petoleme palpebrumis al mi. – Nu, nu! Se mi ne eraras, vi estas klaŭno, ĉu ne? Antaŭnelonge mi televidis vin...

(Diablo prenu! Ili havas televidon! Ĉe *ni* televidon jam neniu spektas, estas ja holovido.)

– Kie estas Edna? – mi demandis.  
– Kiu?  
– Via filino kaj mia edzino!  
– Mia filino? – La maljuna stultulo ekjelpis pro la plezuro. – Sinjoroj! Tiu cirkisto asertas, ke mi havas filinon! Hi, hi, hi! Jes, jes, mi ne eraris, vi estas ekzakte tiu klaŭno. – Li palpebrumis al iu staranta post mia dorso kaj fingrumis ĉe la tempio.

Tio kolerigis min ĝisfine.

– Ĉesu petoli, – mi diris, – paĉjo! Vi ja sendis min por mamuto.  
– Permesu, permesu! Dume mi vin nenien sendis. Vi mem petas tion. Ial ĉiuj ekridegis kaj mi devis foriri. Ĉu mi vere eraris, kaj tiu homo ne estas mia bopatro? La samaj bukletoj ĉirkaŭ la kalvaĵo, la sama fia mult-signifa rideto...

*La 15a de majo.* La febro ne malaperas. Mi tute ne komprenas, kien mi trafis, kaj kiel mi plu vivos. Mi traserĉis la hejmon, sed ne trovis miajn plej bonajn pentraĵojn. Sed plej malbone – mi tre svage memoras pri kio ili temis.

Mi eksciis, ke en *ĉi tiu* mondo estas multaj homoj sen mono por la ekzistado. Por tagmanĝo ili senpage ricevas teleron da supo, je kiu oni devas stari en longa vico. Kia humiligo! Ĉu mi povos alkiuti ĝi al tio?

Nenie mi vidas la signojn de la Ligo. Eble en *ĉi tiu* mondo ĝi tute ne ekzistas? Se en *nia* mondo estis danĝere vespere eliri surstraten, kio fariĝas en *ĉi tiu*?

Oni rigardas min kiel skizofreniulon, kiam mi parolas pri telebibliotekoj, holovido, iatronoj, PT-komunikiĝo kaj aliaj ĉiutagaj aĵoj. Neniu konas bone la konatajn ĉe ni poetojn, verkistojn, pentristojn. Ŝajnas, ke ĉi tie neniam ekzistis K. Walton. Sed mi kun Edna tial ŝatis lin. Kaj ŝin mi dume ne povas trovi, mi timas ke en *ĉi tiu* mondo ankaŭ ŝi ne ekzistas. Kaj tial kiun signifon havas ĉio alia?..

*Sezonoj*, 1985, №3, p. 6-10.

Korotkov M. *Homo kiu mortigis*. Sverdlovsk: Sezonoj, 1988, p. 11-15.



# Ni neniam militis

Kvaropo sidis silente sub pajla tegmento, nehaste manĝis kaj ĝuis la ripozon. Super la pampo, sunbruligita ĝis flaveco, pendis varmego neordinara por la somerfino. La tuta kvaropo viŝis per manikoj siajn ŝvitajn vizaĝojn kaj duonvoĉe sakris.

Felipe ne partoprenis en la manĝado. Eble li tute neniam manĝas, kiu scias? Kutime li jam matene estis ebrieta, tagmeze iĝis senmezure parol-ema, kaj vespere, se neniŭ forkondukis lin en la vilaĝon, li endormiĝis ĉi tie, sub la tegmento. Aliaj kamplaboristoj nur miris: de kie la homo prenas monon por la tekilo, se ĝi apenaŭ sufiĉas por pano?

Kiam la modesta tagmanĝo, konsistanta el maizaj platbulkoj kaj akvo, estis finita, ĉiuj sidiĝis pli oportune sur la pajlo kaj turnis kapojn al Jesú<sup>1</sup>.

– Legu ion interesan, Jesús...

El la tuta kvaropo nur Jesús scipovis legi. La kamplaboristoj lin estimis. Kvankam li estas scienculo, sed li neniam fanfaronas. Kaj lia vivo estas same almoza. Sed li parolas interese. Kiam li komencas klarigi, kion signifas ĉio ĉirkaŭe, ne ĉio estas komprenebla, sed ĉio interesa. La estonteco, li diras, apartenas al vi sed ne al riĉuloj, riĉuloj vivas la lastan jarcenton. Strange! Ne similas, ke sinjoro Ortega baldaŭ mortos, li havas tian kolon, ke ĝi por du homaj vivoj sufiĉos. Nur nekompreneble estas, kiel Jesús, tia scienculo, iĝis taglaboristo ĉe Ortega? Pri tio li ne emas paroli, neniam rakontis.

Jesús glatigis sur la genuoj la ĵurnalon, en kiun estis volvita la tagmanĝo. La ĵurnalo aperis antaŭ du semajnoj, sed grava estis nur tio, ke troviĝis homo, scianta legi, kaj oni povas aŭskulti interesajn historiojn pri malproksimaj landoj. Jesús jam intencis legi, sed en tiu tempo de la flanko de l' vilaĝo aŭdiĝis motora bruo. Ĉiuj kvar homoj levis la kapojn kaj fiksaŭskultis. Verŝajne la mastro de l' ranĉo veturas por kontroli la laboron. Kvankam sinjoro Ortega neniam batis iun, sed kiam li, malbenita, komencas kriegi,

---

1. Jesús. Pron.: Hesús

tio estas ne pli bona. Ne indas lin inciti, prefere oni prenu maĉetojn kaj iru nehaste labori. Ĉiuj elkuris el sub la tegmento kaj mire levis la okulojn al la ĉielo. Super ili rapide flugis arĝentaj aviadiloj. La kamplaboristoj ravite observis ilin, ĝis kiam ili iĝis apenaŭ videblaj nigraj krucetoj.

– Militaj, – certe diris Jesús, postrigardante el sub la mano la malaperintajn punktojn. – Eksterlandaj, memkompreneble, ni ne havas tiajn.

Neniu kontraŭdiris al Jesús, ne estas senco disputi kun la homo, kiu scipovas legi.

– Vere, militaj, – daŭrigis Jesús, – kaj certe ne niaj. Nun, mi aŭdis, mon-daj potencoj militas. Ne povis pace interkonsenti pri io...

– Do, ĉe ili okazas tio, kiel ĝi nomiĝas? Internacia konflikto? – Raúl plezure enigis en la paroladon sciencan vorton.

– Konflikto, – negaje ridetis Jesús. – La lasta Juĝo tie okazas, ne konflikto. Ili elpensis ian limigitan nuklean militon. Kiam unu bombon oni ĵetas – miliono da homaj vivoj for. Mi antaŭe bedaŭris, ke nia lando estas tiel malgranda, sed nun mi vidas, ke ni devas ĝoji. Tio estas nia feliĉo, ke ni ne estas monda potenco. Jen tial ni ne militas. Ni neniam militis. En ĵurnaloj oni skribas, ke por milito necesas multe da mono. Unu granda aviadilo kosta-tas tiom, ke, se ni aĉetos ĝin eksterlande, proksimume duonjaron ni devos malsati. Kaj la atoma bombo estas ankoraŭ pli multekosta.

– Duonjaron malsati! – Felipe, alfruntiginte la ĉapelon, gratis la nukon. – Sed se rigardi – nenio rigardinda. Ne pli granda ol pigo. Fju, kaj preter-flugis... Jesús, kaj ĉu vi mem estis iam en tiu eksterlando? Mi memoras, unu gajulo laboris ĉe ni, rakontis pri la eksterlando, jen Quechchi<sup>1</sup> ne perme-sos mensogi. Perlaboris, li diris, en la eksterlando grandan monon, lukse sin vestis kaj iris vespere kartludi. Unu horon aŭ malpli li ludis kaj elkuris de tie nuda kiel ĵusnaskito, ne havante ion eĉ por kovri la hontan lokon. Ie en rubejo li trovis ŝiritan pantalonon kaj tiel venis en nian ranĉon. La eksterlando onidire estas tute proksima. Li nemulte sin vestis ĉe ni – kaj denove kuris perlabori grandan monon. Ne povas la homo sidi sur unu loko! Baldaŭ verŝajne denove li alkuros kun nuda postaĵo.

– Hej, Felipe, – Raúl vokis el sub la tegmento, – vi komencis babili jam pli ol mi. – La babilema mulato Raúl laboris sur tiu kampo nur la trian tagon kaj penegis montri sin brava knabo, sed venki en parolado Felipe, kiam tiu estis ebrieta, li neniel povis. – Aha, vi, ŝajne, jam englutis. Nu,

---

1. Prononcu: Kékĉi

nenio terura estas, patro Felipe, hodiaŭ vespere ni ne lasos vin. Ni estas triopo, du homoj kondukos vin submane, kaj la tria viajn piedojn paŝigos. Ha ha ha! – Raúl estis tre kontenta, ke li sukcese enmetis la aŭditan ie ŝercon.

Felipe volis respondi ion ridindan, sed en lian kapon nenio venis, li nur mienaĉis al Raúl kaj imitis per la lipoj maldecan sonon.

Raúl ridegis, Jesús iom etridis, kaj Quecchi rigardis foren kaj estis profundiginta en siajn al neniuj konatajn pensojn. Strangulo estas tiu Quecchi. Neniu scias, de kie ĉi tie aperis tiu junulo kun vizaĝo ĉu indiana, ĉu aziana, kaj tiel neparolema, ke kiam li diris almenaŭ unu vorton, ajna parolado ĉesis kaj ĉiuj gapis lin kiel raran naturan fenomenon.

– Aŭskultu, Jesús, – Felipe komencis novan konversacion, – mi jam delonge volis demandi vin pri tio. Jen, kiam vi ankoraŭ ne laboris ĉe sinjoro Ortega, donu memoron, Dio... jes, sufiĉe delonge tio estis... Nu, pli kurte, laboris ĉe ni junulo. Laŭ la aĝo estis verŝajne kiel Raúl. Sed Raúl estas bonega knabo, kaj tiu estis, he-e... mi eĉ ne povas tuj elpensi. Pli kurte – vera fekaĵo. Li ĉiam iris rigardante ien profunden en la teron, kaj ĉiam ion balbutis sub sian nazon. Iufoje li haltis, gratis la mentonon, faltis la brovojn kaj plu iris. La tekilon li verŝis en la gorĝon kiel en senfundan barelon. Kolerega li estis kiel vera lupo, ĉiujn li rigardis elsubbrove. Sed, verdire, legoscia li estis, en tio li eĉ sinjoron Ortega superis. Li rakontis, ke ie li studis, en la ĉefurbo, ŝajne; aŭ ankoraŭ pli fore. Sed mi ne scias, pro kio oni lin pelis de tie. Li estis de fremda nacio, el iu transoceana lando... Li batadis per la pugno sian bruston kaj kriis: mi estas filo de granda popolo. Vi povus morti pro ridado. Sed mia opinio, li ĉe ni simple kaŝiĝis de la polico. Hoj, kiam li komencis rakonti – vi sentis, kiel la haroj sur la dorso hirtiĝas. Plej ofte li ŝatis pri la mondpereo. Sankta Maria! – Felipe sin krucosignis. – Mi tiel kiel li eĉ ne povas. Ne, tute ne...

– Sed kion vi volis demandi?

– Aĥ, tio estas ja la plej terura el ĉio, kion li rakontis. Mi certe tiel ne povas, mi estas ne sufiĉe legoscia. Nu... – Felipe faltis la brovojn kaj iom maĉis per la lipoj. – Similas al tio ke en la mondo nenio estas!

– Ki-o?

– Nenio, li diris, estas. Kaj la homoj, kaj la tero, kaj la ĉielo estas nur kiel ondoj sur la akvo. Dum la vento blovas, ĉio estas, kaj se la vento kvietiĝos – nenio estos. Ĉu?

Dum iom da tempo ĉiuj silentis. Kvankam neniu bone komprenis, pri

kio temas, ĉiuj ial sentis teruron. Nur Raúl ne malgajis, aŭ eble li nur ŝajnis kuraĝon.

– Nu, fantaziulo vi estas, patro Felipe! De kie tio aperas ĉe vi? Eĉ kvin minutoj ne pasas sen viaj elpenaĵoj. Kiam ĝi sukcesas kuiriĝi en via kapo?

– Eble li pravas, – mediteme eldiris Jesús. – Mi konis iam ulon; kiam li ebriiĝis, lin halucinis ratoj grandaj, kiel porko. Terure estis lin vidi. Li sin premis en angulon, nudigis la dentojn kaj svingadis la pugnojn...

– Iru al diablo kun viaj ratoj! – ofendiĝis Felipe. – Kvazaŭ mi estas finita drinkulo. Estas domaĝe, ke vi mem lin ne vidis. Mi ne scias, per kio mi devas ĵuri al vi. Veron mi diras: tiu estis monstro, ne homo. Li diris: mi revenos en mian nuvorsitaton kaj konstruos maŝinon por direkti tiun venton, tiam la tuta mondo estos sub mia piedo. Kaj tian vizaĝaĉon li faris, vi jelpus pro teruro. Jene... Baldaŭ li malaperis, eble pro la tekilo mortaĉis, eble vere reiris en la ĉefurbon. Sed oni lin ĉi tie ne plu vidis.

– Fi, ŝakalo malbenita! – ne eltenis finfine la silentulo Quecchi. – Mi tian hundaĉon per malakra tranĉilo mortigus! – Li kolerege kraĉis antaŭ siajn piedojn.

Ĉiuj turnis al li la kapojn kaj dum ioma tempo staris malferminte la buŝojn, sed Quecchi jam rigardis ien foren.

Jesús silente faltis la frunton. Malfacile estus ion kontraŭdiri al la maljunulo, nek en la gimnazio, nek en ĵurnaloj li renkontis ion similan. Sed ankaŭ kredi lin estus malfacile. Kiel do – ĉio estis kaj subite nenio estos. Nu, mortos homo, mortos ĉiuj homoj, sed kien malaperos ĉio cetera – nek la tero, nek la ĉielo estos?

Sed necesas iel savi sian aŭtoritaton, tri paroj da scivolemaj okuloj rigardas lin. Se li nun silentos, en la estonteco tiuj homoj apenaŭ kredos lin. Kaj Jesús, penante ŝajni senzorga, diris:

– Aĥ, stultulo li estas, via studento. – Poste, iom pensinte, li aldiris: – Plej verŝajne la junulo ebriiĝis ĝis la trema deliro, ĉu vi komprenas? Estas tia malsano. Kaj vi, Felipe, lertulo estas babilaĉi. Ni iru prefere sur la kampon, iom svingu la maĉetojn, aliel ni hodiaŭ eĉ por platbulkoj ne perlaboros. Drinku iom malpli, Felipe.

– Jes, estas la tempo jam, ni iru, knaboj, – ordone diris Raúl, kaj ili kvarope malgaje iris al la proksime staranta muro de maizo.

La 11a motora-infanteria regimento remarŝis jam dum kvin horoj, sed la cirkonstancaro ankoraŭ ne klariĝis. Tre malglata tereno ne permesis

veturi kun granda rapideco. Kolonelo Gomes ĉiun dekan minuton akceptis raportojn de l' esplorado pri radioaktiveco kaj markis la cirkonstancaron sur mapon. Post ĉiu nova raporto li iĝis pli malĝoja. La teoria nivelo jam delonge devis atingi sendanĝeran grandecon, sed ekster la maŝino ankoraŭ estis 20 rentgenoj en horo. La kolonelo jam kelkfoje ŝanĝis la direkton, sed la vento ĉiam ŝanĝiĝis, kaj neniu sciis de kie ĝi alportis tiun malbenitan polvon. "Eble, dum ni forkuras de unu bombo, ili ankoraŭ kelkajn eksplodigis. Diablo ilin scias," – grumblis la kolonelo. Kolonelo Gomes mem penis ne cedi al emocioj sed li sentis, kvankam li neniu vidis, ke la personaro de l' regimento tute ne estas tiel firmSPIrita, kiel li mem.

La kolonelo volis jam fari ordonon pri sekvonta manovro, sed al li adreSis sin la komunikisto:

– Sinjoro kolonelo, radiogramo...

La kolonelo sin turnis al li kaj, vidinte la palan vizaĝon kaj tremantajn manojn, malestime pensis. "Salivulo, post la unua bombo li estas preta feki en la pantalonon". Li silente elprenis el la kaseto de l' deĉifrililo formularon volvitan kiel tubeto kaj neatendite pensis: "Kaj eble ne nur tiu kaporalo, sed nia tuta armeo estas tiaj salivuloj? Nu, oficiroj ankoraŭ komprenas, ke ekzistas la honoro de l' nacio, altaj idealoj, sed soldatoj estas ja..."

– Ho diablo! – li flustris, unuafoje sentinte tiun teruron, kiu jam delonge posedis lian personaron. Li disvolvis la formularon kaj legis:

## TUTE SEKRETE

KODO 15661-K33484. ORDONO DE KOMANDANTO ATO250/13-56. SUR LA DIREKTO DE VIA RETIRIĜO UNU EL LA MILITANTAJ FLANKOJ UZIS NOVAN SEKRETAN ARMILON DE NEKONATA AGADPRINCIPO. REZULTE FORMIĜIS NUBO, KIU MALINTEGRAS ĈIUJN OBJEKTOJN, TRAFANTAJN EN ĜIN. LAŬ ANTICIPAJ INFORMOJ LA EPICENTRO TROVIĜAS EN LA KVADRATO E 12. KIEL DETERMINIS LA ESPLORADO, LA FORMIĜINTA NUBO ETENDIĜAS K NUNTEMPE OKUPAS AREON PLI OL 2000 KV KM. ĈAR VIA PLUA RETIRIĜO LAŬ LA ORDONO 250/05-55 NE EBLAS, MI ORDONAS: DAŬRIGU LA RETIRIĜON LAŬ LA DIREKTO A 113. LA ZONON "I" DE LA EKSPLODO TRAIRU KUN LA MAKSIMUMA RAPIDECO. POST LA ELIRO EL LA ZONO "IV" OKUPU POZICION POR DEFENSIVO.

Post la unua lego la kolonelo nenion komprenis; li legis la duan fojon kaj nur post la tria sentis subite, ke liaj manoj iĝis molaj kaj malobeaj. "Ĉu

antimaterio? – hazarde aperis en lia memoro termino el la kurta poroficira kurso de l' fiziko, – mal... in... – li enrigardis la ordonon, – mal-in-teg-ras... Ho, diablo, nur tion ni ankoraŭ ne vidis... Retiriĝi laŭ la azimuto 113..."

La kolonelo almetis liniilon al la mapo. "Idiotoj! – li sakris senvoĉe. – Ĉu tiuj stabaj ratoj havas kapojn? Ĝuste al la epicentro brutuloj nin sendis. Hm, kun la maksimuma rapideco!" – La kolonelo sentis, ke la haŭto sur lia kapo kuntiriĝis, sed li decidis esti firma ĝisfine. Ordonojn oni ne preparolas.

– Kaporalo, transdonu mian ordonon al la komandantoj de la batalionoj!.. – li diris post kelkaj minutoj, pene movante la subite rigidigintan langon.

Post la tagmezo la varmego ne ĉesis. Estis nek venteto, nek birda pepo. Ĉemizoj, malsekigitaj en rivereto por savado de tiu infero, rapide sekiĝis. Jesús kaj Raúl deĵetis la ĉemizojn kaj laboris nudaj ĝis la zono, Quecchi, ŝajne, tute ne suferis pro la varmego. Felipe, tute malseka pro la ŝvito, komence ridigis, kaj poste incitis aliajn per siaj nelertaj ebriaj movoj.

Pro la varmego la kapo turniĝis kaj ĉio dancis en la okuloj.

Neniu volis paroli. En la varmegoa aero pendis seka susurado de maizaj folioj, sonis frapetoj de polmoj laŭ la nudaj dorsoj kaj ŝultroj – ojstroj molestis – kaj post la frapeto sekvis nelaŭta blasfemo.

– He, Raúl, helpu la oldulon, kuru al la rivereto por la akvo, mi donos al vi botelon, – lacigite diris Felipe kaj elprenis el siaj ĉifonoj malplenan botelon.

– Lerte! – ekridis Raúl. – Vi, patro Felipe, dungiĝu en migran teatron kaj veturu tra vilaĝoj. – Li ridegis. – Vi delonge jam iĝus famulo. Eh, Felipe, vi estas perdita homo. Nu, bone, donu la botelon, mi iros. Por vi alportos, kaj mem trinkegos ĝis plena ventro. – Kaj li denove ridegis, montrinte preskaŭ ĉiujn siajn dentojn.

Li prenis jam la botelon de Felipe, sed subite el la flanko de l' vilaĝo aŭdiĝis motora bruoj.

– Jen, vere nian sinjoron la diablo portas, – blasfemis Raúl. – Prenu, Felipe, kaŝu vian botelon. Necesos atendi.

– Ne, tio ne estas motorciklo, – nelaŭte diris Jesús, fikse rigardante el sub la mano. – Tio denove estas verŝajne aviadiloj. Hm, io estas tie malbona...

La bruoj rapide laŭtiĝis. Flugis tuta svarmo da aviadiloj. La unuaj alflugis jam tute proksime, kaj el la nebulaĵo, tremanta super la horizonto,

aperis ĉiam novaj kaj novaj krucetoj. Sur la tero kuris nigraj ombroj. Felipe kuradis kaj ion kriis, gestante.

La aviadiloj flugis malalte, en kelkaj klare vidiĝis la kapoj de aviadistoj, klinitaj super aparatoj.

“De kie ili estas tiome? Kial ĝuste hodiaŭ?” – Jesús ne komprenis. Kaj subite al li venis terura supozo.

“Ĉu milito? Ĉu aliĝis al la milito nia aminda registaro? Azenoj! Vi – militi? Ne ĉiuj manĝas panon ĝissate, lernejoj forestas en duono de l’ vilaĝoj, jen Felipe iradas en ŝirita ponĉo sur la nuda korpo, ne povante aĉeti ĉemizon. Sed ili – militi! Sur nian almozan landon sufiĉos kelkaj bomboj por fari el ĝi dezerton. Fino al ĉio! Tiuj flugas bombi la ĉefurbon... Ĉu estas almenaŭ unu saĝa reganto en ĉi tiu lando forgesita de l’ Dio?”

Li kunpremis la pugnojn kaj ekjelpis en senforta kolerego.

La lastaj aviadiloj ĵus malaperis post la horizonto, kaj la homoj ankoraŭ postrigardis ilin, kiam de la flanko de l’ vilaĝo aŭdiĝis nova bruo. Ĉiuj sin turnis tien, sed la horizonton malklarigis ia malpura flava nebulo. La bruo laŭtiĝis, kaj ĉiuj komprenis, ke tio ne estas aviadiloj. Tiel bruegas la fajro dum granda incendio.

– Jesús, – apenaŭ movante la lipojn, eldiris Felipe, – kio tie bruegas? Eble tiu vento, pri kiu la studento diris. Ĉu? Jesús!

– Silentu, Felipe, silentu, sen vi estas terure. Mi ja diris al vi, ke li estas malsaĝulo, via studento, sed vi denove tedas kiel muŝo.

Jesús timis ne malpli ol la ceteraj.

– Sankta Maria! Ĉu vi aŭdas, kiel bruegas? Nia vilaĝo ja brulas! – kriis Felipe. – Ni kuru, kunuloj, ĉio ja forbrulos al diabla patrino!

– Kien kuri, stulta kapo? – indignis Jesús. – Ĉu vi opinias, ke post la atomo io restos? Tie nun estas infero!

La malpura flava nebulo, kiu moviĝis de la flanko de l’ vilaĝo, kovris la sunon kaj rapide proksimiĝis. Nur nun ĉiuj rimarkis, ke jam delonge ne estas varmege. De la alvenanta nubo blovis tomba malvarmo.

Felipe ankoraŭ tumultis, ne sciante, en kiun flankon kuri. Puŝblovo de l’ glacia vento detiris lian ĉapelon kaj hirtigis maldensan grizan hararon. Jesús rigardis lian sensangan terkoloran vizaĝon, kaj subite per la animala instinkto klare komprenis, ke Felipe baldaŭ devas morti.

– Rigardu, rigardu, kion mi diris al vi? – ekkriis Felipe, montrante per la mano la pajlan tegmenton, sub kiu ili antaŭnelonge sidis, kaj apenaŭ aŭdeble elspiris:

– Tio estas la vento.

Kiam la malpuraj flavaj nuboj venis al la tegmento proksimume je dudek paŝoj, ĝi subite ekbalanciĝis kiel respeguliĝo en la akvo, transformiĝis je verdeta fumo kaj flosis, pelata de l' vento, ĝis kiam ĝin forglutis la ond-iĝanta malpura-flava abismo.

Korotkov M. *Homo kiu mortigis*. Sverdlovsk: Sezonoj, 1988, p. 16-23.



# Homo, kiu mortigis

Oficisto de DED Koldo estis revenanta malfrue vespere el la urbeto Forge-Porto. Pro laciĝo lia humoro estis aĉa, tial li serĉis en la trajno liberan kupeon por dumvoje dormi kelkajn horojn. Li ne trovis vakan kupeon kaj estis devigita kontentiĝi per tiu, kiu troviĝis. En la kupeo, kie Koldo establis sin, sidis viro. Kvankam la viro estis per io ekscitita kaj de lia flanko venisodoro de malkara vino, li kondukis sufiĉe pace, kio allogis Koldon.

Sed apenaŭ la trajno ekveturis de la stacio de l' urbeto Forge-Porto, la nekonato, kiu ĝis nun ne diris eĉ unu vorton, fikse rigardis Koldon kaj pardonpete ekparolis:

– Al vi, verŝajne, ne plaĉas, ke mi hodiaŭ drinkis. Kaj ne malmulte, estas eble diri. – Iom silentinte li aldonis:

– Juĝante laŭ via aspekto, vi, verŝajne, ne permesas al vi tion – drinki en trajno. Ankaŭ mi, cetere, malofte drinkas. Sed hodiaŭ... – Li turnis la kapon kvazaŭ pro denta doloro, starigis la kubutojn sur tableton kaj peze mallevis la frunton sur la polmojn. Tiel li sidis sufiĉe longe, de tempo al tempo profunde ekspirante, poste fikse rigardis Koldon kaj diris:

– Pardonu min. Mi opinias, ke en tia embarasaĉo iu ajn mialoke ne abstinus, drinkegus.

Koldo, kiu komence decidis ne atenti tiun drinkulon, nun ne povis subpremi la profesion scivolemon. Oni povas akiri necesan informon tie, kie ĝi estas neniel atendata.

– Ĉu vi perdis proksimulon? – li demandis plej kompateme.

La ebria kunvojaĝanto malgaje balancis la kapon.

– Ne, tion mi pli facile travivus, – faltinte la frunton li profundiĝis en longan pensadon, poste malrapide eldiris, – mi estas murdisto.

Koldo interne tute streĉiĝis: vidu, homoj, la ĉasaĵo mem kuras al la ĉasisto. Necesas nur ne fortimigi la ĉasaĵon, kaj li ŝerce alparolis:

– Strangaj estas viaj ŝercoj. Nu, kiom da ili vi murdis?

– Da kiuj – da ili?

– Mi ne scias, – intence simplanime eldiris Koldo.  
– Ĝuste jene, ne scias, – la kunvojaĝanto diris neatendite sobre. – Ĝis hodiaŭ ankaŭ mi ne sciis. Kasparo diris, ke ili estas la elito de l' nacio. Aĉ-ĉ!  
Li kunprenis la dentojn kaj ektamburis per la pugno je la benko.  
– Diablo prenu vin, ĉiujn respektindulojn! Ĉu vi komprenas: la elito de l' nacio! Tiel diris Kasparo... Sed tiujn ili per io ĝenis. Jen tiujn!.. Li minacis al iu per la pugno.

– Kiujn? – jam sincere ekinteresiĝis Koldo.

– Estas tia aĉa bando. Nomiĝas DED.

Koldo atente kaj samtempe nerimarkeble rigardis la parolanton.

– DED? – plej naive li redemandis. – Tio estas io koncerna la enlandan defendon, ĉu? Ho, pri tiuj sekretaj servoj, kiom mi scias, oni rakontas amason da ĉiaj kuriozaĵoj. Vi nur diris "DED", kaj en mia animo tuj ĉio, komprenu, ekludis. Nun, mi pensas, mi aŭdos ankoraŭ unu interesan historieton.

– Hm. La historieto estas tia, ke vi ne ĝojos. – Li denove kunpremis la dentojn kaj malamike ekrigardis Koldon.

– Mi ne scias, ne scias, – diris Koldo en la antaŭa tono, – ĉu mi ĝojos, ĉu ne, sed bonvolu kontentigi mian scivolemon.

Sed la nekonato ne hastis rakonti.

– DED, DED, – li malŝate diris tra la dentoj. – Departemento pri Enlanda Defendo. – Kaj subite li ekparolis sufiĉe kohere:

– Interalie, ĉu vi pripensis iam: kiun ĝi defendas? Kaj de kiuj malamikoj? Mi antaŭe tiel opiniis: nia nacio, nia ŝtato havas enlande malamikojn, de kiuj oni devas defendi la nacion. Hm! Ankoraŭ hieraŭ mi tiel pensis...

– Sed kio okazis hodiaŭ? – Koldo ne provis kaŝi sian scivolemon, male, li eĉ emfazis ĝin.

– Se mi rakontus al vi, kio okazis hodiaŭ, vi nenion komprenus. Absolute! – Li konfirmis siajn vortojn per ebria gesto. – Eĉ se rakonti, tiam mi devus komenci per antaŭduonjaraj eventoj. Estas sufiĉe longa historio, ĉu vi ne kontraŭas?

– Ne, ne, mi estas plena je atento.

La nekonato longe kolektis la pensojn.

– Vi verŝajne ne havas firman opinion pri tio, kio mi estas, – li komencis iom neatendite.

Koldo levis la ŝultrojn.

– Jes, vi estas prava, – konsentis la nekonato. – Niatempe estas malfacile juĝi pri homo laŭ la eksteraĵo. Kaj senlaborulo povas esti en freŝkudrita

kompleto, kaj riĉulo povas esti en disŝirita ĝinzo. Sed jen vi, ekzemple, mi diros precize: vi estas ŝtata oficisto. Neniam mi dubas. Mi dum multjara vagado tra laborkontoroj okupis min nur pri tio, ke fiksrigardis homojn: kion povas kaŝi tiu aŭ alia eksteraĵo? Nu, vi komprenas, ke mi estas, kiel oni diras, homo provizore ne laboranta. Tiel nin nomas la statistiko, – li malgaje ridis. – Libera entreprenisto! Nu, mi rakontas tion ne simple por konatiĝo, sed tial, ke plej bone estas komenci de tio, de la laborkontoro. Nu, vi scias, kio ĝi estas. Homoj sidas tie kaj atendas. Dum semajnoj, monatoj, jaroj. Estas negaja okupo, mi diras al vi, kaj kvankam mi estas homo flegma kaj pacienca, mi foje ne eltenis. Al mia amiko oni faris tie porkaĵon. Nu, mi komencis brui: maljusteco – mi diras – kaj simile. Mi ne povas toleri, kiam estas maljuste. Kaj mi ne povis ĉesi, volis pruvi, ke ni ja loĝas en libera kaj civilizita lando. Kaj tiel mi bruas, ke oni prenis min en la policon. Kaj de la polico ĝis DED la vojo estas rekta, ĉu ne?

Kompare kun la polico la traktado en DED estas, mi devas diri, vere galanta. Neniu nomas vin pederasto aŭ fetora kapro, ĉiuj estas ĝentilaj: Sinjoro, sinjoro. Oni alkondukis min al terure afabla homo, kiu nomiĝis Voglo. “Simple – Voglo. Ni ne ŝatas reklami nin kaj nian laboron. Sed al vi mi povas diri, ke ni defendas la liberon de nia nacio kaj la demokration en nia ŝtato”. Li parolis belege, diablo. Bonega oratoro.

Estas malfacile priskribi la farton de Koldo. Lia laco malaperis senpostsigne. Ja temis pri lia ĉefo, kvankam lia aŭtenta nomo estis ne Voglo. La ĉefo ĉiam subtaksis Koldon. Sed nun li ekscios detalojn, per kiuj li okaze povos tiel atuti, ke la makzelo de Voglo malsupreniĝos.

– Li pentris al mi ĉion pri la libero kaj demokratio, tiu ĉi Voglo, kaj poste diris: Mi adresas al vi, kiel al honesta civitano, helpu nin en nia laboro. Nu, kompreneble, mi pro tiu deklaro ekjubilis, kion ankoraŭ diri, mi ne nur konsentis, sed konsideris tion esti granda honoro.

Sed li donis al mi bagatelan laboron. Montris foton de viro, detale priskribis liajn signojn. Voglo, li ja estas ĝentila senlime. “Al mi estas, – li diris, – tre malagrade priskribi tiujn tre hidajn bildojn, sed la dokumentoj diras pri jeno”. Kaj li tralegis al mi diversajn naŭzajn dokumentojn. Nu, nun mi scias, ke ĉio ĉi estis falsa, sed tiam mi plenplene kredis je ĝi. Kie tiu fiulo prenis imagkapablon por tiuj abomenaĵoj? Nu, ekzemple, tiu homo (li ankoraŭfoje montris la foton) estas kompleta recidivulo, li malsanktigas tombojn, rabas kaj perfortas malriĉajn oldulinojn, voras homan viandon. Kaj li ne simple tralegis, sed konfirmis ĉion per fotoj. Finfine mi saltleviĝis

kaj kriis: “Montru al mi la kanajlon, mi strangolos lin per la nudaj manoj!” Kaj Voglo respondas al mi kun suspiro: “Sed antaŭ tio lin necesas trovi”. Nu, mi sendube deklaris, ke mi akiros lin el sub la tero. Voglo estas kontenta, li nomis al mi la lokojn, kie mi povos plej facile renkonti la krimulon, kaj tiel interalie, donas al mi unu milon por ĉiaj neantaŭvideblaj elspezoj. “Se vi bezonos ankoraŭ monon, venu – li diris, – la pagon vi ricevos, kiam vi trovos lin. (Li denove ŝovis al mi sub la nazon la foton.) Mi donas al vi tri semajnojn”.

Pasis tri semajnoj, mi venas al Voglo kun nenio. Sed li ne tre ĉagreniĝas. “Tiun ĉi, – li diras, – ni ordigis. Sed ni havas sub la celilo ankoraŭ tiun civitanon”. Kaj denove estas fotoj, naŭze abomenaj dokumentoj, kie mi serĉu lin kaj cetero. Mi pro tia laboro, kompreneble, rekuraĝiĝis, tio ja ne estas vagado tra laborkontoroj. Mi defendas la liberon kaj demokration!

Mi ne scias, kiom tio povus daŭri, sed dum nia vica renkonto... Ho, tio okazis nur hieraŭ. Hm... Do jene, hieraŭ Voglo montris al mi la foton... Kiel vi opinias, de kiu? De mia infanaĝa amiko. Kaj denove li komencis la saman fabeleton pri tomboj kaj oldulinoj. Tiam mi, kompreneble, ekdubis. Mian amikon Kasparon mi antaŭe konis kiel min mem. Li estis bonega homo...

Voglo kiel ĉiam donis al mi instrukciojn kie serĉi. La plej perfekta deliraĵo. Kvazaŭ mi ne scius, kie Kasparo loĝas. Ĝuste hieraŭ mi veturis al li. Li, memkompreneble, estis la sama, kiel antaŭ multaj jaroj, kvankam dum longa tempo, kiam mi ne vidis lin, li iĝis jam rekonita verkisto. Sed pri tio mi eksciis, kiam venis al li... Nu, mi rakontis kun kio mi venis. Komence li aŭskultis trankvile, sed poste mi vidis: li enŝovis la fingrojn en la hararon, komencis iradi tra la ĉambro, io ekfuriozis en li.

“Do, estas vi! – li diras. – Mi sciis, certe, ke tia sorto estas preparata por mi. Sed mi neniel supozis, ke tio estas ligita kun vi”.

“Ne nervumu tiel, Kasparo, – mi diras. – Estas evidenta eraro. Mi scias, ke vi ne povis...” Kasparo nerveze kaj eĉ moke ekridis: “Eraro? Ne, kara Arviko, eraro ĉi tie ĝuste ne estas”.

Li fosis en siaj librobretoj kaj prenis dikan kartonan tekon.

“Tiuĵ homoj, – li diras, – pereis en la lasta jarduono ĉe diversaj stultaj cirkonstancoj. Ĉu vi, hazarde, konas ilin?”

Li malfermas la tekon, estas ĵurnalaj eltondaĵoj, ĉefe nekrologoj kaj portretoj en funebraj kadroj. Diable! Miaj okuloj iĝis kvadrataj. Ĉiuj miaj recidivuloj! Mi sentis, ke laŭ la frunto gutoj de ŝvito kuras, tiklas. Kaj Kasparo malgaje balancas la kapon kaj rakontas: “Jen filmreĝisoro. Li estis mortige

vundita en sursceneja eksplodo. Pentristo, li mortis pro mordo de infektita kato. Kantisto kaj komponisto. Sur lian domon kraŝis milita aviadilo. Ankoraŭ unu pentristo. Estante ebria, li falis sub trajnon, kvankam neniam oni vidis lin ebria..." – "Sed, Kasparo, ili estas ja la samaj homoj, pri kiuj mi rakontis al vi. Mi komprenas nenion..." – "Jes, ne estas facile kompreni tion, mi mem ankoraŭ ne estas certa, ke ĉio estas tia, kia ŝajnas al mi" – "Ke tiuj estas honestaj civitanoj?"

Kasparo malgaje ekridis.

"Ne, mi bone konis ilin dumvive. Sed ne tio estas grava, se eĉ mi ne konus... – Li enpenŝiĝis. – Vi, Arviko, penu rememori jenon. Ĉu vi memoras iajn enigmajn eventojn? Nu, ekzemple, vi estas kolera je iu homo, aŭ entute ekmalamis tiun, kaj post ioma tempo la homo mortas?"

Mi fiksas la okulojn je Kasparo, kvazaŭ li estus profeto aŭ Jesuo Kristo mem. Kian menson la homo havas, – mi pensas. – Dum tiom da jaroj ni ne renkontiĝis, kaj li senpene divenis, kio min dum ĉiuj ĉi jaroj turmentis.

"Estis ĝuste tiel, – mi diras. – Nur mi ekmalamis iun pro ties maljusteco, tuj okazas iu stulta evento. Ekzemple, tute sana homo mortas pro infarkto, alia pereas en strata akcidento, la trian, mi memoras, formanĝis leono, forkurinta el zoo".

Kasparo aŭskultas kaj kapjesas.

"Kaj plu, – li diras, – ĉu vi rimarkis ion ĉe vi, nu, por tiel diri, neordinaran?" – "Ŝajne, nenion, – mi diras, – jen eble nur..." – "Nu, ek!" – "Ne opiniu, ke tio estas fanfaronado. Ofte mi estis rande de morto, kaj, kiel vi vidas, ĝis nun mi estas viva kaj sana". – "Bone, bone, rakontu almenaŭ pri du aŭ tri okazoj".

"Nu, unufoje en uzino okazis eksplodo. Ni staris triope. Tiuj du, malfeliĉaj... Sur ili tute ne restis nedifektita loko, sed mi eĉ gratvundon ne havis. Post tio min diversaj inspektoroj longe enketis, sed nenion klarigis. Aliffoje nokte ebria fiulo atakis min per pistolo. Li min tuŝpafis. Mi bone memoras, kiel kuglo traboris la bruston, sed kiam mi alkuris hejmen, neniun vundon mi trovis..."

"Do-o-o, do, – Kasparo diras. – Mi pensis, ke mi kolektas materialon por sciencfikcia novelo, sed la realo estas pli frua. Jen, aŭskultu, kion mi volis verki. En nia Galaksio ekzistas fortega civilizacio. Ĝi malkovris nian homaron kaj vidas, ke ĉi tie tute ne ĉio estas en ordo. Kaj ili decidis laŭ siaj certaj konsideroj doni al la plej eminentaj reprezentantoj de nia civilizacio kapablon plibonigi la mondon. Kaj certe faris ilin nevundeblaj".

Tiam mi ne eltenis kaj ekridegis.

“Tre neversimila estas via novelo, Kasparo. Ĉu mi, viaopinie, estas eminenta reprezentanto? Nu, vi, ekzemple, estas fama verkisto. Estas ankaŭ ministroj, sciencistoj”. – “Generaloj, admiraloj, – ekridis Kasparo. – Ĉu vi pensas, ke ili neniam malsinceras aŭ venas al kompromisoj kun la konscienco? Metodojn de akirado de altaj postenoj oni ellaboris dum jarcentoj. Vi scias pri ili nenion. Vi estas honesta kaj simplanima. Se vi scius, kiel oni fariĝas ministro, vi premus la kapon per la manoj kaj krius tra la tuta mondo: “Maljuste!” – Kasparo ridis. – Eble por ili ĝuste tio estas la plej ĉefa homa eco. Mallonge dirante, ili tamen donis al vi tiun dian talenton, kaj DED tion elflariis...” – “Ba, denove en via novelo estas malkonkordaĵo. Kiel DED povis elflari, se eĉ mi mem ne konjektis?” – “Kia naivulo vi estas, Arviko, – Kasparo respondas al mi. – Vi verŝajne legas nur la oficialan gazeton?”

Mi kun honto konfesis, ke mi entute ne legas gazeton, nur anoncojn pri laboro.

“Kaj vi ankoraŭ miras, ke oni elektis vin! Kiun do ili povis elekti, se ne tiajn beatulojn? Se vi legus progresemaĵajn ĵurnalistojn. Jen, almenaŭ Antonon Bardi. – Li malfermis sian kartonan teknon, por unu momento enpenŝiĝis kaj denove fermis ĝin. – Jes... Antono neniam plu verkos. Aĥ, Arviko, vi estas naiva homo, – li iom silentis. – Jen, tiu ĵurnalisto, Antono Bardi, por ne uzi nur onidiron, mem iris labori en DED kaj poste verkis libron pri ili. – Kasparo peze suspiris. – DED estas vera ŝtato. Ili havas siajn proprajn sciencon, teknikon, institutojn. Ĉu vi aŭdis pri GEC? Tiel nomata Granda elektra cerbo. Tie estas kolektita ĉiu informo pri vi kaj pri mi. Certe, ili scias pri vi pli multe ol vi mem”.

– Stultaj elpenŝaĵoj! – elbalbutis Koldo. – Tie estas nenio simila.

– Ĉu vi ne kredas? He-e, pardonu min, ankaŭ vi vivas kiel beatulo. Kasparo pri mi korekte diris: nin interesas nenio, kio kuŝas ne antaŭ nia nazo. Ni vivas kiel bovidoj; se oni volas – pelas nin al paŝtejo, se volas – al buĉejo. Por ni estas malfacile kredi tion, sed Kasparo ja speciale pri tio sciiĝis. Ĝi ekzistas, tiu cerbo. Komence ili konstruis ĝin, ke ĝi helpu en ilia abomena laboro, kaj nun ĝi jam mem diktas al ili, kion kaj kiel fari. Tie, en aparta anguleto de la cerbo, konserviĝis informoj pri la homoj... Kiel Kasparo tion nomis? Ha, jen: la homoj, kiuj... ha... povas esti danĝeraj... en eksterordinaraj cirkonstancoj. Tiel ili en DED estas notataj... Apenaŭ homo famiĝas, en lia slipo aperas truo; se DED ekscias ke li ne konsentas kun la registaro – nova truo. Tie oni ne pririgardas la personecon, ĉion decidas nuda mate-

matiko kaj elektroniko. Kiam kolektiĝas certa nombro da truoj, GEC donas la komandon: forigi. Sed forigi ne estas tre simple. Juĝi la homon estas klopodplena afero, tre ofte senrezulta. Se li simple malaperus, tio estus tro suspektinda. Plej bone estus, se li malaperus laŭ plej natura maniero. Do, ili uzas nin. La elektitojn, kiel diris Kasparo. Mi ne komprenas, kiel sciencistoj povis atingi tiajn fiaĵojn.

Li kunpremis la pugnojn kaj iom silentis, poste kolere daŭrigis:

– Jes, se Kasparo pravas, se tio estis vere aliplanedanoj, ili ne eraris. Kvankam antaŭe mi estis stultulo. Aj, kia mi estis stultulo! Pli granda kaj pli bona parto de la vivo jam estas malantaŭe... Sed estas bone, ke almenaŭ nun, havante kvardek jarojn, mi komprenis: jes, ili ne eraris. Nun mi scias, kiun oni devas ami kaj kiun malami. Ili estas bravuloj, ili sciis, al kiu enmanigi la dian talenton.

Li prenis el la poŝo cigaredojn, volis ekfumi, sed alidecidis kaj remetis ilin. Ne rimarkante, ke Koldo similas dormanton kaj mallaŭte ronketas, li demandis:

– Vi eble pensas, ke mi hodiaŭ drinkis je la mono de Voglo? Nenial. Mi pruntis ĉe Kasparo. Kaj la monon de Voglo mi morgaŭ ĵetos en lian muzejon. – Li ekridis. – Kiel vi opinias, kion li faros al mi pro tio? Ha-ha! Nenion. Unue, li timos, kaj due, kiel diris Kasparo, mi estas nevundebla. Kial li timos? Estos sufiĉe, ke mi tiun Voglon malamu, kaj nenio savos lin. Aŭ el zoo leono forkuros, aŭ ĉe iu aŭtisto bremsos misfunkcios, multaj absurdaĵoj povas okazi... Voglo certe estas kanajlo, sed li ne estas stultulo, ne...

Koldo respondis per laŭta ronko, kaj la nekonato baldaŭ eksilentis. Koldo pripensis, kiel li devas agi. Plej bone, tiu babilulo estu arestita kaj kondukita en la departementon. Kvankam li estas el la plej malsuperaj tavoloj de la socio kaj apenaŭ povas esti danĝera, sed li scias ion pri la laboro de DED. Finfine Koldo decidis ne malbonigi al si la reston de la nokto. La homo ja matene venos al Voglo, kaj se eĉ ne venos, Voglo scias, kie lin serĉi...

\* \* \*

Matene Koldo multfoje telefonis al Voglo, sed tiu ne estis en sia loko. La foresto de Voglo maltrankviligis neniun krom Koldon. La laboro de la departemento estas tia, ke homo povas dum semajnoj foresti, kaj ĉia sciivolemo pri tio ne estas aprobata. Nur ĉirkaŭ la tagmezo ĉiuj sciigis pri la tragedio. Kiam matene Voglo pretiĝis por iri al la laboro, al li subite ĵetis

sin lia amata dogo kaj dismordis lian gorĝon. Kiam la polico finfine povis penetri en la loĝejon kaj mortpafi la hundon, la mastron oni povis helpi per nenio. Post la polico venis ankaŭ kuracisto. Sed tiu nur kompetente konstatis tion, pri kio la ĉeestintoj konjektis jam sen li: la hundo havis rabion.

*Sezonoj*, 1985, №5, p. 6-12.

Korotkov M. *Homo kiu mortigis*. Sverdlovsk: Sezonoj, 1988, , p. 28-35.



# Mi estas vi post unu jaro

Finiĝis labortago. La lasta ĉi-jare. Precize je la kvara nia laboratorio malpleniĝis, sed al mi, kiel ĉiam, ne sufiĉis dek aŭ dek kvin minutoj por fini tion, kion mi planis matene. Kaj kiam mi finfine ĉion faris kaj pretiĝis iri hejmen, nekuraĝe sonoris la telefono.

Obtuza kaj malproksima, preskaŭ nereala voĉo en la aŭskultilo sen ia klarigo komencis:

– Halo! Ĉu estas vi? Kiel bone estas, ke mi vin ankoraŭ kaptis. Al mi tio estis treege malfacile, tial nepre ne remetiu la aŭskultilon. Nun mi diros al vi nekredeblan aferon...

– Aŭskultu, vi verŝajne opinias, ke ni estas bonaj konatoj. Sed mi tion ne povas diri...

– Jes, ni estas tre bonaj konatoj, kaj vi baldaŭ komprenos tion. Aŭskultu min atente, mi ĉion klarigos. Ĉu vi memoras, ke antaŭnelonge vi sendis petskribon al la komitato de inventoj? “Temporelajso kun negativa reteno”.

– Sed vi, propre, de kie scias pri tiu petskribo?

– Mi ja diris: aŭskultu kaj vi ĉion komprenos. Nu jen, surbaze de tiu relajso mi faris kompletigaĵon por la telefono, kaj tiel oni povas paroli kun la pasinteco. La telefonretoj havas unu interesan econ... Nu, tion vi baldaŭ mem ekscios. Kaj jen – nun mi parolas kun vi, pli ĝuste – kun... mmm... kun mi mem. Mallonge dirante, mi estas vi post unu jaro. Penu kredi tion kaj ne metu nenecesajn demandojn. Ni havas malmulte da tempo, la kontakto povos ĉesi en ĉiu momento. Kaj la afero estas jen en kio. Hodiaŭ, kiel mi memoras, vi invitis por la novjara vespero Tanjan...

– Tio estas ja tute ne via afero! – Mi komencis suspekti ion.

– Ho, karulo, ni ne havas tempon por tiuj detaloj! Se vi ne obeos min kaj plu restos la sama naivulo, tiam... Mallonge dirante, hodiaŭ vi kun Tanja kverelos. Pro tre stulta kaŭzo. Venĝe vi konatiĝos kun alia junulino, kiu... Pardonu, mi jam babilaĉas superfluaĵojn. Vi ne bezonas scii tion. Nu,

kaj Tanja, por venĝi, ankaŭ konatiĝos... Nu, la rezulto estos la plej terura, kreu min, kaj por ke tio ne okazu, vi hodiaŭ devos esti maksimume afabla, karesema, cedema kaj cetero. Ĉu vi komprenas: maksimume? Promesu.

Mi ekridis kaj remetis la aŭskultilon. Iu preparis al mi sufiĉe spritan ŝercon. La voĉo estas treege konata, sed mi ne povis kompreni – kies. Kio do, la ŝerco estas nemalbona, ĉio estas konsiderita: mia emeto al mistiko, altiriĝo al inventemo, eĉ la relajson li ne forgesis. Al mi ne plaĉas nur, ke tie figuras Tanja. Li estas, certe, arogantulo.

Ĝis la vespero mi ĉirkaŭkuris vendejojn, serĉante rafinitajn manĝetaĵojn (dum la tuta vivo mi ne havis pli agrablajn zorgojn), kaj pri tiu ŝerculo mi ne rememoris.

Kaj vespere, ĉe la festa tablo kun mi sidis Tanja. Ĝis la fino de la jaro restis jam ne multe da tempo, mi jam imagis, kiel mi plenigos la pokalojn per ŝaŭma trinkaĵo. Kaj dume mi gajigis Tanjan per antaŭe speciale preparitaj rakontoj el la humura gazeto "Krokodilo".

Kaj tiam denove susuris nekuraĝa rompema telefona voko.

– Halo! – apenaŭ aŭdeble sonis en la aŭskultilo. – Denove estas mi. Lastfoje la kontakto rompiĝis...

Mi ekridis plej moke, kiel mi povis.

– Nun aŭskultu atente, – mi diris al la nekonata ŝerculo. – Via profetaĵo ne realiĝis. Tanja estas nun ĉe mi, kaj niaj rilatoj estas bonegaj. Ĉu vi aŭdas? Bo-ne-gaj. Kaj ne malbonigu nian feston.

Mi demetis la aŭskultilon kaj rimarkis, ke Tanja subite malgajiĝis.

– Kun kiu vi parolis? – preskaŭ plore ŝi demandis.

– Tanja, ne zorgu pri tio. Iu... hm... nenormalulo mistikas min dum la tuta tago. Li diras, ke li estas mi, kaj ke li telefonas al mi el la estonteco, – mi balbutis, komprenante, kiel idiote tio sonas.

– Ĉu eble li telefonis de sur Marso aŭ el alia galaksio? Kial vi parolis al li pri mi? Ne provu senkulpiĝi, Sergio. Mi ĉion komprenis. Tio estis unu el miaj antaŭulinoj. Amikinoj rakontis al mi, ke vi havis ilin pli ol sufiĉe.

– Tanja, mi asertas, kun neniuj mi havis ion seriozan.

– Jen tio min pleje timigas. Vi ne havis ion seriozan kaj ne havos. Pardonu, Sergio, sed ĉe mi malaperis la humoro renkonti kun vi la Novjaron. Prefere mi iru hejmen.

Diablo prenu! Ni kverelas pro tre stulta kaŭzo. Ĉu realiĝas la antaŭdiro de tiu aroganta profeto? Mi penis, kiel li konsilis, esti maksimume afabla, cedema. Ĉio estis vana.

Tanja foriris. Kia stultaĵo!

Mi senforte sidiĝis sur seĝon, fiksita la okulojn al la brila botelkolo kaj provis koncentri pensojn. Nu, bone. Mi reale elpensis temporelajson kun negativa reteno, kio estas, simple dirante, kun antaŭago. Ni supozu, ke per ĝia helpo oni povas aranĝi telefonadon kun la pasinteco. Jen, nun Tanja foriris, kaj post unu jaro mi rememoris, ke antaŭ jaro mi devis konduki alie kaj ne permesi tion. Kaj nun li (tio estas mi tiam, post unu jaro) komprenis, ke li perdis Tanjan definitive. Li jam dum la tuta jaro ne renkontiĝis kun ŝi. Ĉu oni povas nun ion ŝanĝi? Post tio, ke li (do, mi) konatiĝis kun alia junulino, eble eĉ edziĝis, kaj nun li volas ĉion returni en la antaŭaran pozicion? Ne, estas faritaj jam tro multaj stultaĵoj. Li ja tie (do, mi), ne estas naivulo, kiu esperas pri neeblaj aferoj. Tio signifas, ke ĉi tiun absurdaĵon ne indas konsideri serioze.

Tie estas io alia. Haltu! Kial Tanja foriris? Ĉar ŝi aŭdis nian absurdan telefonan interparolon. Pri tio, ke mi kun Tanja kverelos, li antaŭsciigis min tage. Kaj ni kverelis post la vespera telefonado, kaj post ĝi ŝi foriris. Se ne estus tiu stulta konversacio kaj entute ne estus mia mistera identulo, ne okazus tiu kverelo. Jen, tio estas la ĉefa malkonkordo.

Ni provu rigardi ĉion de alia flanko. Iu, ni nomu lin sinjoro X, volas kvereligi min kun Tanja. Li serĉas por tio ĉiajn artifaĵojn, kaj tiu novjara fabelo estas unu el ili. Tiu X havas certajn artistajn kapablojn, li lernis imiti miajn voĉon kaj intonacion, ekmastris miajn ŝatatajn vortojn. Tio ne estas malfacila. Plu, li scias pri la relajso... Nu, tio estas sendube Viktor! La sola homo, kiun mi inicis al tiu sekreto. Neniam mi pensis, ke Viktor estas kapabla tiel idiote ŝerci. Kio do, hodiaŭ mi, verŝajne, ankaŭ amikon perdis...

Nun mi iros al Tanja kaj ĉion rakontos al ŝi. Se ŝi komprenos kaj kredos, ni kune ridos kaj ĉio returniĝos al la komenco de ĉi tiu vespero.

Kaj tiam denove sonoris la telefono. Ĉu denove estas Viktor? Ĉu li volas pardonpeti, aŭ li elpensis ankoraŭ unu mistikaĵon?

– Estas mi, – suspire diris la jam konata voĉo. – Vi, verŝajne, ĝis nun ne kredas min?

– Viktor, iru al diablo! Via ŝerco jam malbone finiĝis por mi.

– Kio, ĉu Tanja jam foriris? Aĥ, mi ja antaŭsciigis vin! Kaj ne nomu min Viktor. Hm... Ankaŭ mi en tiu vespero havis penson pri Viktor, nur en alia kunteksto. Kurioze estas... Tamen penu spite al ĉio repaciĝi kun Tanja. Mi petas vin, kiel viro viron. Ni ne povas vivi sen ŝi. Jene. Nu, tion vi mem komprenos post certa tempo. Kaj por ke vi tamen kredu min, mi elpensis

nerefuteblan argumenton. Nun ni havas jam aprilon. Ekde la momento de nia lasta telefonado pasis tri monatoj. Dum tiu tempo mi lernis ne nur paroli kun la pasinteco, sed ankaŭ teleporti al ĝi etajn aĵojn. Nun mi iros kaj kuŝigos en vian poŝtkeston la hodiaŭan ĵurnalon. Hodiaŭ estas la kvina de aprilo. Ĉu vi komprenis min? Halo. Ni ne plu aŭdas ion. Io, verŝajne, difektiĝis...

Ne, tie nenio difektiĝis. Simple mi silentas. Mi ne scias, kion respondi. Mi ja ĵus pruvis al mi mem, ke ne povas okazi telefonado kun la estonteco, ke tio estas nur ŝercoj de Viktor. Nun mia tuta pruvo detruigatas. Li mem ja petas min repaciĝi kun Tanja. Sed eble Viktor simple ekhontis. Ankaŭ tio ne estas ekskludebla...

Jes, mi devas iri kaj rigardi la poŝtkeston. Se tie ne estas iu ĵurnalo, mi devas tuj trovi Tanjan kaj ĉion rakonti al ŝi. Ŝi devas kompreni, ke tio estas stulta, sed tamen nur ŝerco. De mia neseriozema amiko.

Mi iras al la poŝtkesto, kaj mia koro kvazaŭ falas en abismon. Iu ĵurnalo tie kuŝas! Nun mi elprenos ĝin kaj rigardos daton...

*Hungara Vivo*, 1985, №1, p. 28-29.

Korotkov M. *Homo kiu mortigis*. Sverdlovsk: Sezonoj, 1988, p. 36-39.

# Meteoro

Nokte en la ĉielo io terure fajfegis, kaj iĝis subite lume kiel tage. La tuta limkvartalo estis ellitigita, sed ĉar tiu enigma fenomeno ĉesis same rapide, kiel komenciĝis, kaj ĝin nenio sekvis, la dormo baldaŭ reprenis sian potencon, kaj la fenestroj unu post alia estingiĝis. Ankoraŭ dum ioma tempo bojis tumultigitaj hundoj, sed poste ankaŭ ili kvietiĝis.

Matene Nikodimov pro la maltrankvila nokto ellitiĝis sufiĉe malfrue, li rememoris, ke hodiaŭ estas sabato, kaj estas necese hejti la ŝvitbanejon. Li nehaste eliris en la korton, direktis sin al la banejo, kaj kiam li ĝisfine viŝis la okulojn kaj ekrigardis ĝin, li konsterniĝis kaj krude sakris. Anstataŭ la ardeza tegmento super la banejo elstaris nudaj ĉevronoj. La hundo apud sia budeto nelaŭte jelpetis kaj kulpe subtiris la voston.

Nikodimov, murmurante akrajn vortojn, iris supren, atente pririgardis la ĉevronojn. Kiel akurate ili laboris, kanajloj! Tute nenie estas eĉ splito aŭ spureto, ankaŭ ĉiuj najloj staris en siaj lokoj, ili prenis nur la ardezojn. Kaj inter la polva subtegmenta fatraso kiel la plej pura diamanto brilis... botelo da vodko "Tritika".

Nikodimov sentis, ke laŭ lia dorso kuras superstiĉa malvarmo. La botelo da "Tritika"... Ĝuste tiom kostis al li la ardezoj, kontraŭ tiu sama botelo lia kuzo Antono donis el sia stokejo tridek ardezajn foliojn, kiujn tiu artifkulo iamaniere povis nuligi kiel neutiligeblajn. Sed kiu povis pri tio elflari?

Nikodimov kiel kutime ŝovis la botelon sub la baskon kaj, profundiĝinta en amarajn pensojn, iris en la hejmon kun intenco vesti sin pure kaj tuj iri en la milicon<sup>1</sup>. Sed en tiu momento malfermiĝis la pordeto kaj en la korton rapide zorgoplene paŝante eniris Antono.

– Savu min, frato, – li diris salutinte. – Nekonvene estas adresi, sed la kapo turniĝas: diablo scias, kien ĉio malaperas? En mia stokejo eĉ najleto

---

1. Milico. La sovetunia nomo de polico.

neniam malaperis, sed en la propra domo – tia diablaĵo. Hieraŭ mi starigis duonlitrujon en la fridoŝrankon, volis kun unu homo afereton aranĝi. Pretiĝas mi matene, volas preni la botelon, sed tie – fju! – Li faris per la mano respondan geston. – Ĉu vi eble rezervis?

Nikodimov volis kiel kutime rifuzi, sed, kiel ofte okazas en krizaj kazoj, li perdis la kapon kaj elmetis la kaŝitan botelon el sub la basko.

– Ho, belulino! – ekĝojis Antono. – Almenaŭ ĉi tie mi havas feliĉon, en vendejoj hodiaŭ eble eĉ oni ne vendas. – Li haste kaptis la botelon de la konfuzita Nikodimov kaj ŝovis ĝin en sian poŝon. – Do, ĝis la lundo. Komprenis, ĉu?

En alia tempo Antono povus ankoraŭ iom babili, sed hodiaŭ li estis okupita. Kiam li estis preta foriri, la pordeto denove knaris.

*Sciu: baldaŭ, tre baldaŭ*

*Kuŝos mi en la tomb'...*

– funebre kantis la enirinto, desegnante per la piedoj malfacilajn figurojn. Antono kaj Nikodimov apenaŭ rekonis la najbaron Valentino Glotov, kiu havis reputacion de malmultedrinkulo. Hodiaŭ li estis sen sia kutima felta ĉapelo, malpura kaj taŭzita. Granda malfeliĉo, verŝajne, falis sur la homon, se ĝi tiel lin kurbigis.

– Viĉjo, – diris Glotov, levinte sian malhelan rigardon je Nikodimov, – kontraŭ vi mi nenion havas, mi vin estimas... Kaj vi, Antono, estas ruza diablo... oj, ruza... – Poste li ekrigardis Antonon per la subite sobriĝintaj okuloj, kaj, verŝajne kompreninte, ke li babilis supefluaĵon, hikis kaj eksilentis.

Sed en sia nuna stato li ne povis longe silenti.

– M-mi povas proponi, – afereme li diris kaj komencis ion tiri el sia hirtiganta poŝo. – Viĉjo... mi vin estimas... el la botelo ni ne trinkos... – li murmuris, eltirinte dume maldiafanan botelon, ŝtopitan per ĵurnalo.

Nikodimov alportis glasojn. Kiam li estis eliranta, Glotov jam sidis sur la peroneto kaj malĝoje rakontis al Antono:

– ...ĝi do – grrr, eĉ la fenestroj ektremis jen tiel, – li malforte skuis la pugnojn en la aero. – Sed mi – nenio, iom fumis kaj plu dormis. Matene mi eliris en la korton – denove nenio. Kaj poste mi enrigardis en la garaĝon – U-u-u! – Glotov lasis sian kapon fali sur la genuojn kaj ekploregis.

– Imagu, du duonoj! – li daŭrigis post unu minuto. – Kiel per

veldotranĉilo, ho ne, veldilo tiel ne farus!.. Kiel laŭ liniilo... Tra la motoro, tra la kardano, tra ĉio... Ho, aĉuloj, se mi scius, kiuj! – Kaj li denove ekploregis.

Nikodimov demande rigardis Antonon, kaj tiu flustre rakontis, ke nokte iu tranĉis la aŭton de Glotov per veldotranĉilo aŭ per diablo scias kio. Unu duono restis kaj la dua malaperis senpostsigne tra la ŝlosita pordego.

Glotov iom trankviliĝis, verŝis komence plenan glason al Nikodimov, poste al si kaj fine duonon da glaso al Antono. Ĉiuj trinkis.

En la kapo de Nikodimov io komencis klariĝi. Aha, se malaperis la ardezoj, aĉetitaj kontraŭ la botelo, kaj ĉe Antono malaperis tiu sama botelo... Tiel, tiel...

– Valenteno, diru honeste, – atenteme li petis Glotov, – per kia mono vi aĉetis la aŭton?

– Do... per la honesta, mia propra! Unu duonon mi perlaboris per honestaj penoj, – li frapis per la pugno sian bruston, – kaj la alian duonon – per la fiŝoj. Mi mem fiŝis per retoj en nia rivereto, dormis nesufiĉe. Ja ĉio estis honeste mia propra! Dum tri jaroj mi ne trinkis la vendejan vodkon, nur ĉi tiun venenon. – Li kolere forpuŝis per la piedo la malplenigitan botelon. – Rublon post rublo kolektis. Ili, aĉuloj, ĝuste tra la kardano! – Lian vizaĝon deformis grimaco de doloro, kaj li denove sensone esploris.

– Do... – necerte diris Antono.

Nikodimov, gratante la nukon, mediteme rigardis foren. Hazarde li ekvidis surstrate preterirantan najbaron, sian maljunan instruiston.

– Petro Martinoviĉ! – li kriis, saltleviĝinte de sur la peroneto. – Vizitu nin, karulo! Serioze! Ni petas vin.

La maljuna instruisto nehaste eniris en la korton, ĝentile sed digne salutis.

– Petro Martinoviĉ, – Nikodimov adesis al li, – vi en nia lernejo ja instruis la kemion, ĉu?

– Jes, jes. Sed kio do?

– Ho, Petro Martinoviĉ, ĉe ni nun estas tia kemio, ke eĉ la haroj hirtiĝas.

Nikodimov detale rakontis, kion ĉiu el ili malkovris matene, ne forgesinte mencii kaj la fiŝojn de Glotov, kaj siajn ardezojn, aĉetitajn kontraŭ la botelo.

– Ha, jen tiel eĉ... – Petro Martinoviĉ mediteme ekridetis, metis sur la peroneton sian retsakon kun legomoj kaj sidiĝis apude. – Nu, tiam multo

iĝas komprenebla. Nun mi, junuloj, penos ion klarigi al vi. Ĉu vi aŭdis hodiaŭ nokte fortan bruon?

– Ho, certe. Ĝi ĉiujn vekis...

– Do aŭskultu. Mi komprenis tiel: Antono vendis al vi la ardezojn kontraŭ unu botelo, ĉu? – Petro Martinoviĉ fleksis unu fingron. – Krome malaperis la botelo el la fridujo de Antono. Nun pri Valenteno. Li perlaboris por duono de l' aŭto, kaptante fiŝojn per malpermesitaj iloj. Kaj nokte tiu duono malaperis.

– Ĉio estas ĝusta, – Nikodimov ektristis.

– Sendube – tio estas antimondo... – Petro Martinoviĉ diris nekompreneblan vorton. – Jes, junuloj, ĝi estas la kaŭzo de ĉio, la nokta meteoro. Kemion tio ne koncernas, sed ĉu vi lernis astronomion?

– Certe... – kompetente respondis Antono.

– Do jene, junuloj. En nia parto de l' Universo, – Petro Martinoviĉ fingre rotaciis en la aero, – ĉio okazas tiel, ke ĉia energio transformiĝas je varmo. Multaj sciencistoj eĉ prognozis al ni pro tio la tiel nomatan termikan morton. Ni ne juĝu ilin. Sed mi estas konvinkita, – li fortigis la voĉon ĉe la vorto "konvinkita", – ke en la Universo ekzistas lokoj, kie ĉio okazas male. Nu, mi ne scias la detalojn, eble tie eĉ la homoj komence mortas kaj poste naskiĝas. Ĉio estas komplikita, junuloj. Eĉ mia klero ne sufiĉas por kompreni ĉion. Sed la esenco de ĉio estas jena. Ĉe ni fenomenoj okazas tiel, ke la ordo transformiĝas je malordo. Nu, tiu domo ekzemple iam transformiĝos je amaso da disbatitaj brikoj. Science oni nomas tion pligrandiĝo de la entropio de l' Universo. Sed mi estas konvinkita, ke en aliaj lokoj tiu entropio kontraŭe malpliĝas, tie malordo transformiĝas je ordo.

– Nu, ĉe ni tio okazos ne baldaŭ, – rikanis Antono.

– Jes, bedaŭrinde, – konsentis Petro Martinoviĉ. – Sed hodiaŭ nokte super la urbo preterflugis meteoro, nu, simple al ni enflugis peco de tiu antimondo. Plej verŝajne ĝi nur tuŝetis la atmosferon kaj forflugis, alie tie ĉi okazus grandega katastrofo. Kaj nun ni vidas, ke pro ĝia influo en iuj lokoj aperis ordo – kaj nenio plu. Jen mi volis hodiaŭ ordigi la librojn en mia ŝranko, sed matene mi vekiĝis – tie estas ideala ordo: dorso apud dorso, ĉio estas laŭ la alfabeto.

– Aĥ, laŭ la alfabeto! – ĝemis Glotov. – Se mi havus viajn zorgojn! Ĉe mi ili ja laŭ la kardano tranĉis! – Kaj li denove, kaj plian fojon ne vire laŭte ekploregis.



Petro Martinoviĉ ankoraŭ longe kaj entuziasme klarigis ion pri la entropio, antikorpuskloj kaj pri energispecoj. Glotov ploregis kaj minacis al iu per siaj pugnoj. Nikodimov fumis, malgaje rigardis al la ĉevronoj kaj ĉiam pli klare komprenis, ke iri en la milicon estas okupo verŝajne senutila. Antono kun saĝa aspekto jesis al Petro Martinoviĉ, kaj en animo jubilis: li delonge komprenis, ke en tia situacio la ardezoj de sur la tegmento de Nikodimov ne senpostsigne malaperis, sed revenis en la stokejon, kaj li denove povas ilin al iu vendi.

*Sezonoj*, 1985, N<sup>o</sup>4, p. 3-6.

Korotkov M. *Homo kiu mortigis*. Sverdlovsk: Sezonoj, 1988, p. 40-44.

# Kaj aldone – senmortecon

– Ĉu vi pretas, kapitano?

– Jes, profesoro, adiaŭ. Vi estas la lasta homo, kiun mi vidas en ĉi tempo. Kiel bone, ke oni komisiis dormigi nin al homo, sed ne al robotoj...

– Estas kialoj, kapitano. Por kio plian fojon riski je viaj grandvaloraj vivoj? Sur via vojo risko pli ol sufiĉos... – La profesoro mediteme fermetis la okulojn, poste embarasite rigardis kaj daŭrigis:

– Vi, kapitano, ne konsideru min banala kaj teda, sed mi vere estas ravita de vi kaj via ŝipanaro. Tricent jarojn tien, tricent reen. En la anabiozo<sup>1</sup>. Kaj dum tiu vojaĝo vi maljuniĝos je proksimume tridek jaroj. Tute nenion spertinte... Mi verŝajne ne flugus!

– Vanaj vortoj, profesoro, vanaj vortoj. Prefere diru, kiel oni sentas tiun anabiozon?

– Neniel. Kiam vi dormas kaj nenion sonĝas, ĉu vi sentas ion? Same la anabiozo. Profunda dormo sen sonĝoj. Nun vi ekdormos, kaj post tricent jaroj vi vekigĝos en ĉirkaŭaĵoj de Fomalhaŭto. Sed nun vi havas tridek jarojn, kaj vekigĝos 45-jara. Tio estas sendube la plej trista...

– Ho, estu trankvila, profesoro. Ŝajnas, ke vi ĉagreniĝas pli ol mi. Piku min pli baldaŭ kaj – ĉion plej bonan!

La profesoro nehaste prenis injektilon el solvaĵo, plenigis ĝin je rozkolora likvaĵo. Malgaje ridetis kaj proksimiĝis al Aleksio.

– Donu vian viran manon, kapitano!

Aleksio apatie donis la manon kaj forturniĝis; li ne emis rigardi, kiel oni trapikas lian haŭton.

---

1. Anabiozo. Provizora ĉesigo de la biologiaj procesoj (homeostato, metabolo k. a.) en la organismo, kun la eblo restarigi ilin. Kutime la ĉesigo okazas per malvarmigo. En la sciencfikcia literaturo ofte temas pri anabioza konservado de la homa organismo dum spacvojaĝoj.

Aleksio sentis, ke li vekigis, kvankam en la tuta korpo estas tia malforto, ke li ne povis eĉ malfermi la okulojn. Ĉu finiĝis la vojaĝo? Se vere estas tiel, la profesoro pravis. Fakte, tri jarcentoj pasis kiel unu minuto. Li falis en mallumon – kaj tuj vekigis.

Kiel antaŭe mankis fortoj por malfermi la okulojn. La tutan korpon io piketas kiel gambon post longa sidado. Tra la korpo kuras tien-reen varmaj ondoj. Tio daŭras sufiĉe longe. Ne gravas, dum la trejnado antaŭ la flugo okazis eĉ pli malagrablaj sentoj.

Finfine inter la palpebroj penetras netrudema verda lumo, Aleksio lan-  
te malfermis la okulojn. La unua bildo, kiun li vidis, estis la kliniĝinta super  
li vizaĝo de grizhara maljunulo, kiu apenaŭ rimarkeble ridetis. En la menso  
pigre movetiĝis maltrankvilo: de kie en la ŝipo aperis fremdulo? Sed en la  
favora vizaĝo de l' oldulo tute forestas io minaca, kaj Aleksio trankviliĝis.

Post unu minuto li povis jam leviĝi kaj eksidi en sia sarkofago.

– Kiu... – kun peno li eldiris.

– Ne penigu vin per demandoj, – interrompis lin la oldulo per milda gesto. – Vi ankoraŭ ne tute rekonsciigis. Vi volis demandi: kiu estas mi, kaj kiel mi aperis en la ŝipo? Tion vi baldaŭ scios, ankoraŭ ne venis la tempo. Kaj nun, dum via memoro ne estas plenigita de superfluaĵoj, bonvolu respondi mian demandon. Kion vi celis, flugante al Fomalhaŭto? Bonege pensu, antaŭ ol respondi, mi ne urĝas vin.

Aleksio impete moviĝis antaŭen.

– Ĉu efektive...

– Mi ja diris al vi: ne penigu vin per demandoj. Vi volis nun demandi: ĉu efektive, diablo prenu, mi opinias, ke vi sensekretigos la tutan programon de la flugo al fremdulo, kiu aperis diablo scias de kie kaj kiel? Ne, kapitano, pri la programo mi ne demandos, mi scias ĝin ne malpli bone ol vi. Mi volas demandi pri via persona celo.

– Ha, jene. Kaj nur por tio vi interrompis la flugon, ĉu? Nu bone, tion mi plezure diros al vi. Do jene, kara...

– Nomu min Metuŝelaĥo la Dua.

– Mi jenon diros al vi, kara... he... Metuŝelaĥo la Dua. Mi ne scias, kiu rajtigis vin interrompi la flugon, sed rilate al mia celo, ĝi estas sufiĉe rekta kaj nobla, kaj ni ne havas kaŭzon sekretigi ĝin antaŭ kiu ajn.

La maljunulo, kiu nomis sin Metuŝelaĥo la Dua, bonanime ekridetis, kiel ridetas instruisto post vigla respondo de lernanto, ke Volgo enfluas en Kaspion.

– Juĝante laŭ tio, kiel vi kondutas, – daŭrigis Aleksio, – la mastro en la ŝipo estas pli probable vi ol mi. Kaj mi, ŝajne, estas kaptito, same kiel la ceteraj ŝipanoj...

– Malĝustaj konkludoj, kapitano, – interrompis lin la oldulo. – Interparoli kun vi ne estas tiel facile, kiel ni komence opiniis. Trankviliĝu, Aleksio, mi ne eldemandos el vi ŝtatajn, militajn kaj ceterajn sekretojn. Tio jam delonge ne interesas nin. Mi estas... kiel laŭ viaj nocioj? Nu, ni diru: socia psikologo. Min nun interesas via persona celo de la flugo al Fomalhaŭto.

– Hm, mi vidas...

– ...ke mi ĉiujn viajn demandojn antaŭvidas anticipe kaj povus entute nenion demandi, vi eraras. Ni uzas por oportuno la telepation, sed legi ni povas nur tiun penson, kiun la homo mem volas diri. – Li iom silentis. – Jes, ĝuste tiel! Ĉio cetera estas persona sekreto.

– Dio mia! Ne faras mi iajn sekretojn. Sekretoj diversaj, personaj celoj. – Aleksion jam komencis tedi tiu vica antaŭfluga testo. – Mi diras ja al vi...

– ...ke via celo estas rekta kaj nobla. Mi scias. Vi nun diros tion, kion vi diris dum gazetara konferenco antaŭ la flugo. Mi legis tion.

– Sed kiu vi, propre, estas kaj kiu donis al vi rajton levi min el la ana-biozo?! – Aleksio saltleviĝis kun intenco defendi sin, la ŝipanaron kaj la ŝipon, sed tuj konfuzite stopis sin. La oldulo rigardis lin tiel klarokule, ke Aleksio eksentis sin kulpa lerneĵano.

“Pu! Kion mi?.. – li pensis, eksidante sur fotelon. – La oldulon mi volis ataki per pugnoj. Ĉu povas tiu oldulo intenci ion malbonan? Laŭ liaj okuloj ĉio ja videblas...”

– Vi pravas, – konfirmis la oldulo kaj ridetis. – Mi volas por vi nur bonon. Kaj ne nur por vi. Ho, se vi scius... Nu, ne gravas, baldaŭ vi ekscios, por tio mi ĉi tien venis. Kaj dume ni interkonsentu nur pri unu aĵo: ni plene fidu unu la alian. – La vizaĝo de l’ oldulo iĝis serioza. – Do, ni interkonsentis, mi kredas ĉiun vian vorton, kaj vi elĵetos el la kapo viajn ĵudon kaj karateon. Des pli ke ili ne helpos vin.

– Des pli ke ne helpos... Ĉu via opinie tio estas egalrajteco?

– Nu, sufiĉas. Ni komencu la aferon. Ne konvenas al vi tia infana obstineco.

– Jes, mi komprenis, ke kun vi tiaj umoj ne eblas, – pace konsentis Aleksio. – Do, mi aŭskultas vin. Komencu, sagaculo.

– Do, – la oldulo oportune kunmetis la manojn sur la brusto, – por kio

vi flugis al Fomalhaŭto? Ne forgesu, ke vian intervjuon por gazetoj mi legis, kaj aŭskulti ĝin duafoje mi ne havas deziron.

Aleksio ridetis. Provu kompreni, kion ili volas ĉi-foje. Dum la jaroj de antaŭfluga preparo li pasigis centojn, eble milojn da diversaj testoj; ŝajnas, ke ili ekzamenis ĉion, kion nur oni povas imagi. Por ĉiu ŝipano estis po kvin dublantoj, por la kapitana posteno – dek. Kion ankoraŭ testi, se la flugo jam komenciĝis? Stop! Ĉu ĝi komenciĝis? Kvankam la motoroj zumas, sed oni povas imiti ion ajn, kaj la motorzumadon – ĉu problemoj? Kaj kiu scias, kiom da dublantoj vere estis? Eble estis dekoble dek. Hm, apenaŭ mi sukcesos diveni, kion ili volas, kaj diri iun ruzaĵon mi ne povos. Ili ja rigardas rekte en la animon: ĉu ĝi taŭgas por kapitano? Por kio vi tien flugas? Eble vi havas celon bagatelan, neindan? Kaj ne eblas longe pensi, tiu homo ja atendas respondon aŭ eble anticipu supozas ĝin. “Ni, – li diris, – uzas por oportuno la telepation”. Ĉi tie elĵeti ion nepripensitan estos stulte.

– Ĉu vin interesas mia celo? – lante diris Aleksio, pli por prokrasti la tempon. – Demandu pri tio miajn dublantojn. Sed ĉar vi elektis min, do, mia celo estis pli altspirita.

La oldulo grimacis.

– Mia kara kapitano, vi sufiĉe pajacis. Ni ja interkonsentis komenci la aferon. Ĉio ĉi estas tre serioza. Mi povas diri al vi, iom anticipu, ke de via respondo dependas la estonteco de la tuta homaro.

“Dankon pro la konsolo, – negaje pensis Aleksio. – Ĉio iĝis maksimume klara”.

– Nu bone, se temas pri la estonteco de l’ homaro, mi penas, – li diris kun intenca seriozeco. Kaj por si mem li decidis, ke plej fidine estos fidi la intuicion. Se ili volas palpi la animon, ili palpu. En lia animo estas nenio hontinda, ordinara estas lia animo, sufiĉe homa.

– Bone, – li ripetis, – se vi volas tiel skrupule, mi devos komenci de tre malproksime. Eble vi konsideros tion sentimentala aŭ naiva, sed mia celo komenciĝas de l’ infanaĝo.

La oldulo levis sian rigardon, plenan de malbone kaŝita scivolemo, kaj vigliĝante kapsignis: daŭrigu.

– Mi ne opinias, ke tio estos interesa por vi. Al ĉiu estas kara lia propra infanaĝo. Kaj la fremda... Sed se vi opinias, ke vi tiel bezonas tion, do aŭskultu. Nu, kiam mi estis jen tia etulo, – Aleksio montris iomete pli alte ol la fotela brako, – nia dometo staris sur la rando de l’ vilaĝo. Post nia barilo

el du stangoj komenciĝis herbokampo, post ĝi – rivero, kaj post la rivero sur la horizonto bluis arbaro. Jen tiu blua strio ekde tiam min altiras. Kaj nia vilaĝo delonge ne ekzistas. Mi vizitis antaŭ la flugo ĉi tiun lokon – tritika kampo, kvazaŭ neniam mi tie vivis. La vilaĝanoj disveturis: unu pro enuo, alia – por riĉa vivo, tria – por gloro. Kaj mi, ĉu vi kredos aŭ ne, por tiu strio de l' horizonto. Ĉio estis por ĝi: kaj aviadista klubo, kaj pilota lernejo, kaj kosmodromo<sup>1</sup>. Sed Fomalhaŭto, vi mem komprenas, estas la maksimuma revo. Jen, ekzemple, nia ŝipanaro: ĉiu flugas por prospero de sia scienco. Kaj al mi ŝajnas, ke al nia planedologo estas tute indiferente, ĉu ekzistos tie intelektaj estaĵoj, por kiuj flugas nia ksenologo<sup>2</sup>. Tiaj ili estas, fanatikaj stranguloj. Sed mi ne tute kredas al ili. Verŝajne ĉiu krom tiun celon, kiun ili diris al ĵurnalistoj, havas ankoraŭ sian propran, profunde en la animo. Mi flugas por la flugo mem, por tiu strio de l' horizonto. Kaj malkiel miaj fanatikaj kunuloj, al mi sur Fomalhaŭto estos interesa absolute ĉio. Tio estas por mi vojaĝo. Nia samlandano Prjevalskij<sup>3</sup>... – Aleksio rigardis la oldulon por konvinkiĝi, ke tiu aŭskultas sufiĉe atente.

– Bonege, bonege! – vigliĝis la oldulo. – La heredaĵon de Prjevalskij ni ne lasis sen atento, ni studis ĝin.

– Por mi tiu flugo estas la vojaĝo, kiun konsideris Prjevalskij, dirinte, ke la vivo estas bonega ankaŭ pro tio, ke oni povas vojaĝi. Nu, kiel, ĉu vi estas kontentigita?

– Verŝajne, – mediteme diris la oldulo. – Kaj kiel vi konsideras: kiam vi vizitos Fomalhaŭton kaj revenos sur la Teron, ĉu estos plenumita la celo de via vivo?

Por unu minuto la okulojn de l' kapitano vualis ombro de profunda malgajo.

– Mi bedaŭras, certe, ke mi ne sukcesos flugi ankoraŭ ien. Kiam mi revenos, mi estos sesdekjara. Apenaŭ mi flugos plu... Sed por tiu flugo – indas! Viziti Fomalhaŭton! Tute ne ĉiu sukcesas viziti alian kontinenton dum sia vivo. Sed Fomalhaŭto!.. Por tio indas elspezi la vivon!

Inter la brovoj de l' oldulo aperis profunda falto.

---

1. Kosmodromo. Spachaveno, t. e.: flughaveno por spacoŝipoj.

2. Ksenologo. Kosmobiologo, pli malvaste: fakulo pri eksterteraj inteligentaj estaĵoj.

3. Prjevalskij, Nikolaj Miĥajloviĉ (Пржевальский, 1839-1888). Ruslanda natursciencisto, geografo kaj vojaĝanto, fama pro la ekspedicioj en Centra Azio, Ĉinio, Mongolio kaj Tibeto.

– Mi estas eksterordinare kortuŝita, – li lante diris. – Ĉio estas iel ne atendita... kaj informplena. Tio estas verŝajne la bezonata...

“Sed kiu bezonas, kaj por kio, estus interese scii, – pensis Aleksio. – Tamen li estas stranga homo, mi ja ne diris ion neordinaran. Informplena, li diras”.

La oldulo ĉesis falti la frunton, lia vizaĝo kvazaŭ ŝtoniĝis; li diris:

– Nun la plej malfacila demando. Vi longe hezitis pri supozoj: kiu mi estas, kaj kion ĉio ĉi signifas? Tio signifas jenon. Ĝis Fomalhaŭto restis relative proksime. De kiam vi forflugis de la Tero, tie pasis jam 250 jaroj. Dum tiu tempo ni lernis flugi al steloj multe pli rapide, ol en via jarcento. La homaro ne plu bezonas vian flugon. Se homoj ankoraŭ ne vizitis Fomalhaŭton, ili vizitos ĝin je la plej proksima oportuna tempo. Ni povas tuj revenigi vin sur la Teron. Mi volas scii, pri kio vi intencas tie okupi vin?

Dum la parolado de la oldulo, Aleksio sidis, entirinte la kapon en la ŝultrojn. Li havis tian senton, kvazaŭ sur lian kapon oni verŝus kelkajn site-lojn da glacia akvo, sed pro tio ne iĝis malvarmege, sed tute male.

– Haltu do! – finfine kriis Aleksio. Li saltis de la fotelo kaj komencis nerveze paŝi tra la kajuto. – Tamen tio estas kruela. Ĉu tie en via estonteco, se ĉio ĉi estas reala, ĉu vi ĝis nun ne lernis esti humanaj? Donu al mi la eblecon trankvile ĉion pripensi. – Li per grandaj paŝoj iradis el unu angulo en la alian, ĉirkaŭpreninte la ŝultrojn per la manoj. Nun jeno estas la plej grava...

– Bone, estu tiel. La ŝipanaron ni dume ne vekos. Kion fari plu, ni devas nun decidi duope.

– Atendu. Mi ankoraŭ ne povas kredi. – Aleksio daŭrigis sian ekscitan paŝadon. – Do, vi estas terano, kaj sur nia panjo-Tero nun estas... he-e... la 24a jarcento, ĉu?

– Ĝuste tiel!

Aleksio eksidis sur la fotelon, apoginte la frunton per la mano.

– Oni pretigis min al tio antaŭ la flugo. Sed jen, dum momento... la 24a jarcento!.. – Li konsternite skuis sian kapon. Poste li zorgeme demandis:

– Kiel fartis la Tero post ni, ĉu okazis la tria mondmilito?

– Nu, certe ne! Al tiu stultaĵo delonge estas metita fino. La lasta kano-no sur la Tero estis refandita, eble, dudek jarojn post via forflugo. La vortoj “milito”, “armilo” estas por ni tia sama historio, kiel la egiptaj piramidoj. Same pri la nocioj “limoj”, “ŝtatoj”. Nacioj tamen ankoraŭ tradicie ekzistas,

sed ĉefe en la sfero de la spirita kulturo, ne pli. Multaj ŝatas legi antikvajn librojn en naciaj lingvoj. Ekzistas multaj societoj por konservado kaj renaskiĝo de ĉiuj eĉ malgrandaj etnolingvoj, sed entute sur la Tero estas unu artefarita lingvo, ĉiuj komprenis, ke tio estas pli simpla. Ĉe ni tute ne ekzistas internaciaj rilatoj kaj la problemo de milito. Sed ni havas problemon multe pli seriozan.

– Vi ŝercas!

La oldulo negaje ridetis.

– Eble vi opinias, ke oni sendis min ĉi tien por amuzi vin per trivialaj ŝercoj? – li respondis per demando. – Jes, mi ripetas, ke nia problemo estas multe pli serioza, ol la problemo de milito. Ĉiu tempo havas siajn problemojn. Kaj ju pli aĝa estas la homaro, des pli seriozaj estas ĝiaj problemoj. Vi ne scias, kiel meti finon al la militoj, kaj ni ne scias, kion fari pri nia senmorteco...

– Pri ki-io?

– Jes, pri tio mi ankoraŭ ne diris al vi. La homo ĉe ni estas senmorta.

– Hm, inkluzive vin? – nekredeme demandis Aleksio.

– De kie estas via malfido, kapitano?

– Nu, vi estas tia... grandaĝa. Miaopinie...

– Grandaĝa? – La oldulo unuafoje sincere ekridis. – Nu, ridigas vi... Kion signifas “grandaĝa” por la senmorta ulo? Kaj mia ekstero... Ĉiu havas tian eksteron, kian li aŭ ŝi bezonas. Mi bezonas por mia laboro la eksteron, kiu sugestas fidon.

“Estas vero, fidon la oldulo sugestas”, – Aleksio ridetis.

– Do jene, – daŭrigis la oldulo, – ni estas senmortaj. Komence ni ĝojis pri tio, ni estis ebriigitaj, blindigitaj, sed poste ĉio pasis, kaj nun ni ne scias, kion fari plu. Morta sopiro. Senelirejo. La evoluo haltis. El la beletro ni scias, ke antaŭe ekzistis la nocio: celo de la vivo. Por ni ĝi ne havas sencon. Ne estas tiaj celoj, kiuj bezonus la tutan vivon, daŭrantan eternecon. Kaj pli malgrandajn celojn oni povas prokrasti je iu ajn tempo. Post iom da tempo ili forgesiĝas, aperas novaj celoj, kiujn same oni povas prokrasti, kaj tiel dum la tuta senfina vivo...

– Ĉu vi tion... tute serioze? – ŝokite diris Aleksio.

La oldulo senhelpe gestis kaj nenion respondis.

– Diable! Mi ne imagas, kiel oni povis veni al tio. Ja ni en la 21a jarcento alte valorigis ĉiun horon, donacitan de la naturo. Ni sentis, jes, ni fizike sentis, kiel ŝutiĝas, ŝutiĝas tiu malbenita sablo. Ĉu vi vidis sablorhorloĝon?



Idiote simpla umo: du globetoj kaj sablo. Kaj tiu sablo ĉiam elŝutiĝas kaj elŝutiĝas. Vi povas hurli kiel lupoj pro sopiro, sed la sablo malmultiĝas kaj malmultiĝas...

– Bonege! Plejkarulo mia! – La oldulo kun larmoj en la voĉo brakumis Aleksion. – Vi!.. Vi savos la homaron! De tiu senfina agonio, de tiu sata kaj sencela ekzistado! Oni portos vin sur la brakoj! Oni starigos viajn bustojn en ĉiu urbo! Ĉu vi sentas sufiĉe da fortoj en vi?

– Fortoj? – malcerte eldiris Aleksio. – Ĉu sole mi kontraŭ la tuta homaro?

– Kial sole? Viaj kunuloj en la ŝipo, ŝipanaroj de aliaj stelŝipoj, kolektiĝos kelkaj centoj da homoj. Ĉu vi scias, kion ni faros? Ni inaŭguros sciencajn-esploran instituton de la celo de l' vivo. La plej ĉefa aĵo estas viaj deziro kaj konsento. Nu, ĉu vi konsentas?

– Diablo prenu! Por kio longe paroli? Memkompreneble, mi konsentas. Tiel sentalente oni elspezas la vivon!.. Kaj tio estas ja miliardoj da homoj. Mia koro sangas nur pro tiu penso. Jes, ni instruos vin vivi! Jen nur...

– Jes, jes. Aliel ne povas esti! Vi estas ja la plej grandaj bonfarantoj en la historio de la homaro. Nature, ankaŭ vin ni faros senmortaj...

Korotkov M. *Homo kiu mortigis*. Sverdlovsk: Sezonoj, 1988, p. 55-62.

# Sen hejmo, sen familio

En la infanaĝo Ĵorka volis iĝi maristo, samkiel la patro, kiun li neniam vidis en sia vivo. Poste, kiam Ĵorka iom kreskis kaj eksciis, ke lia urbo malproksimas de maro, kaj dum marvojaĝoj li monatojn ne vidus la patrino, li decidis iĝi piloto. Sed la patrino, kiu devis labori anstataŭ ambaŭ gepatroj, malatentis la kompanion, al kiu ŝia filo aliĝis, kaj ne fininte la lernejon Ĵorka trafis en porinfanan malliberejon "kolonio". Reveninte el la kolonio li renkontis siajn malnovajn amikojn, kiuj eldiris al li iujn malnovajn ofendojn, kaj post kelkaj monatoj Ĵorka estis kondamnita pro pugnobatalo.

Li liberiĝis havante dudek ok jarojn kaj revenis en la naskiĝurbon. Verdire, por li ne gravis, kien li revenu. Dum lia okjara foresto la patrino mortis pro malĝojo kaj troa laboro. Renkontiĝi kun la amikoj li ne volis. Ankaŭ pro la tegmento ne indis reveni: la malnova kabano, en kiu li loĝis kun la patrino, tiel oblikviĝis, ke ĝia riparo kostus pli multe ol aĉeto de nova domo.

Ĉirkaŭ unu monaton Ĵorka loĝis en tiu ruino kune kun Ozimaj. Tiel oni nomis la oldulon, kun kiu li liberiĝis samtage. La oldulo estis sola, tial Ĵorka prenis lin al si. Ĉu Ozimaj estis vera aŭ moka nomo, Ĵorka ne sciis. Foje Ozimaj forveturis en alian urbon, kvazaŭ por vizito al foraj parencoj, kaj ne revenis.

"Ha, diablo lin prenu, – decidis Ĵorka. – Nur plia ŝtono premis la animon". Ozimaj estis malagrabla oldulo. Li emis leviĝi, kiam Ĵorka ankoraŭ dormis, foriri, vagaĉi tra la urbo. Vespere li revenis ebrieta kaj kunportis botelon. Ili trinkis kune, kaj Ozimaj komencis nazparoli:

– Aĥ, Ĵorka, kiu nun nin bezonas? Mi rigardas: oni havas infanojn, nepojn, ian ĝojon...

La samo ripetigis ĉiutage. Ebriiĝinte ankoraŭ pli forte, Ozimaj komencis paroli, gestante inteligenciane kaj aktore:

– Imagu, Georgij<sup>1</sup>, hodiaŭ mi vidis senhejman hundon.

---

1. Ĵorka estas unu el la diminutivaj formoj de la nomo Georgij.

En tiu loko de la rakonto Ozimaj falis sur la tablon, kaj lian ostecan korpon skuis obtuza plorego.

Do, kiam Ozimaj ne revenis de siaj parencoj, Ĵorka nur ĝojis. Li pripensis siajn pasintecon kaj estontecon kaj decidis, ke al la mizera stato, kiel tiu de Ozimaj, li neniam venos. Por ne suferi en la maljunaĝo, li devas de sia junaĝo kutimiĝi al sia nebezonateco.

Baldaŭ li trovis bonan oficon: tombeja gardisto. Ĉe la tombejo estis gardista dometo – negranda, sed bone ĉarpentita kabano. Sian malnovan domon Ĵorka vendis kiel brullignon, prenis ĉe najbaroj la nenecesan por ili hundon Maksimka, kaj komencis vivi laŭ sia programo. Ĝuste tiel li planis: trovi bagatelan laboron, sed ĉe ĝi nepre estu dometo, kaj vivi malrapide, kutimiĝante al la soleco. Matene li dormis ĝis kiam lin boje vekis Maksimka – venis klientoj. Ĵorka kondukis ilin sur liberan teritorion de l' tombejo, proponis lokon, kaj okazis proksimume jena konversacio:

“Homo, aŭskultu, ĉu vi primokas nin? – indignis la kliento, – kion vi proponas, ja ĉi tie estas nur ŝlimejo”. – “Mi mem scias, ke estas ŝlimejo. Kaj ĉu vi volas paradizan anguleton? Mi havas la planon, vi devas kompreni tion”. – “Aŭskultu, junulo, mi pagos al vi, nur trovu, je Dio, ion pli bonan. le ekster la plano”.

Oni pagis nemalbone. Fine de la labortago Ĵorka aĉetis botelon da vodko aŭ du botelojn da vino, cigaredojn *Belomor*, ĝis la noktomezo li ĉion fortrinkis, kaj la sekvan tagon la vivo daŭris, kiel hieraŭ...

Tiel estis ankaŭ dum la tago, pri kiu ni parolas.

Maksimka ekbojis, tintigante la ĉenon. Ĵorka eliris kaj enpelis la hundon per piedbato en la budeton. Li kelkfoje turnis la kapon, forpelante la dormon, sentis malagrablan sekecon en la buŝo. “Monerojn mi bezonas”, – li apatie pensis kaj kondukis la klientojn al la multfoje provita loko. Unu el la venintoj, junulo, samaĝa kun Ĵorka, komencis obstini: “Ĉu vi scias, kiun ni enterigas?! Aĉa porko!” Sed la alia, nejuna viro, rapide komprenis. Nenion klarigante, li donis du ruĝajn monpaperojn kaj diris: “Mi petas vin, trovu la plej bonan lokon”.

Vespere Ĵorka unu rublodekon elspezis kaj la alian ŝparis por “ekstrema okazo”. Ja okazis tagoj, kiam li nenion perlaboris.

El tiu epizodo Ĵorka komprenis nur, ke mortis iu meritulo.

Ankaŭ la sekva tago estis ordinara. En sia evento-malplena laboro Ĵorka vidis ĉiajn entombigojn. Tiutage, kvankam estis pli da homoj ol normale, kaj paroladoj pli longis, ĉu tio devis concerni Ĵorkan?

Eksterordinaraj estis la dua, tria kaj kvara tagoj post tiu entombigo. Al la modesta ŝtonplato venis kaj veturis homoj. Ili estis, verŝajne, ne malpli multaj ol en la sepulta tago. Ili venis grupe kaj unuope. Multaj havis dorso-sakojn, probable ili ĵus venis per trajno. Ili venis, ŝajne, el diversaj lokoj, sed multaj estis konataj, aliaj konatiĝis senpere ĉi tie.

La novaj venintoj dum iom da tempo silente staris ĉe la tomboŝtono, poste iris flanken, nelaŭte, sen ekkrioj kaj komplimentoj, salutis konatojn, konatiĝis. Viroj kaj virinoj, junaj kaj oldaj: ĉiuj estis, nekompreneble per kio, similaj unu al la alia.

Iu junulo brave venis per motorciklo, lasis ĝin flanke kaj vigle paŝis al la tombo, demetante sian kaskon dum la irado. La motorcikliston renkontis kelkaj mallaŭdaj rigardoj, kaj iu viro vokis lin per fingro kaj duonvoĉe ion komprenigis al li. La junulo kulpokonscie gestis, reiris al sia motorciklo kaj sen funkciigi la motoron, kondukis ĝin for.

Iuj venis por nelonge, ili metis sur la platon bukedon el kelkaj floroj, staris kapokline unu-du minutojn kaj rapidis al siaj aferoj. Tiuj estis uloj striktaj, en nigraj kompletoj kaj kravatoj, sed ili ne multis. Plimultaj venis por kelkaj horoj, renkontiĝis kun malnovaj amikoj, longe nelaŭte parolis aŭ silente sidis, mordante herberon kaj rigardante ien en la spacon.

Venis difinita horo, kelkaj homoj nehaste ekstaris, adiaŭis la novajn kaj malnovajn amikojn, la homon, kiu kuŝis sub la ŝtona plato, kaj ĵetinte surdorsen sian sakon foriris, ŝajne, al la stacio. Aliaj restis ĝis la vespero.

Ĵorka longe ne povis kompreni, kion ĉio ĉi signifas. Li jam delonge kutimigis sin miri pri nenio, tiel ĉiam pli facilas mastri la situacion. Sed tia kvanto de l' parencoj mirigis eĉ lin.

En la unuaj du tagoj li eĉ ne atribuis signifon al tio, ke la tombejo estas tro homamasa. Nur la trian tagon li enpensiĝis: nu, bone, parencoj estas parencoj, sed el kio, diable, tiom? Estas tamen kurioze, kion tio, finfine, signifas? Sed li ja ne povis eliri kaj demandi: "Civitanoj parencoj, de kie vi venis tiomope?" Nur la lasta kreteno farus tion.

Ĵorka staris inter la arbustoj, silente observis la eventojn, nehaste konsideris ĉion. Ahem, oni ĉiam venas. Preterkuris la penso: se mortus li, Ĵorka, aŭ Ozimaj, kiuj venus por enterigi ilin? Parencoj malestas. Amikoj? Amikoj... Ĉu povas esti, ke ĉiuj, kiuj nun estas en la tombejo, estas ne parencoj de l' mortinto, sed nur amikoj? Komence la penso ŝajnis al li absurda, sed poste li decidis, ke la venintoj pli similas amikojn, ol parencojn. Kaj subite li komprenis: certe ĉi homoj estas ne parencoj. Eĉ se la homo vivus

ducent jarojn, li ne havus tiom da parencoj. Ili estas la homoj, al kiuj la mortinto estis kara. Ili bezonis lin. Eble li estis kuracisto kaj redonis la sanon al ili ĉiuj. Aŭ instruisto, kiu instruis al ili kiel iĝi maristoj aŭ pilotoj. Aŭ aktoro. Unufoje Ĵorka vidis veran aktoron. Tiu povis paroli tiel, ke la aŭskultantoj volis samtempe kaj plori kaj ridi.

Ĵorka pri nenio demandis la homojn, kiuj plu venis por iom sidi ĉe la ŝtona plato. Li revenis al sia dometo, eksidis sur randon de l' sojlo kaj brakuminte la kolon de Maksimka, troviĝinta apude, li – verŝajne unufoje en la vivo – ekploregis.

*Sezonoj, 1988, №17, p. 8-10.*

# Kaliko amara

Vivo de l' homo, kaliko amara.

*Guo Moruo*

En tiu urbo neniam estis kontentigaj tavernoj. Tiel estis antaŭ dudek jaroj, tiel estas ankaŭ nun. Antaŭ dudek jaroj estis verŝajne eĉ pli bone. Kaj nuntempe aperis diversaj movadoj. Ni volas, ili diras, vidi nian socion sobra. Kaj ili tiel penis, ke ĉiujn bonajn vinejojn, kie mi dum la junaĝo anime ripozis, oni translokis en limkvartalojn. Do, jen rezervejo por vi, kiuj ne povis adaptiĝi al nia sobra vivo. Mi demetas la ĉapelon antaŭ vi, sinjoroj sobruloj, sed mi estas ĝuste el tiuj, kiuj ne povas adaptiĝi. Kaj ne adaptiĝos.

Fi, kia diablaĵo aperas en la kapo.

Nun tio jam tute ne gravas. Kiel mi antaŭe vivis, kiun estimis, kiun disdegnis, nemerite amis aŭ eble iun nemerite malamis. Ĉio estas vantaĵo de vantaĵoj kaj sopiro de l' spirito.

En tiu drinkejo oni ne permesas kunporti vinon, sed al mi hodiaŭ, mi opinias, ĉio estas permesita. Tial, kiam mi plenverŝas pokaletan, mi ne tre kaŝas min. Rigardu, la homo malkaŝe drinkas, lastfoje hodiaŭ je tio ankaŭ vi kulpas. Ne povas li plu resti kun vi, tiu homo. Jen vi, ekzemple, ĉu ne kulpas? Vi kulpas nur pro tio, ke havas tian memkontentan fizionomion, kiam homo apude estas devigita meti la lastan punkton.

Mi timas certe tiun lastan punkton. Ŝajnas, kion povas timi homo, kiu decidis foriri? Sed... Mi dum la tuta vivo timis doloron. Kaj propran, kaj fremdan. Eble tio alkondukis min al la lasta limo. Estas ja homoj, kiuj kraĉas sur ĉion; ili iras tra la vivo piedpremante per siaj krudaj botoj same indiferente florojn, ostojn, kraniojn.

Mi ne akceptas tiun mondon. Finite. Jen mi havas post la zono pistolon kun sola kartoĉo, nun mi devas drinkegi por ne plu senti ian doloron aŭ timon. Kio estos tie, mi ne scias, je ĉiuj ĉi kaldronoj kun peĉo mi ne kredas, kia infero povas esti pli terura ol tiu ĉi valo de larmoj.

Kaj tamen tiuj servistoj de l' ordo ne permesos al la homo lastfoje tran-  
kviligi la koron. Eĥ, homaĉoj, trompi vin estas facila afero. Tio estas farata  
elemente. Oni kaŝas pokaleton sub kovrilo de tablo, kaj neniu vidas, kiel  
oni enverŝas el la poŝo...

– Pardonu, mi opinias, ke tiu loko estas libera?

De kie diablo lin alportis? Jes, vere, en la drinkejo estas interpuŝiĝo, sed  
mi sidas ĉe la tablo sola. Ne povis mi diri, ke ĉi tie estas okupite, en menso-  
go mi neniam sukcesis. Bonvolu, mi diras, bonvolu. Diablo, kiu li estas? Mi  
povas veti je la kapo, ke mi neniam lin renkontis, sed la fizionomio estas ek-  
streme konata. Kaj en la mieno estas io tiel parenca, ke li tuj al mi ekplaĉis.

– Aŭskultu, amiko, – li diras, – ne kaŝiĝu de mi. Se la sorto nin renkont-  
igis... Eĥ!.. Ĉu vi ne rememoras, kie ni antaŭe renkontiĝis?

– Verŝajne ĉi tie, – mi diras, – kvankam mi ne estas ĉiamulo ĉi-loke.

– Nur ne ĉi tie, – li respondas. – Mi hodiaŭ estas en via urbo unuafoje.

– Ah ha... – mi diras. – Jes. – (Malbenita ebrieco!) Nur nun mi rimarkis,  
ke li similas min kiel du gutoj da akvo. Kvazaŭ mi rigardus spegulon.

Neniam mi tion renkontis, kial okazis renkonti ĝuste hodiaŭ? Ĉu an-  
taŭsigno de la ĉielo aŭ de l' infero?

– Kompreneble, – mi diras. – Vi estas mia sozio, ĉu? Mi legis en libroj,  
ke tio eblas, sed jene en la vivo – unuafoje...

– Ankaŭ mi unuafoje, ne ofte la sorto dorlotas min per tiaj eventoj.  
Jes... – li ridetis, kiel al mi ŝajnas, patrece. – Vi certe ne povis tion antaŭvidi,  
sed mi tion antaŭvidis...

Laŭ liaj malseketaj okuloj mi komprenis, ke li jam ie drinkis antaŭ ol  
veni ĉi tien.

– Ni scias pli multe ol vi, – li daŭrigis same patrece ridetante. – Ni scias,  
ke iufoje ni renkontiĝas kun vi. Sed tio okazas tiel malofte kaj kun tia dife-  
renco de aĝoj, ke kutime oni tion ne rimarkas. Nek ni nek vi.

– Ĉu vi ne povas eldiri pli kompreneble?

– Ni renkontiĝas iufoje, mi diras. Sed neniu tion rimarkas. Foje oni ren-  
kontas sin en infanaĝo, foje dum maljunaĝo. Kaj oni preteriras. Sed tio ne  
decus... Ne sufiĉas en mi kompato, humaneco aŭ diablo-scias-kio... Sed  
mi kaj vi tamen renkontiĝis. La plej rara okazo. Kaj la aĝoj estas proksim-  
ume samaj, kaj la tago hodiaŭ estas tre neordinara.

– Neordinara? Ankaŭ por vi, sinjoro?

– Ne nomu min "sinjoro". Ni estas ja pli ol fratoj. Ĉu vi nomas ankaŭ  
vin mem "sinjoro"?

Mi prenis el paketo, kuŝanta antaŭ mi, unu cigaredon kaj rimarkis, ke li agis same.

– Vi demandis: ankaŭ por vi? – li daŭrigis. – Mi komprenas, ke demandi en tiaj okazoj estas sentaktecio, sed mi ne tute komprenis, kial “ankaŭ”.

– La demando reale estas ekstreme sentakta, – mi diris. – Sed mi jam komprenis, ke vi estas anĝelo aŭ diablo, veninta por mia animo, tial vi rajtas demandi min pri ĉio.

Li sidis iom, apoginte la frunton per la polmo.

Finfine li diris:

– Kaj mi, olda stultulo, opiniis, ke mi scias ĉion. Sed vi ĉi tie havas, kiel evidentiĝas, multegon da ĉio...

– Olda? Sed mi ne dirus, ke vi estas pli maljuna ol mi.

– Ne, junulo, vi eĉ ne povas imagi, kiel maljuna mi estas... Mi povas diri al vi por kio vi venis hodiaŭ ĉi tien. Por la samo, kiel mi. Por ĝui ĉion ĉi lastfoje kaj por ke ne estu doloro poste...

– Aŭskultu! Tio ne estas via zorgo!

– Jes, ne mia. Preskaŭ same kiel ĉiuj tie, – li montris per la polekso la halon post la dorso, – ne havas eĉ etan zorgon pri vi. Sed, – li paŭzis. – Ili ne havas, sed mi havas.

– Diru, kion vi volas de mi, kaj ni adiaŭu pli rapide.

– Ni ne devas hasti. Tia renkonto okazas eble unufoje dum mil jaroj. Kaj tio eble estas motivo por rekuraĝiĝi, kvankam vi kaj mi estas perditaj homoj.

– Komprenu, kara sinjoro, al mi tedis via babilado, samkiel ĉio alia...

– Ankaŭ al mi tedis... ĉio alia. – Li enpenŝiĝis, entiris la tabakfumon kaj lace elspiris fumstrion. – Sed eble ankoraŭ io restis en ni. Mi vivis... he... ne pli longe ol vi, sed pli mature, tiel mi diru... Aŭskultu! – Li kaptis mian brakon. – Ni povas ja multon rakonti unu al la alia! Vi, stultulo, nenion ja komprenas! Vi ne estis ankoraŭ en nia vivo.

Li forlasis mian brakon kaj sopirĝemis, esprimante per sia aspekto senfinan malesperon. Poste li iom retransviliĝis.

– Malsaĝulo. Vi ankoraŭ multon ne komprenas. Kaj jam decidis... Hm! – Li iom silentis, poste lia vizaĝo subite eklumis per iama patreca kareso. – Mi ja ĉion pri vi scias. Malsaĝulo. Jen tie post la zono vi havas pistolon, kiu devas meti la lastan punkton. Tie en via estonteco vi jam nenion vidas. Tial – sola elembarasigo: paf-paf. Eĥ, stultulo. Se vi sciis, ke nur tie komenciĝos vera vivo. Sed mi havas antaŭe planan negativecon. Kvankam... Vi mem komprenas, ke mi ankoraŭ ne estis en via situo, kaj povas nur konjekti...



– Do, vi estas de tie, ĉu? – mi demandis, ne tute komprenante la sencon de mia demando.

– Nature! Kion mi penas dum longa horo komprenigi al vi! Vi kaj mi estas sozioj, sed ni vivas en diversaj direktoj de l' tempo. Via estonteco estas mia estinteco kaj male.

– Ah ha... – mi diris, plene konsciante, kian stultan mienon mi nun havas.

– Jene. Mi scias, ke vi venis same kiel mi ĝis la lasta limo. Kaj ni kvazaŭ ne havas ion por preparoli. Antaŭe estas malpleno...

Li ĵetis la fingrojn en la hararon kaj kunpremis la dentojn. Lia vizaĝo esprimis absolutan abomenon al ĉio, kio estis, estas kaj estos.

– Sed... – Li malfacile ridetis. – Vi komprenas; io tamen detenas min... De la lasta paŝo. Eble vi rakontos al mi, kio estas tie?

– Jes, plene eblas. Mi ĉiam volis renkonti iun, al kiu mi povus ĉion rakonti. Mi ne renkontis en la vivo homon, al kiu mi povus rakonti *ĉion*.

– Jen mi estas ĝuste tia. – Li iel supertere ridetis.

– Vi komprenas, kiel malfacila tio estas, precipe apud tiu limo...

– Al diablo ĉiujn ĉi limojn! Ni estas dume inter vivantoj. Ni trinku.

– Jes, ni trinku, – mi diris. Li tuj iĝis por mi pli surtera.

Nur kiam ni trinkis, mi komprenis, kion li volas.

– Ne estas simple, – mi diras, – ĉion ĉi rakonti. Kaj ĉu mi estas rakontanto? Mi pli kutimiĝis labori per peniko, vi mem scias. Mi komprenis, ke vi ankoraŭ ne estis tie, kie mi estis. Kaj mi memoras ĉion ne tre klare. Al mi ĉio ĉi estas certe amata, sed kiel ĝi estos al vi?

– Kio, kio estas amata al vi, rakontu!

– Nu, mi memoras min mem, eble kvinjaran, tian lignan dometon, ĝi havis pardonon el tavolligno.

– Ĉu vere? Ligna dometo? Rakontu plu!

– Jes. La pordo el tavolligno. Ne pro bona vivo, certe. Kaj ankoraŭ ion mi memoras. Ĉiutage al mia patro venis najbaroj. Por iom fumi kaj babili. Kaj dum feriaj kaj festaj tagoj ili trinkis rumon kaj...

– Dancis?! Ĉio ĉi tie estis?

– Estis, estis, kaj ne nur tio. Tie estis multe da ĉia kretenismo. Ankaŭ dancis. Aŭ jen ankoraŭ: oni ebrigiis du kokojn kaj kunbataligis ilin. Poste oni staris ronde kaj gapis, kiel flugis la plumaro. Kaj aliaj tiutempe ie en mallumaj anguloj brakumis fremdajn edzinojn. Kaj poste komencis unu al alia bati muzelojn. Tiutempe al mi ŝajnis, ke en tio estas ia profunda senco,

nekomprenebla por la bubo. Sed nun mi vidas, ke en tio ne estis senco eĉ por unu kupra groŝo. Sopiron ili havis kaj ne sciis, kiel ĝin dispeli... Oh ho ho... Tiu sopiro estas verŝajne la ĉefa kaŭzo, kiu kondukis min ĉi tien.

– Hm-m... – Li unuafoje ridetis, kiel al mi ŝajnis, vivoplene. – Jes, lumstrio... Tio estas lumstrio, junulo. Ne konsideru min tedulo, sed mi ripetas. Vi ankoraŭ ne estis tie, kie mi estis. Ni venas en la mondon instruitaj de sperto de ĉiuj niaj antaŭuloj. Aperinte, ni scias jam preskaŭ ĉion. Malfacilas eĉ diri, kion ni ne scias. Sed en tiu scio mankas plezuro, ni ne vidas en ĝi sencon, ĉu vi komprenas? Oni deziras ion tian, kio estas neatingebla por la scio, kio estas super aŭ preter la scio. Nu!.. – Li ellasis densan nubon da fumo kaj domaĝe grimacis. – Kiel vi diris, ni ne estas rakontantoj, por ni estas pli kutimaj tolo kaj farboj.

– Jes, tolo kaj farboj. Sed mi komprenis vin. Ni, pentristoj, ne bezonas multajn vortojn. Vi mem memorigis ankoraŭ unu kaŭzon, pro kiu mi estas ĉi tie. Vi diras, ke viaj kunuloj tie scias preskaŭ ĉion, do respondu, ĉu mi estas rekonita tie? Mi en ĉi mondo estas pentristo, nenio kaj neniu pli. Sed ĉi mondo ne bezonas min kiel pentriston.

– Kial vi tion konkludis? Ĉu pro tio, ke oni ne portas vin sur la brakoj? Viaj pentraĵoj estas ja disaĉetataj, nu tie, en la arta bazaro, ĉu ne?

– Certe! Precipe eksterlandanoj kaptas. Nacia nuanco...

– Ĉu ne sufiĉas? Dume vi ne estas moda, sed la modo estas kaprica. KREDU min, ke vi ankoraŭ estos moda, vi eĉ ne scios, kien fuĝi de tiu populareco.

– Ĉu? Vi tion provis?

– Jes, mi provis iutempe. Sed nun pasis la modo je miaj pentraĵoj, kaj ĉu vi scias? Ĉu denove senti propran sentaŭgecon? Por ne-ni-o...

– Vidu!.. Ni venis al la samo.

– Jes, vi kaptis min. Sed ne pensu, ke mi estis feliĉa kun la populareco. La modo vere estas kaprica aĵo. Ankaŭ rekono alportas sopiron, kvankam... Mi volis diri: de alia kvalito. Sed ne, la sopiro ĉiam estas sama – obskura kaj senespera... Mi certigas vin, ke tie vi deziros ne saĝecon, sed junan facilanimecon aŭ ion ankoraŭ. Sed, aŭskultu, al mi tio jam tedis. Ni ŝanĝu la temon. Ja pri virinoj ni ankoraŭ ne parolis. En la pasinteco mi ne opiniis ilin gravaj, sed antaŭ kelkaj jaroj mi hazarde renkontis Essi-n. Dume niaj rilatoj estas nesimplaj. Ŝajnas, ke ni ne bezonas daŭrigi ilin. Sed kiel vi tie kun ŝi rilatis?

– Do, vi renkontis ŝin antaŭ kelkaj jaroj... Sekve, mi post kelkaj jaroj

disiĝos de ŝi? Pli ĝuste: mi disiĝus, se mi daŭrigus. Kion mi diru? Nun mi havas kun ŝi senelirejon. Kaj tio estas, verŝajne, la tria kaŭzo, kial mi estas ĉi tie. – Mi eligis de post la zono la pistolon kaj kaŝe montris al li, – sed la senelirejo estas nun, kaj en estinto... Eĥ, se vi sciis, kia virino ŝi estis! Nun ŝi estas alia, la tempo difektis ŝin, sed vi ja havas ĉion antaŭe!

– Nu, mi nun certe ne povos tion kompreni. Kaj kiel estas ĉe vi... Verŝajne nemodesta demando... Ĉu Essi estis via sola?..

– Kial tio estas nemodesta? Mi kaj vi estas, verdire, la sama homo. Kun alia mi ne babilus pri tio, sed al vi mi diros. Estis aliaj virinoj. Kaj dum Essi, kaj antaŭ ŝi. Lujn mi amoris eĉ pli multe ol Essi-n. Antaŭ ŝi estis Kess. Ŝin mi amoris sen ia reciproko, sed ja mi estis vere la plej feliĉa homo en la mondo.

– Hm! Mi ne komprenas tion.

– Povas esti, amiko. Al vi tie, kun via saĝo, tio estas verŝajne neatingebla, sed ĉe ni, en mia pasinteco, eĉ pli mirindaj aĵoj okazas.

– Ĉu rilate al virinoj? Mi antaŭsentas. Sed de jaro al jaro mi komprenas tiujn rilatojn ĉiam malpli bone. Kun la tuta saĝo kaj vivsperto, ha, ha... Kio estas por vi Laura?

– Ha! Vi eĉ tion ne scias? Vi renkontis ankaŭ ŝin, verŝajne, hazarde kaj antaŭ nelonge. Sed ŝi trairis preskaŭ tutan mian vivon. Kaj ĝis nun ŝi estas kvazaŭ vundo en mia koro. Sed apenaŭ mi klarigos al vi pli saĝe, mi mem nenion komprenas. Mi amoris ŝin, sed niaj rilatoj tiel implikiĝis, ke... La elemparasiĝo estas sola.

– Ha... Vi min intrigas. Mi dezirus tion elprovi. Rakontu ankoraŭ ion. Pri virinoj.

– Rakonti... Eĥ, amiko! Necesas ĉion ĉi mem sperti. Virinoj estas, se vi sciis! Mi jam diris al vi: la sopiro min konstante ronĝas, miaj pentristaj faskoj deprimas, sed se estas amata virino... Ŝi povas esti eĉ ne apude, ne gravas, oni povas ankoraŭ vivi. Sed nun mi ankaŭ ĉi tie havas senelirejon... Prefere vi rakontu, kiel estas tie. Kiuj ĉion scias, tuta abismo da pasioj estas malantaŭe, kaj restis nur spirita sagaco. Mi ne memoras kies vortojn mi diras.

– Mi povus rakonti, sed vi ankoraŭ ne venis al tio. Vi ne komprenos ĝisfunde. Same kiel vi nun ne komprenas, kia senco estas en tio, ke al via patro venis najbaroj por fumi, babilo kaj dum festoj trinki vinon kaj danci. Al vi tio ŝajnas nun sensenca, sed vivu plu, kaj vi vidis tiun sencon... Prefere rakontu ion pri via infanaĝo. Mi ne vidis ĝin, ĉe ni, vi komprenas, ĉio estas mala.

– Jes, la infanaĝo... La sola, kio min varmigas en la vivo. Varmigas... Nia vilaĝo, nia dometo ĉe ĝia limo, kampoj, arbar'. El la vivo ĉio ĉi jam foriris, kaj poiome foriras ankaŭ el la memoro. Kial mi iĝis pentristo? Ja por konservi la infanaĝon poreterne. Mi amas ĉion, kio ĉirkaŭis min en la infanaĝo. La arkitekturo de la vilaĝaj domoj, staloj, ĉaroj, kampaj kaj endomaj laboriloj, vestoj, argila vazaro, metalaĵoj... Ĉio ĉi sen mi malaperos. Kvazaŭ neniam ekzistus... Mi ne volas diri bombaste, vi mem estas pentristo kaj komprenas min. Por kio mi pentras? Vi ja scias, sed... Duona vivo jam forpasis, sed mi ankoraŭ ne rimarkis, ke la homoj bezonas ion similan.

– En tio mi ne povas vin konsoli, eĉ se mi dezirus. Mi ne pensis, ke ni povas en io ege diferenci. Kvankam, alie ne povas esti. Vi estas el vilaĝo, el infanaĝo, kaj mi estas de tute mala flanko. Mia temo estas la urbo kun ĉiuj ties avantaĝoj kontraŭ kamparo kaj kun ĉiuj ĝiaj koŝmaroj. Verŝajne tio estas kongrua kun pensoj de urbanoj, kaj tial la publiko tiel altigis min. Tiam en la periodo de mia matureco. Nun tio jam preterpasis...

Kaj subite en mia ebriiĝinta kapo kristaliĝis ideo. Ĉi homo, kiu li estas? Ĉu mia frato? Verŝajne eĉ pli ol frato. Li ankoraŭ nenion vidis el mia pasinteco. Kaj li ne vidis, se al li estos permesate realigi la intencon. Mi jam komprenis, ke ankaŭ li havas post la zono pistolon kun unu kartoĉo. Ke ankaŭ li venis al la lasta limo, ne sciante mian pasintecon kaj sian estontecon. Sed en mia pasinteco estis tiom da ĉio! Nu bone, fraĉjo, mi penos ke vi ĝin provu. Kaj vi ĝin provos, mi jam elpensis, kiel tion fari.

– Aŭskultu, – mi diris, – frato. Ankaŭ vi verŝajne sentas, ke ni devas ankoraŭ trinki, sed nenion ni havas. De tiu aĉa vinĉerpisto, – mi kapoklinis al la bufedisto, – oni foriras kun nenio. Mi elkuros eksteren, eble mi aĉetos ĉe iu botelvendisto.

Mi elkuris post angulon, prenis la pistolon, eligis el ĝi la solan kartoĉon kaj ĵetis tiun en mallumon. Tiel estos pli bone. Dum kelka tempo mi iradis tien kaj reen. La strato jam estis delonge dezerta.

Kiam mi revenis en la halon, mia frato sidis, kiel oni devis atendi, en la pozo de l' pensulo. En la drinkejo estis jam neniu. La bufedisto post la vendobreto ridante amuzis sin kun iu dika knabinaĉo, penante pinĉi ŝiajn plej konveksajn lokojn. La knabino efektis reziston, sed ne tre insiste. La bufedisto ion diris al ŝi, gestante niaflanken.

– Hej, viraĉoj, – ŝi kriis al ni. – Bonaj uloj jam delonge foriris. Sed ili sidas. Nu, tiu ĉiesulino ekdeziris nin instrui. Sed en tiu fatala tago ni ne skandalos. Ŝi iru al diablo. Ni kontraŭvole trenis nin al la pordo.

– Nu, ĉio finita, – mi diris surstrate. – Ni adiaŭu. Ni longe iris al tiu renkonto, sed ni venis. Laŭ diversaj vojoj, sed al la sama fino. Ne rememoru min malbone, ni ja estas vere pli ol fratoj. Mi scias, ke ankaŭ vi havas post la zono pistolon kun unu kartoĉo. Ankaŭ vi scias... Ni interŝanĝu tiujn malbenitajn umojn por bona adiaŭo. Kaj ĉiu iru siaflanken. Vi ne konas tiun urbon, sed por mi ĝi estas la urbo de mia junaĝo.

– De via junaĝo? Kaj mi ĉiam miris, kiam io tiras min en ĉi urbon. Kie mi neniam estis...

– Mia pasinteco, via estonteco...

– Mi ne havas estontecon.

– Kiu scias? Sed pardonu, ankoraŭ jeno. Mi ne scias, kial tio venis nun en la kapon. En la infanaĝo, kiam la patroj amuzis sin per vino kaj kokoj, ni havis proprajn ludojn. Kaj tie estis unu knabino, senmana.

– Ĉu tute?

– Ne, ŝi ne havis la dekstran manon. Denaske. Oni diris, ke ŝian patrinon la Dio punis pro pekoj. Ŝi multe malĉastis. Sed tiu knabino...

– Ĉu ankaŭ ŝin vi amaris?

– Ne. Apenaŭ ni povus tion, la dekjaruloj. Kurtadire, vi verŝajne renkontos ŝin. Transdonu mian saluton.

– Ne, jam ne renkontos. Vi mem komprenas...

– Kiu scias, kiu scias?..

Ni interŝanĝis la pistolojn, reciproke brakumis sin kaj penante ne rigardi alies okulojn, iris en diversajn flankojn.

Nur kiam li malaperis en obskuro, mi komprenis, ke ni disiĝis tro frue. Mi volus ankoraŭ multon demandi, kaj eble ankaŭ li. Kaj la necesan gradon ni ankoraŭ ne atingis, kiel antaŭe mi timas kaj doloron kaj morton. Ĉu mi estas timulo? Neniam mi tiel pensis.

Kareas min nur la febla espero, ke dum mi foriris por eligi la kartoĉon, li samtempe eligis ankaŭ el la sia. Verŝajne tiel devus okazi laŭ logiko.

Mi ne havis jam egan deziron mortpafi min. Kaj same – vivi. Kaj tial mi almetos la pafilon al la tempio kaj premos la ĉanon. Ĉu tie estas kartoĉo, ĉu ne – la sorto disponos... Jen mi nur preteriru tiun solan paŝanton...

# Io devas okazi

Gastante en la urbeto de sia infanaĝo, Kedrin senzorge iradis de la patrino domo al la domoj de siaj frato, fratino, avino, ĝojis pro renkontiĝoj, agrablaj konversacioj, pro la vodkumado kaj bierumado kun la frato kaj malnovaj lernejoj amikoj. Kaj neatendite li eksentis ion konfuzan, antaŭe nekonatan.

Li sentis, ke baldaŭ, eble hodiaŭ, eble morgaŭ okazos io neevitebla. Li ne povis antaŭvidi kio estos: malsano, malfeliĉo aŭ eĉ morto aŭ male: amo, riĉeco, feliĉo. Pli verŝajne okazos io terura. Se tiel, la teruron devas ne vidi antaŭ ĉio la patrino kaj la gefratoj, kompreneble. Do, kvankam estis vespero, li devis urĝe forveturi.

Li kunmetis sian sakon kaj longe ne povis decidi, kion li diru al la patrino. Nu, kion: devo, laboro, cirkonstancoj. Li finfine eliris el la patra ĉambro kie li gastante lokiĝis kaj, brakuminte la patrino, diris al ŝi:

– Mi devas forveturi, panjo. Oni vokas min al la laboro.

– Ĉu? – panjo levis la okulvitrojn sur la frunton. – Kiel? Ĉu vi ricevis malbonan telegramon?

– Ho, panjo, kia stranga vi estas. En nia tempo oni ne bezonas telegramojn.

– Ha, oni telefonis do. Ĉu grandaj malagrablajoj?

– Ne, ne maltrankviliĝu. Nenio serioza, sed mi devas esti tie.

– Ho, kia do estas via laboro!.. Knabo mia... Vi devis pli frue diri. Mi kuiris ovojn...

– Eh, panjo. Vi kuiris al mi ovojn kaj fritis kotletojn antaŭ kvardek jaroj... Bonega estis la tempo... Sed, panjo, nun homoj vivas alie. Vi vidas, kun kia sako mi vojaĝas: razilo kaj paro de tolaĵoj. Vojaĝanto nun bezonas nur monon, kaj li ĉion havas. Sed monon mi havas, vi ja scias, ke mi laboras kiel azeno.

Kedrin volis senzorge ridegi, sed la rido estis negaja.

– Ho, fileto... Nu, se oni atendas vin... Kion fari? Ni volis ankoraŭ aranĝi adiaŭan vesperon.

- Panjo, mi tre volus tian vesperon, sed... Komprenu.
- Nu, knabo mia, kion fari? Se vi tiel ŝatas vian laboron... Vi povus ja ĵeti la laboron kaj ripozi, vi estas jam sufiĉe aĝa. Valĉjo kaj Klanjo jam ne laboras, sed vi estas la plej aĝa... Nur al ni du Dio donis la sorton vivi longe kaj feliĉe.
- Jes, panjo, feliĉe, ni vivos ekskluzive feliĉe. – Li ankoraŭfoje provis senzorge ekridi. – Pro tio bonvolu ne ĝeni vin...

\* \* \*

Nun, paŝante laŭ nezorgata stepa vojo, li rememoris la vortojn de la patrino pri la feliĉa vivo. Pri tiu enigma fenomeno sciis ĉiuj parencoj, sed laŭtvoĉe paroli pri ĝi estis nekonvene.

Tiu fenomeno koncernis nur lin, la patrino kaj la avino. Kedrin estis 65-jara, sed lia reala aĝo estis ĉirkaŭ tridek jaroj. Li ne nur aspektis 30-jara, tia li estis ankaŭ anime. La patrino estis 84-jara, sed ĉiuj gekonatoj taksis ŝian aĝon je 45–50 jaroj. Same ŝi ankaŭ sentis sin. La avino estis jam 106-jara, sed ankoraŭ plena je vivo, havis sufiĉe da fortoj mastrumi dometon, ĝardenon, kokidojn. Ŝi aspektis pli maljuna ol ŝia filino, sed ne tre.

Tio estis agrabla donaco de la naturo: kiu ne volus esti eterne juna? Kiom da eminentaj pensuloj serĉis en la mezepoko la filozofan ŝtonon, kiom forbrulis sur ŝtiparoj de l' inkvizicio aŭ mortis en mizero kaj maljuneco. Tiom da vivoj senrezulte pereis – sed la ŝtono malestas.

Kedrin ricevis ĝin dum la naskiĝo senpage, uzis ĝin kaj silente ĝojis.

Jes, silente. En la junaĝo li ne sciis pri tiu donaco, li rimarkis ke li heredas la avino kaj la patrino antaŭ eble dek kvin jaroj, kiam liaj gefratoj, amikoj kaj konatoj neatendite maljuniĝis. Ĉu povis Kedrin fanfaroni per sia juneco? Kompreneble, li povis ĝui ĝin nur silente.

Kaj la ĝojo post jaroj fariĝis malgajo. Kedrin restis juna, energia, plena de planoj por futuro, revoj, ŝatis vinon kaj virinojn, sed ĉirkaŭantaj lin homoj maljuniĝis, fariĝis teduloj, enuigaj grumbluloj, ĉagreniĝis pro malbona sano, malgranda pensio, pro la nuntempa junularo, pro malestimaj gefiloj kaj genepoj. Interrilati kun ili estis ĉiam malpli interese; ili mire kaj malkomprene rigardis lin, kiam li komencis paroli pri foraj landoj kaj planedoj, realaj vojaĝoj aŭ fantastaj flugoj, pri novaj eltrovoj en la scienco, pri novaj libroj, prozistoj kaj poetoj. Iom post iom ĉiuj kunuloj restis en la pasinteco.

Liaj pli junaj frato kaj fratino ŝajnis al li pli onklo kaj onklino. Iam li kun Valerio estis ardaĵ amantoj de la rusa vaporbanejo. Ĉi-somere en la banejo de Valerio eĉ betula bankvasto ne estis. "Eh, maljuneco, – plendis la frato, – betulo apud la banejo kreskas, sed mi ne havas fortojn leviĝi sur ĝin por pretigi bankvastojn. La dorso doloras, la gamboj doloras..." Kiam li maljuniĝis? Ŝajnas, antaŭnelonge ili duope vaporbanis sin laŭ ĉiuj reguloj: frapis unu la alian per bankvasto, poste kuŝis en neĝo, poste trinkis bieron...

La kuzo Georgo iel nerimarkite malaperis. Ŝajnas, antaŭ kelkaj jaroj ili ankoraŭ kune bonege diboĉis, sed ĉi-jare la patrino diris pri Georgo: "Ho, li jam delonge mortis. Mi telegrafis al vi, sed vi tiam en eksterlando estis..."

Li havis normalan familion: edzino, filo. Sed kiam ilia filo komencis aspekti kiel pli aĝa frato de la patro, kaj la edzino – kiel patrino de ambaŭ, la edzino ne eltenis mokajn ŝercojn de najbarinoj kaj foriris de Kedrin.

Maljuniĝis ankaŭ la tuta mondo ĉirkaŭ li. Li preskaŭ ĉiujare venis dum forpermeso en sian urbeton Istoki, vagadis en ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, sed de jaro al jaro tio ĉi iĝis ĉiam pli malĝoja. Dum li restis juna, la ĉirkaŭa mondo maljuniĝis. En la iam verdaj arbaroj kaj sur freŝaj herbejoj li renkontis ĉiujare pli kaj pli multe da mortaj arboj, sekiĝintaj fontoj, senakviĝintaj riveretoj kaj lagetoj.

En la malnova parko, kie li unuafoje kisis knabinon, plimulto de arboj sekiĝis, oni elhakis la tutan parkon kaj plantis novan. La nova estis sur la sama loko, sed ĝi estis nekonata, fremda parko.

Apud Istoki estis lago, sur kies bordo li kun siaj nedisigeblaj amikoj Serĝo kaj Petro sidadis dum kvietaj lunhelaj vesperoj. Ili sidadis ĝis meznokto aŭ eĉ pli malfrue, parolis pri futuro, pri la senco de l' vivo, kiel ili refaros ĉi mondon kiam iĝos plenaĝuloj. Nun la lago, iam grandega, malprofundiĝis, malpligrandiĝis preskaŭ duoble, ĝiaj bordoj kovriĝis per densejo de kano, la akvo verdiĝis.

Serĝo estis talenta pentristo, partoprenis en multaj ekspozicioj de Japanio ĝis Usono. Sed lia pentrista kunularo vivis bohemie, senorde, ebrie, kaj Serĝo forpasis antaŭ dudek jaroj. Ĉiam ironiema Petro verŝajne ekde la infanaĝo estis poeto kaj parodiisto, li ĉiam ridigis ilian malgrandan kompanion. Sed Petro delonge forveturis eksterlanden, kaj tie liaj spuroj perdiĝis.

La brilanta juna vivo de Kedrin fariĝis ĉiam pli kaj pli malplena. Iam li venis en la gepatran hejmon kaj povis pasigi la tutan forpermeson kun la patrino, gefratoj kaj lernejoj kunuloj, vagante en ĉirkaŭaĵoj de Istoki. Sed



tiu ĉi mondo, amata en la infanaj kaj junaj jaroj, fojon post fojo ŝanĝiĝis, kaj ne al plibono, jaron post jaro ĝi fariĝis pli fremda.

Li jam ne povis vivi en Istoki la tutan forpermesan monaton. Post unu semajno lia angoro pro la ŝanĝiĝanta, maljuniĝanta mondo iĝis neeltenebla, kaj li trovis kialon forveturi. Same ankaŭ hodiaŭ, nur ĉi-foje aldoniĝis antaŭsento de io eksterordinara.

Li decidis forveturi tuj vespere, ne atendi morgaŭan matenan buson. Li iros piede ĝis la ĉefvojo, kaptos samvojan aŭton aŭ kamionon por atingi la fervojan stacion. En Istoki fervojo ne estis.

Irante preter la iam amata lago, sur kies bordo kreskis nun la nova parko, li atentis malnovan ventmuelejon. Li aŭdis kelkfoje, ke iu entreprenema homo aĉetis tiun muelejon, paginte ĝin kiel hejtlignon. Onidire li aranĝis en la muelejo originalan rusan tavernon, kiu estas tre vizitata de la urbeto junularo.

“Tie oni povas verŝajne drinketi kaj manĝi”, – pensis Kedrin kaj direktis sin al la taverno.

Ĝia interno estis vere pli ol originala. Kelkaj lignaj tabloj estis nefarbitaj, sed sufiĉe puraj. Apud la tabloj staris kamparanaj ĉaroj plenaj de pajlo, pajlo kuŝis ankaŭ sur la planko. Sur du muroj pendis krudaj vilaĝaj gobelinoj. Sur la tabloj staris argilaj potoj kaj argilaj teleroj kun sekala pano. La aero odoris per kvaso, fungoj, fenkolo, ajlo kaj deko da aliaj aromoj agrablaj por la rusa flarsento. Apud unu tablo sidis sur ĉaroj tri junuloj, trinkis bieron kaj nelaŭte interparolis.

Sed vere frapanta estis kelnerino. Kvankam ŝi estis en bunta rusa sarafano<sup>1</sup> kaj blanka tuko, Kedrin tuj komprenis ke ŝi estas ne el ĉi tiu mondo. Kvazaŭ knabinon el bona inteligenta familio, kiu ŝatas la romanojn de Turgenev, la poemojn de Lermontov, la muzikon de Ĉajkovskij, oni enĵetis en vulgaran ebrian kompanion.

– Bonan vesperon, – ŝi modeste ridetis al Kedrin. – Sidiĝu kie al vi plaĉas, ni ĝoje gastigos vin. Jen la menuo.

– Ĉu oni ĉe vi sur ĉaroj sidas? – Kedrin ankaŭ ridetis al ŝi.

– Se vi tre volos, vi rajtas eĉ kuŝi sur pajlo, ĉe ni estas permesate.

Ŝi foriris kaj Kedrin kun intereso komencis legi la menuon. Ha, kelkaj specoj de vilaĝa vodko: kun aromoj de konjako, de rumo, de ĝino. Aha, oni scipovas ja. Indas ĉion gustumi. Plu. Ĉio pure rusa: peklitaj fungoj, peklitaj

---

1. Sarafano (сарафан). Rusa senmanika robo.

kukumoj, malvarma kvasa supo, Rostova fiŝsupo, pelmenoj<sup>1</sup>, flanoj, kuko. Bonege. Kedrin decidis, ke li ne simple drinketos kaj manĝos, li restos ĉi tie pli longe. Ne pro vodko kaj la rusa kuirarto, sed pro la kelnerino. Kie ankoraŭ oni povas renkonti tian inspiritan vizaĝon? Neordinara junulino, paroli kun ŝi estos tre interese.

La kelnerino venis por mendo. Kedrin mendis, ne gravas kiun vodkon, iujn manĝaĵojn. Dum ŝi forestis, Kedrin pripensis estontan konversacion. Do, nenian vulgarecon, banalecon, tiu junulino estas super tiu koto.

– Kiel vi nomiĝas? – li demandis, kiam la kelnerino alportis pleton kun argilaj teleroj.

– Aliona, – ŝi modeste mallevis la okulojn.

– Ĉu? Kia rara kaj bela nomo.

– Tion mia paĉjo elpensis.

– Via patro estas poeto.

– Ne, li estis pentristo.

– Ĉu estis?

– Jes, li forpasis. Tute neolda estis.

– Sed kial li forpasis?

– Pro troa amo al vodko, – suspiris ŝi.

“Jes, mi ne eraris, – pensis Kedrin. – Simpla kaj pura junulino. Certe ŝi ne estas kutima kelnerino, kapabla flirti kun la unua veninta kliento, ridegi je liaj vulgaraj ŝercoj, elteni liajn voluptajn altrudojn. Ne, ŝi trovas sin ĉi tie okaze. Plej verŝajne cirkonstancoj, aŭ?..”

– Aliona, ĉu vi ŝatas vian laboron?

– Pro kiu ĝojo? – Ŝi malgaje ridetis.

– Nu, ĉi tie estas tiel interese, rusa vilaĝa etoso.

– Interesa estis nur la unua tago, eble ankoraŭ la dua. Kiel mi komprenas, vi estas urbano, sed ĉi tie oni devas simple, – ŝi denove ridetis, – resti viva.

– Ah ha, vi ne revis do pri tiu ĉi laboro. Vi revis pri io alia, ĉu ne?

– Certe pri alia.

– Mi supozis tion. Aliona, mi vere estas el fora urbo, kaj al mi estas tre interese konversacii kun vi. Ŝajnas, vi estas rara junulino por Istoki. Eble vi estas nura tia en ĉi urbeto.

---

1. Pelmenoj (пельмени). Kuiritaj pastosaketoj farĉitaj per viandaĵo, fiŝaĵo, aŭ legomoj, iom pli grandaj ol ravioloj.

– Ankaŭ vi ŝajnas interesa homo. Vi verŝajne estas vojaĝanto kaj povas multe rakonti, – ŝi ekridetis. – Tien ĉi venas ja simplaj homoj, nu, tro simplaj. Ili babiladas pri nenio. La plej bona konversacio kun ili estas silento.

Kedrin estis frapita de la profundeco de tiu penso. “La plej bona konversacio kun ili estas silento”. Ŝajnas, proksimume tiel sonas unu el postuladoj de zen-budaismo. Sed de kie ŝi povas en tiu ursangulo koni ion pri zen-budaanoj? Kiom tiu knabino devis suferi pro aroganteco, malbona eduko de ŝia medio, ĝia idioteco, senkaŭza malico, pro vilaĝa senceremonieco, pro tiel nomata sankta simpleco, pro eterna malkompreno inter homoj pensantaj kaj stultuloj, ke ŝi memstare venis al la penso, al kiu budaanoj iris dum jarcentoj!

Tiomomente de la flanko de tri junuloj trinkantaj bieron aŭdiĝis nekontentaj elkrioj.

– He, Lenka! Muzikon! – kriis unu el junuloj.

Aliona foriris ŝalti magnetofonon, eksonis iu senenhava moderna pop-kanzono. Ŝi revenis kaj sidiĝis kontraŭ Kedrin.

– Antaŭe ĉi tie sonis nur rusaj kantoj kaj romancoj, – ŝi sciigis. – Ili plej harmonias kun la ĉirkaŭumo de la dek naŭa jarcento. Sed poste vizitantoj postulis tiun bagatelaĵon, – ŝi montris al la magnetofono kaj ridetis kvazaŭ pardonpete.

– Do, Aliona, se via laboro ne urĝas vin, – Kedrin sidiĝis pli oportune sur la pajlo, – kaj se vi ne kontraŭas, ni parolu pri viaj iamaj revoj, nu, pri aliaj laboro kaj vivo, ne tiuj, – Kedrin ĉirkaŭmontris la ejon.

– Kial do la revoj devas esti iamaj? Kia vi estas! Ili estas nunaj.

Al Kedrin estis tre facile konversacii kun ŝi, kaj li sentis ke ankaŭ al ŝi tiu konversacio estas kiel ekspiro de freŝa aero.

– Bone, nunaj, do nunaj, – li afable ridetis al ŝi. – Sed en la infanaĝo vi ankaŭ pri io revis. Pri kio: ĉu pri kino kaj teatro aŭ pri vojaĝoj kaj kosmodromoj?

Ŝi ridetis:

– Mi komprenas, ke vi ŝercas, sed mi revis pri ĉio ĉi kaj ankoraŭ pri multo.

– Ho!

– Kaj estas profesio kiu povas ĉion ĉi unuigi.

– Ĉu verkisto?

– Jes, preskaŭ. Mi volas iĝi ĵurnalistino, plej bone internacia. Ĉirkaŭvojaĝi Afrikon, Sudamerikon, Ĉinion, Hindion, ĉu vi imagas?

– Kaj kio malhelpis?

Ŝi sopirĝemis.

– Se paĉjo estus viva, mi studus en universitato, sen mono studo estas ja nebla. Panjo perlaboras nemulte, kaj ankoraŭ pli juna fraĉjo... Sed mi nepre studos. Perlaboros monon ĉi tie kaj studos...

Kedrin forgesis, ke la tempo pasas, kaj ke li volis eliri sur la ĉefvojon kaj veturi ĝis la stacio. Kiam li rememoris pri la fluanta tempo, estis jam post la noktomezo. Al tiu momento li multon eksciis pri Aliona. Ŝi ĉiam estis scivolema infano. “Ŝi ankaŭ nun, – kun rideto pensis Kedrin, – estas la sama scivolema infano”. El la konversacioj kun Aliona Kedrin eksciis, ke en diversaj tempoj ŝi lernis Esperanton kaj Slavonon, la antikvan rusan literaturon, la antikvan ĉinan poezion (en la Istokian bibliotekon mirakle trafis kvarvoluma almanako de ĉinaj poetoj), legis Volteron kaj Rousseau-on, ĉinajn kaj japanajn prozistojn kaj poetojn. Pri multaj libroj kaj aŭtoroj, kiujn Aliona menciis, Kedrin nur sciis ke ili ekzistas.

Kun tia vasta sfero de interesoj oni povas esti nur ĵurnalisto. Ŝi (kia saĝa infano) komprenis tion delonge. Fininte la lernejon ŝi jam bone parolis angle kaj germane kaj havis egan deziron lerni aliajn lingvojn: kiel vojaĝi tra Ĉinio parolante nur angle kaj germane? Ŝi volis lerni la ĉinan, sed en la urbeta biblioteko ne estis lernolibro. Kedrin iom konfuziĝis: li post la universitato parolas nur rompitan anglan, germane scias du-tri vortojn.

La taverno funkciis la tutan tagnokton. Kedrin komence miris: kiu venos meznokte al taverno en urbeta limkvartalo? Sed poste li konvinkiĝis, ke vizitantoj venas dum la tuta nokto. La ĉefvojo, kien Kedrin sin direktis, estis tute proksima, ofte ŝoforoj preterpase venis en la taverson, parkis kamionojn apude kaj gaje pasigis tempon, iufoje ĝis mateno. La mastro de la taverno ne eraris, drinkejo sur tiu loko profitis verŝajne sufiĉe bone.

Aliona laboris dek du horojn dum tago, la sekvantan diurnon dek du horojn dum nokto, poste havis du liberajn diurnojn. Sabatoj kaj dimanĉoj tie ne gravis. Hodiaŭ por Aliona estis labora nokto. Komencinte la laboron je la oka vespere ŝi laboros ĝis la oka matene. De tempo al tempo venis kelkaj ŝoforoj, drinkis, kriis kantojn, disverŝis bieron sur tablojn kaj finfine foriris dormi en siajn kamionojn. Venis alia grupeto. Tia estis la tuta nokto.

Kedrin volis paroli, paroli, paroli kun Aliona, sed ŝi ofte foriris priservi vizitantojn. Dum ŝia foresto li gustumis ĉiujn specojn de vodko, trinkis multe, sed tute ne estis ebria. Li estis ekzaltita sen vodko. En lia malplena kaj sopira vivo aperis hela radieto – Aliona.

«Ne, – li pensis, – mi devas ne forlasi tiun junulinon ĉi tie. Ŝi edziniĝos al tia idioto kiu kriis “He, Lenka, muzikon!” kaj oni povas konsideri ke ŝi pereis por ĉiam».

Kio estas lia sento al ŝi? Ĉu kutima amoro de viro al virino? Ho Dio, ŝi povus esti lia filino aŭ eĉ nepino. Kedrin negaje ridis. Aŭ amo de plenkreskulo al infano? Dio, ŝi ne estas lia filino, kia stultajo! Sed tamen sen ŝi la ĉirkaŭanta lin mondo estos pli kaj pli dezerta – mortantaj homoj, mortaj arboj, sekiĝintaj riveroj kaj lagoj. Nur ŝi en tiu maljuniĝanta mondo restos juna kaj bela.

Preterirante lin, ŝi ĉiufoje ridetis, pro kio lia koro ĉiufoje degelis. “Kiel ŝi ridetas? – li meditis. – Ĉu bonkore aŭ bonanime aŭ kiel al malnova amiko aŭ ankoraŭ iel?” Subite lin trapikis la penso: “Kiel mi forgesis, ke hodiaŭ devas io okazi? Aha, ĝi jam okazis. La amoro! Nu certe, Aliona ridetas al mi kiel al malnova amiko. Ŝi estas neindiferenta al mi, alie por kio ŝi pasigus kun mi tiom da tempo? Jes, kio devis okazi, jam okazis.

– Aliona, – li diris serioze, kiam ŝi iom liberiĝis kaj sidiĝis kontraŭ li. – Al mi plaĉas via plano iĝi internacia ĵurnalistino. Mi volas al vi ion proponi. Venu en mian urbon kaj eniru en mian universitaton. Mi tie finis la matematikan fakultaton, kaj vi finos la ĵurnalistan. Mi helpos en ĉio kio estos bezonata. Mi ankoraŭ ne renkontis tiajn saĝajn kaj interesajn junulinojn kiel vi.

Aliona nenion respondis, nur ridetis, ŝajnas danke, kaj forkuris labori plu. Nu bone, pensis Kedrin, bone ke ŝi ne diris “ne” kaj ridetis danke. Pri detaloj ni parolu, kiam ŝi finos sian laboron.

Neatendite sur Kedrin ŝarĝis sin la tuta laco de la pasinta sendorma nokto. La plej granda deziro estis fali sur la pajlon kaj droni en dormo. “Freŝa aero estas necesa, – pensis li, – ĉi tie la atmosfero estas saturita de vodko kaj biero, al diablo, eksteren, eksteren!”

– Aliona, – li diris al la veninta junulino, – mi bezonas eliri, ial mi lac-iĝis. Jen la pago, sed mi ankoraŭ revenos. Mia sako kuŝu ĉi tie. Mi baldaŭ revenos...

Aliona mire kaj eĉ time rigardis lin:

– Kio okazis al vi? Vi estas tiel pala!

– Nenio. Ne gravas. Mi iom spiro eksteren kaj revenos. Kaj trinkos ankoraŭ vian firmaan vodkon.

Li iris al la lago. Nun ĝi malprofundiĝis kaj ĝis ĝia bordo estis ĉirkaŭ tricent metroj. Kedrin lace paŝis, kaj ĉiu sekvanta paŝo estis pli kaj pli

malfacila. Kial la gamboj tiel doloras, estas tiel pezaj, kial la dorso kurbiĝas, kial en la oreloj io bruas, kion, diablo, ĉio ĉi signifas?

Jen la lago, iam amata kaj nun delonge fremda kiel ĉio en Istoki kaj ĉirkaŭe. Ĉu vere sur ĉi tiu bordo li kun Serĝo kaj Petro planis futuron antaŭ... he-e... antaŭ kvardek kvin jaroj? Revis refari la mondon, fari ĝin bela kiel kanto kaj perfekta kiel la madonoj de Rafaelo. Knaboj, knaboj.

Kedrin venis al la rando de la bordo, kliniĝis super la akvo kaj vidis – kion? Li fortiriĝis en plena teruro. Ĉu estas li? Li time rigardis ankoraŭ unufoje kaj sufokante teruron longe pririgardis la respeguliĝon. Kompreninte ĉion, li ĝemis, ĝemegis, eble lupe hurlis. El la spegulo de l' akvo lin rigardis oldulo, proksimume 65–70-jara.

Kedrin malfeliĉe pririgardis sian respeguliĝon, nefideme tuŝante la faltoplenan vizaĝon kaj grizan hararon. Ĉu vere? Ĉu povas tiel esti? Hieriaŭ ĉio estis: juneco, sano, fortoj, allogo kaj enigmeco por junaj virinoj, kaj hodiaŭ – ĉio malestas.

Konvinkiĝinte, ke ĉio estas ĝuste tiel, ke ne estas eraro, optikiluzio, miriĝo, li sidiĝis sur malnovan duone disbatitan boaton, kuŝantan renverse sur la bordo, kaj longe sidis senpense, ne sciante, pri kio pensi. La patrino diris ion pri longa kaj feliĉa vivo. Ve! La vivo restis nelonga kaj apenaŭ feliĉa. “Ne meditu, ne meditu pri tio, – li ordonis al si. – Pro tiuj pensoj oni povas frezeziĝi”.

Kiam la ruĝa suno leviĝis super la horizonto, li forlasis la lagon kaj direktis sin al la ĉefvojo, penante ne pensi pri la malnova muelejo, la taverno kaj pri la juna kelnerino...

*La Ondo de Esperanto*, 2009, №3, p. 16-19.

Pro ĉi tiu rakonto Miĥail Korotkov iĝis laŭreato de *Liro-2008* en la branĉo “Originala prozo”.

# Eksa kosmopiloto

Kio povas esti pli bona ol tia rosa aŭgusta mateno! Eble nur por tio valoras vekigi tiel frue. Kiu emas dormi ĝis tagmezo, tiu ne vidos tiajn malvarmeton kaj freŝon. Kiam li vekigas, estas jam varmego. Ha, ha! Nu, estu tiel, ĉiu vivas en sia propra mondeto.

Teodoro, starante sur la perono de sia domo, dum iom da tempo turnis la brakojn, la kapon, forpelante la dormon, volis aspergi la vizaĝon el manlavujo, sed alidecidis: mi havos ankoraŭ tempon. Fermetinte la okulojn, li rigardis la ruĝan sunon. Ho, kiel bone!

Li prenis korbon de sur benko, iris en la ĝardenon. Dum iom da tempo li admiris ruĝflankajn persikojn. "Beluloj! Ili petegas esti pentritaj. Domaĝe, ke mi ne estas pentristo". Li deŝiris kelkajn kaj metis en la korbon. Li iris kelkajn paŝojn plu, admiris abrikotojn, kaj ankaŭ dekon aŭ dudekon da ili li metis en la korbon. Poste li longe ravite klakis per la lango, fikse rigardante tra la diafana ŝelo semojn de vinberoj. Li gustumis du-tri berojn kaj ŝmacis pro plezuro, poste deŝiris du grapolojn kaj metis ilin apud la persikoj kaj abrikotoj.

Revenante al la domo, Teodoro aŭdis pumpumadon de motoro kaj vidis en la ĉielo rozkoloro brilantan en la sunradioj punkton, kiu rapide pligrandiĝis. Li iris lante, kaj kiam li venis al la perono, la punkto transformiĝis al mikrohelikoptero. Tiaj "libeloj" ne estas nun raraĵo, ili estas unu lokaj, du lokaj, kaj kelkfoje ili flugas super la urbeto, sed Teodoro miris, kiam la helikoptero alteriĝis apud la vojo rekte kontraŭ lia domo.

La alta kaj larĝaŭltra piloto malfacile elgrimpis el la kajuto. Pensinte, li denove engrimpis en la kajuton, ion tie palpserĉis, kaj nelerte saltis sur la teron. Teodoro dume sukcesis rerigardi en sia memoro ĉiujn siajn ne-multajn konatojn sur Tero. Kaj fine ekridis. Kompreneble, tiu estas Niko. Kiu krom li povas havi tian ursan amplekson kaj konformajn al ĝi movojn? Poste li subpremis la ridon, Niko jam proksimiĝis.

– Mi komprenas, Teodoro, ke vi estas surprizita, vidante min. Kvan-kam, mi devas esti pli surprizita, pro tio ke vi ekloĝis sur tiu rando de Tero.

Ili manpremis sufiĉe oficiale. Sed tio ne estis kialo por Niko haltigi la fluon de sia parolemo.

– Mi trovis vin tre-e malfacile. Nu, Teodoro! Vi estas fama kosmopiloto, ĉiam vi estis ekzemplo por junuloj, sed kondutas kiel malprosperulo en ĉi vivo.

– Pri tio ni poste parolos, – ne tre saluteme diris Teodoro. – Eniru, se vi spite ĉion alflugis.

Teodoro akompanis Nikon ĝis la laŭbo, alportis tri telerojn, plektitajn el salikaj vergoj, metis en ilin persikojn, abrikotojn, vinberojn. Poste demande rigardis Nikon:

– Eble, po glaseton? El jenaj abrikotoj, – li pikis per fingro la teleron, – ni aŭtune bonegan brandon preparas. Mi nun alportos al vi la faritan antaŭ preskaŭ unu jaro.

– Atendu, Teodoro, mi klarigos al vi, por kio mi alflugis, kaj poste decidu, ĉu bonokaza ĉe tio estos brando, aŭ male.

– Ba! Ĉu post ĉiuj cirkonstancoj povas ankoraŭ esti seriozaj konversacioj?

– Mi ne tute komprenas, kion vi subkomprenas je “post cirkonstancoj”, sed mi alflugis al vi por afero, pro kiu ĉiujn cirkonstancojn ni devos lasi flanke.

– Iel vi, Niko, ruze ĉion turnas ĉirkaŭe. “Cirkonstancoj”, “post cirkonstancoj”. Mi ne pensis, ke post tio, kiam vi antaŭ kvin jaroj elĵetaĉis min el la taĉmento, inter ni povas esti seriozaj aferoj. Dum kvin jaroj neniam aferoj estis. Elĵetaĉis – kaj silento.

– Teodoro, lasu viajn ofendojn. “Elĵetaĉis”. Vi simple flugadis tie inter planedoj kaj ne sciis, ke sur la Tero kaj en la Kosmo okazis kelkaj eventoj, aperis novaj leĝoj. Oni ne elĵetis vin, sed faris, kiel necesis laŭ la leĝo. Post la terura katastrofo de la ŝipo *Selena* la limaĝo por la profesia kosmopiloto iĝis 55 jaroj. Oni rajtas flugi kiel turisto, pasaĝero, sed ne labori – adiaŭ la laboro! Oni plu ne rajtas. Neniu vin elĵetis, oni ja proponis al vi instrui en la Akademio.

– Ne, karulo, tio estas ne por mi. Mi en la Kosmo kutimiĝis labori per la manoj kaj per la kapo. Sed labori per la lango – tian praktikon mi ne havas. Mi kalkulis: dum tridek jaroj da servado mi pasigis en Kosmo pli multe da tempo, ol sur Tero. Kaj plej ofte en unuopaj flugoj. Mi sovaĝiĝis tie, kia profesoro mi povas esti? – Teodoro ekridis. – Ĉu vi opinias, ke mi dum kvin jaroj nur pri la abrikotoj okupiĝis? Mi tralernis ĉiujn ruzajn elirojn el viaj leĝoj,



volis trovi ion utilan, sed forestas tie io simila. Jes, vi havas la leĝon, sed mi – nenion... Krom tio, ke mi la tutan vivon pasigis en Kosmo. Aha, flugu kiel turisto, kiel pasaĝero. Ĉu scias vi, staba animo, kion signifas la infanaĝa revo? Mi ne scias pri aliaj, sed mi mian revon realigis. Ni iru, mi montros al vi: super mia lito ĝis nun pendas la helmo, en kiu mi flugis dum la lastaj jaroj... Vi, simpla animo, verŝajne decidis, ke mi en tiuj persikoj-abrikotoj trovis la sencon de mia vivo? Vi tie ĉiuj, verŝajne, tiel opinias. Nu, mi revis okupiĝi pri legomoj-fruktoj post la pensiigo, sed ne en la nuna aĝo!

– Trankviliĝu, Teodoro. Ĉu vi opinias, ke mi ne havis infanaĝan revon? Ĉu mi ne revis ĉasadi sur Marso? Vi memoras tiun nian ŝercon...

– Sed se vi revus, vi ne gluiĝus al fotelo en la stabo.

– Aĥ, Teĉjo... Same mi revis... Kiam mi post la Akademio venis en la taĉmenton, oni diris al mi: "Ho-o, junulo! Kie ni trovos por vi tian skafandron kaj tian kajuton? Ĉi tie eĉ specialaj mendoj ne helpas, tiaj normoj ne ekzistas. Prefere iru en la stabon. Vi ja kiel studento, jam verkis teoriajn artikolojn pri kosmaj flugoj. En la stabo oni vin renkontos kiel parencon". Tiel mi, Teodoro, trafis tien. Kaj dum la tuta vivo mi certigis la sekurecon de viaj flugoj. Kaj vi opiniis, verŝajne, ke la sekureco per si mem aperadis?..

Teodoro metis la kubutojn sur la tablon, apogis la mentonon sur la pugnoj, kaj longe aŭskultis Nikon, kredis kaj ne kredis: eble ĉio ĉi estas nur fabeloj por pravigo? Poste li diris:

– Niko, ĉu mi eble alportu boteleton?

– Atendu, Teĉjo. Ni havas malmulte da tempo. Permesu al mi diri, por kio mi alflugis, kaj poste vi decidus...

– Do diru, kial vi tiras kaj turnas?

– Teodoro, la afero estas ekstreme serioza, kaj ĉiu minuto estas kara. Kurte dirante, estas tiel: de sur Luno oni sendis laŭ longa orbito – nu, vi scias, kion tio signifas, vi mem plurfoje flugis – senpilotan kamionan ŝipon kun heliumo-3. Nun sur Tero plimulto de termonukleaj centraloj funkcias per ĝi. Pro nedifnita kialo la orbito de la ŝipo ŝanĝiĝis. Anstataŭ flugo laŭ ĉirkaŭtera orbito la ŝipo enranĉiĝos en la Teron. Kien? Ricevi ĝustajn informojn ne eblas. Direktado de tiuj ŝipoj sur la orbito ne estas antaŭvidita, nur simpla balistiko. Ĉiu kompanio ja strebas transporti plej malkare.

– Ĉu okazos termonuklea eksplodo?

– Ne, tiagrade nenio okazos, kion vi diras? Ĉu vi forgesis la tutan Akademian sciencon? Tiu ŝipo eĉ sen eksplodo faros multe da aferoj. Estus

bone, se ĝi falus en oceanon, sur dezerton aŭ sur senhoman regionon de Siberio. Sed se sur Eŭropon?

– Eble, teroristoj tion faraĉis?

– Ne, pri tio eĉ ne temas. Ili ne povus fari tion per sia antaŭdiluva tekniko. Ili povus eble nur deorbitigi la ŝipon, sed direkti en difinitan punkton de Tero... Ĝi povos ja fali ankaŭ sur iliajn hundajn kapojn.

Teodoro enpensiĝis por unu minuto.

– Ŝajne mi komprenas, kion vi volas de mi. Se tiu senpilotaĵo flugas laŭ longa orbito kaj estas deorbitigita, do kion oni povas fari? Ekzemple, mia unua propono. Oni povus sur ŝipo kun mana direktado ĉirkaŭflugi ĝin laŭ tre longigita elipsa orbito, alboridiĝi kaj tiele juveliste, – Teodoro pentris en la aero longan arkon, – per mana direktado korekti ĝian flugon, por ke la ŝipo eniru en ĉirkaŭteran orbiton. Kaj alteriĝi ne estos malfacile.

– Nu, Teĉjo, genie! Mi dum la tuta vojo serĉis vortojn por klarigi al vi, sed tio ne bezonatas! Vi ĉion komprenis pli rapide, ol ni en la stabo...

– Nu, mi simple diris, kion oni povus fari. Nur principe. Sed ĉu vi imagas, kiel tio okazos en Kosmo? La probableco plenumi la laboron, kiel mi supozas, estas 0,3, kaj la probableco forbruli en la atmosfero estas do la restanta 0,7. Eĉ por mi kun mia 30-jara sperto... Mi kompatas tiun kamikazon, kiu konsentos flugi. Mi ripetas: eĉ por mi tio estus ekstreme malfacila. Sed kie vi trovos junan piloton kun necesa sperto?

– Ha... piloton... Tio estas delikata demando... Ni decidis kiel piloton inviti vin.

Teodoro malsereniĝis kaj rigardis preter Niko foren.

– Niko, mi estas jam dum kvin jaroj “profesie netaŭga”. Ĉu vi povas konfidi la laboron al turisto?

– Teĉjo, kiam estas bezonate, oni preteriras la leĝojn kaj malpermesojn. Sed la afero tre bezonatas! Ĉu pro iu leĝo lasi milionojn da homoj pereji?.. Jen mi desegnos al vi bildon. Vi ja memoras la Tunguzan meteoriton<sup>1</sup>. Kiu el la junaj kursanoj ne revis veturi tien iomete fosi? Neatendite ĝuste vi trovos ion interesan kaj iĝos fama en la tuta mondo. Ĝis nun ĝi ja restas mistero! Ankaŭ mi havis revon, legis amason da libroj pri tio. Do jene, tie

---

1. Tunguza meteorito. Ĝis nun mankas ĝenerala akceptita scienca klarigo pri la esenco de la granda eksplodo, okazinta la 13an (Gregorie: la 30an) de junio 1908 ĉe la rivero Kamennaja Tunguska, je ĉ. 60 km norde de la vilaĝo Vanavara. Plej probable, la eksplodo okazis ne sur la tersurfaco sed en la aero je ĉirkaŭ dekkilometra alteco.

estis senhomaj lokoj, nur je distanco de 60 km iu evenko<sup>1</sup> paŝtis boacojn. Do, kiam la meteorito kraŝis, tiu paŝtisto estis forĵetita je dek metroj. Sed eksplodo de tiu ŝipo estos multe pli forta. En Eŭropo povos malaperi ne-granda lando...

Teodoro silentis.

– Ĉu vi komprenas, Teĉjo, kia estas la situacio? Jam antaŭ multaj jaroj iuj fisaĝuloj el la Akademio decidis, ke nuntempaj aŭtomatoj kapablas fari ĉion, kaj oni delonge ne plu instruas fakulojn pri la mana direktado. Vi estas nia nura espero... Ne pensu, ni ne sendos vin por simple pereji. Pro nobla celo... Pripensu ĉion mem. Estas ja elembarasigo el ĉiu malfacila situacio. Kiu krom vi?..

Teodoro denove ne diris eĉ unu vorton.

– Do, vi nenion decidis?

Teodoro silente rigardis foren.

– Mi komprenas, ke dum kvin jaroj vi perdis vian sperton... Nu, tiaokaze, Teĉjo, por mi estas tempo...

– Kion vi diras! – Teodoro salte ekstaris. – Perdis sperton, perdis sperton! Mi simple ĉion pripensis. Kiam, ĉu ni tuj flugos? Kion mi kunprenu? Ni ja ne por promeno flugos.

Niko apenaŭ rimarkeble ridetis.

– Vi bezonas nenion, Teĉjo. Sur la kosmodromo estas ĉio, vi ekipos vin kaj flugos.

Teodoro staris iom da tempo hezitante.

– Ĉu mi nenion bezonas? Kion vi en tio komprenas? – kaj li decide direktis sin en la domon.

Post unu minuto li eliris, alpremante al si la helmon.

– Mi diras al vi: vi ne bezonos ĝin, – miris Niko. – Ĝi ne taŭgos al nuntempaj skafandroj.

– Sed jes, mi bezonas, – trankvile kontraŭdiris Teodoro. – Vi pravas: mia nuna sperto jam ne estas taŭga. Ĉi tiu helmo almenaŭ kuŝu apude, ĝi kreos al mi la kutiman ĉirkaŭaĵon. Nu, tiel estos pli bone, Niko...

Niko metis sian egan polmon sur la ŝultron de Teodoro kaj rimarkeble ekscitite diris:

---

1. Evenko. Ano de aŭtoktona orientasiberia popolo, loĝanta inter Jenisejo kaj Oĥotska Maro. Antaŭe evenkoj estis nomataj tunguzoj. La evenka lingvo apartenas al la tunguza-manĉura grupo de la altaĵa lingva familio.

– Dankon, Teĉjo. Mi ne atendis de vi alian decidon. – Poste li ĉiutagece aldiris: – Ni iru en la helikopteron.

Kiam ili leviĝis, Teodoro, kunpremite la dentojn kaj penante kaŝi la malĝojon, rigardis sian domon.

– Mi promesas al vi, Niko, ke ni revenos ĉi tien post tri tagoj. Mi havas ĉi tie vaporbanejon. Ni prenos banon, trinkos po glaseton da brando kaj manĝos ĝissate fruktojn.

Li ŝerce frapis la ŝultron de Niko kaj ekridis.

*La Ondo de Esperanto*, 2013, №4–5, p. 22-23.

Pro ĉi tiu novelo Miĥail Korotkov iĝis laŭreato de *Liro-2012* en la branĉo “Originala prozo”.

# Iom da geheno

Ĉu vere niaj antaŭuloj, nu, eĉ miaj gepatroj, vivis nehaste kaj ritme? Homoj leviĝis, estis longa rozkolora mateno, poste longa tago, fine longa vespero kun bela aŭroro. Estis ankaŭ longegaj jaroj ekde unu printempo ĝis la alia. Nun ĉio traflugas nerimarkeble.

Kelkaj saĝuloj asertas, ke tiam estis alia tempo. Ne alia epoko, sed la tempo je fizika, Ejnŝtejna senco. Tiam ĝi fluis pli lante. Kaj nun ĝi akceliĝis, kiel dum la rapida ŝakludo. Ne estas tempo por pripensi movojn, oni devas fari ilin. Ni vivas en ia akcelilo simila al sinkrofazotrono. Tiu akcelas korpusklojn, kaj ĉi tiu – la tempon. Mi estas certa, ke tiu problemo – kion faras tiu diabla tempo? – ekscitas sciencistojn kaj filozofojn. Kaj mi estas same certa, ke ili estas malproksimaj de solvo de tiu problemo, sed kiom malproksimaj – mi ne scias. La nuntempa homo havas du alternativojn: aŭ ekdrinki – kaj al vi ĉio estos indiferenta, aŭ vivi normale – kaj vi vivos konstante en tempaj problemoj.

Jen nunmomente mi treege bezonas transiri straton, mi ne havas superfluan minuton por atendi. La transirejo estas malproksime, mi transkuru la straton ĉi tie. Antaŭen!

Aĉ! Diablo ilin prenu, de kie aperis tiu aŭto? Mi ne sukcesas flankensalti, tranĉa jelpo de bremsa, mi falas sur la kapoton, trapikanta dolorego – kaj tio estas la lasta sento, kiun mi memoras...

\* \* \*

Mi rekonsciiĝis en tute nekonata loko eksterurbe, tion mi tuj komprenis. Ankoraŭ ne malferminte la okulojn, mi sentis, ke mi kuŝas sur rigida herbo, kaj la nazon frapas akra fetoro de fumo, de tiu fumo, kiam brulas papero, plastaj saketoj, plastaj boteloj kaj ceteraj forĵetaĵoj de la nuntempa homaro. Mi malfermis la okulojn, kaj la ĉirkaŭanta bildo ankaŭ ne ĝojigis min: fumantaj montoj de la jam nomita rubo sub la malalta nubozo ĉielo.

Mi ekstaris. Kien mi iru por savi min el tiu fuma infero? Sed rubaj montoj fumis de ĉiuj flankoj, do, ĉiuj direktoj estis samegalaj. Mi iris iudirekten sufiĉe longe, ĝis kiam la fumo antaŭe komencis maldensiĝi.

Mi venis al rivero kun malpurega bordo, la surfaco de la rivero estis kovrita de la sama rubo. Sur ŝtono ĉe la rivero dorse al mi sidis fiŝkaptisto. Li mem kaj lia fiŝhoko ne faris eĉ moveton. Lia flosileto kvazaŭmortis en eta spaco inter insuletoj de mucida rubo. La fiŝisto impresis malgaje: kota ĉapelo kun pendanta ĉirkaŭrando, tiel same malpura vesto.

– Karulo, – mi vokis lin. – Ĉu vi diros al mi, kie mi troviĝas? Min batfaligis aŭto... Mi timas, ke mia kapo estas ne tute en ordo.

La viro rigardis min transŝultre, kaj mi ŝtoniĝis. Estis kialo. Antaŭ mi sidis mia bona konato, preskaŭ amiko, Leo, kiu antaŭ kelkaj jaroj pereis senspure.

– Ha, Johano, – li diris indifere, kvazaŭ ni nur hieraŭ disiĝis. – Mi sciis, ke frue aŭ malfrue ni ĉi tie renkontiĝos...

– Kion signifas – ĉi tie? – mi ne komprenis. – Kio estas ĉi tiu hontinda loko, kaj kial ni devis renkontiĝi en tiu ĉi abomenejo?

– Via kapo vere estas ne tute en ordo. Do, vi ankoraŭ ne komprenis? Ĝi estas infero, amiko. Nu, alivorte – geheno. Ĉu konataj vortoj?

– Ha, ĉu infero? – mi akceptis lian ŝercon. – Sed kie estas kaldronoj kun peĉo kaj la kornohava bando?

Leo riproĉe grimacis.

– Vi ĉi tie eĉ sen kaldronoj lupe hurlos, – diris li. – Elpensis oni idiot-ecajn kaldronojn... El ĉi tie neniu ja revenis surteren, tial oni fantazias ĉiajn fabelojn. Neniam estis ĉi tie kaldronoj.

– Nu bone, – mi konsentis, daŭrigante la ludon, proponitan de li. – Sed kial mi trafis en la inferon? Ŝajnas, ke mi ne memoras iujn pekojn, ne perfidis mi la dekalogon.

– Ĉu ne perfidis? Sed, ekzemple, la sepan ordonon? Mi nun ne hipokritos, ĉi tie ne estas senco. Do jene, se diri malkaŝe, via Alina estis, nu... ne sufiĉe belforma. Tial, ĉu vi ne rigardis admire virinojn kun pli rondaj pugo?

– Ahem...

– Nu, vi komprenis. Kaj kio pri ĉiaj ceteraj malgrandaj pekoj? Do, en kian paradizon vi celis?

– Bone, ni supozu, – mi diris. – Ni supozu, ke tio estas vere la geheno. Al mi ĉi tie ne plaĉis tuj dekomence, rubaj montoj, kiuj brulas kaj fiodoras. Kaj per kio ankoraŭ oni punas ĉi tie pekulojn?

– Ho-o-o. Nun mi ĉion rakontos al vi.

Ŝajnis, ke nun li devis, kiel ĉiam estis antaŭe, kontente kaj grimace rideti, eldirante al mi regulan porcion de siaj ekstremaj fantazioj. Sed ne, lia fizionomio restis same senkolora kiel antaŭe. Kaj li rigardis ekskluzive la teron.

– Ĉi tie la tuta sistemo estas tiel pripensita, ke kaldronoj kun peĉo estas superfluaĵo. Jen mi komencos de la unua aĵo, kiun vi vidas. Jen mi kaptas fiŝojn kaj ĵetas ilin sur la bordon. Vi vidas, ke la tuta bordo estas kovrita de la fiŝoj, mi ne bezonas ilin, sed tutegale mi daŭrigas ilin kapti.

Ĉio ĉi jam ne ŝajnis plena absurdo, ia senco en tio estas.

– Sed por kio vi ilin kaptas? Kial elĵetas? – mi demandis, apenaŭ esperante ricevi komprenigan respondon. Leo ĉiam pensis logike.

– Ĉar oni ne povas ilin manĝi, ili estas venenaj.

– Kion signifas – venenaj? Ĉu oni povas sin veneni kaj mortigi? Ni ambaŭ sen tio estas mortaj. – Tiu lia ludo plu interesis min.

– Jes, mortaj, – malĝoje konfirmis Leo. – Kien ni povas plu mortigi? Kaj tiun ĉi fiaĵon ni ne manĝas, por ne suferi pro la ventrodoloro.

– Sed por kio do vi kaptas?

– Mi rigardos vin, kiam vi vivos ĉi tie unu aŭ du jarojn. Nu, “vivos” – tion mi diras konvencie, tio ne estas vivo, ni estas jam mortaj. Ĉiu tie ĉi pro enuo ion por si elpensas. Jen mi kaptas fiŝojn. Aliaj diversajn konkursojn elpensas, ekzemple, kiu kraĉos plej malproksimen, kiu estas la plej pigra, kiu plej multe da falsbrando eltrinkos. La triaj batas la fizionomiojn unu al la alia, kaj simila sortimento.

“Kaj simila sortimento”. Aha, normala esprimo de Leo. Tamen estas bone, ke antaŭ mi staras Leo, ne ia lia netaŭga sozio. Nu, Leo. Li ludu, li ĉiam ludis, tia estas lia hobbio. Sed la tuta ĉirkaŭaĵo tre ege kategorie ne plaĉas al mi, ju plu des pli.

– Nu, kompreneble, – mi diris, – do, enuego. Kaj la loko ĉi tie estas abomena. Vi tranombris al mi, kion oni ĉi tie faras pro enuo. Sed vivi en konstanta enuo aŭ male – tio dependas ja de la homo mem. Kelkaj, kiel vi kaj mi, legas saĝajn librojn, ĉiutage ili ricevas admirojn kaj eltrovojn, kaj de tago al tago ilia vivo estas pli interesa, por ili ĉiam mankas tempo, sed aliaj ne scias, kiel “mortigi” la liberan tempon.

– Vi, Joĉjo, ĉiam ankoraŭ konsideras vin tera loĝanto. Memorfiksu por la komenco: ĉi tie forestas saĝaj libroj, kaj libroj entute. Kaj ĵurnaloj forestas, krom unu. Kaj eĉ tiun vi ne legos – tro naŭza ĝi estas.

– Kiel vi vivas sen libroj?  
– Ho. Forgesu la vorton “vivi”, ni vivis tie, sed ĉi tie...  
– Kio estas ĉi tie?  
– Ĉi tie estas infero. Ĉu vi iam pensis, kial oni sendas kelkajn en la paradizon kaj aliajn en la inferon? Kial ĉio estas tiel establita?

– Ahem... Ne, mi ne havis superfluan tempon.  
– Nu, do pensu ĉi tie. Ĉi tie vi havos pli ol sufiĉe da superflua tempo, ĝis la Lasta Juĝo. Kaj kiam ĝi estos – neniu scias. Eble – neniam. Jen sidu ĉi tie kaj pensu. Vi havas senfinon da tempo.

– Leo, – mi diris kun ekspiro. – Vi ĉiam estis diableto. Vi ĉiam instruis min: kredu neniun, homoj pli al kutimiĝis vivi per mensogo, ol per vero. Vero estas ne interesa pro sia senartifikeco, sed mensogo estas multbranĉa kaj alloga. Vi edukis min: kredu neniun, ne kredu eĉ min, lernu mensogi, aliel vi pereos en ĉi mondo. Do jene, mi nun dubas: eble vi ĉion ĉi mensogas al mi. Kiel vi povas pruvi, ke tio ne estas viaj ĉiamaj mistifikoj?

– Ha, por kiu diablo mi cerbumos pri iaj pruvoj? Neniul mi nun pruvos. Sed kiam vi iom da tempo ĉi tie “vivos” – vi mem konvinkiĝos.

Jes, mi kiel ĉiam havas nenion por kontraŭstarigi al lia logiko.

– Pasos iom da tempo, kaj vi konvinkiĝos, – daŭrigis Leo. – Sed por ke vi havu pli malmulte da seniluziigoj, mi al vi tuj diros, ke ĉi tie forestas ĉio kutima por ni. Ĉi tie forestas libroj, bibliotekoj, teatroj, bildgalerioj, ĉia muziko, krom ebriaj kantaĉoj; forestas bela naturo, belaj virinoj, bona vino...

– Bona vino forestas. Ĉu estas do malbona? – interesiĝas mi kun rikano.

– Ho, vi jam komencas kompreni. Fiaĉa vino, aĉa biero, falsbrando estas ĉi tie – superdrinku, banu vin en ili. Sed ni tion ne trinkas. Se vi trinkas vespere – poste vi dum semajno vomas, malbenas ĉion.

Ŝtono sur mia animo iĝis pli kaj pli peza. Leo estas fantaziulo, sed tiel kohere elpensi improvize eĉ li apenaŭ povus. Krome, tiuj rubaj montoj, fetora rivero... Kaj Leo similas al viva kadavro, vestita per ĉifonoj. Ĉio tre memorigas la gehenon. Ŝajnas, ke Leo ne mensogas.

Nu bone, kion li respondos al tio:

– Kiel kompreni? – mi diris. – Vi kaj mi bezonas, certe, bibliotekojn, teatrojn, sen ili nia vivo estus infero. Sed kiu dum la tuta vivo trinkis ĉian aĉaĵon, kriaĉis ebriajn kantojn kaj batis fizionomiojn – por li kia infero estas ĉi tie? Por li tio estas paradizo.

– Por tiuj ili preparis alian lokon. La infero havas diversajn rondojn.



Estas infera rondo, en kiun tiuj diboĉuloj trafas. Ili tie falsbrandon ne vidas. Oni devigas ilin legi librojn. Kaj ne firmanojn, sed verkojn de Spinozo, Kantio, Hegelo. Vi kaj mi tion plezure legus, sed oni trudas al ni alion. Jen vi, mi opinias, en la surtera vivo ne spektis “dramseriojn”, ĉu?

- Nature.
- Sed tie ĉi vi spektos.
- Pro kiu miskompreno?
- Pro tiu, ke oni donos al vi telekeston, kaj en ĝi estos nur tiuj dramserioj. Kaj krome – ne-ni-o. Vespere sortimento de amuzoj estas neabunda. Aŭ kesto kun dramserio, aŭ naŭza falsbrando. Vi kion elektos? Oni povas ankoraŭ en ia pugnobatalo partopreni. Nu, ankoraŭ estas ludkartoj, domeno por oldaj kaproj.

- Brr, – mi diris. – Jes, vole nevole oni gapos la keston. Estu eĉ dramserio.

- Sed la plej koŝmara aĵo ĉi tie estas degeneruloj.
- Ĉu tiuj, kiuj pro tia “vivo” tute freneziĝis?
- Eble. Neniu scias, kio ili estas kaj de kie aperis. Eble, ili estas estintaj homoj, sed ili malmulte similas homojn. Ili estas proksimume viaj skorioj, nur la nomo estas alia. Ili ne povas, certe, mortigi iun, nin mortigi jam ne eblas. Sed bategi tiel, ke poste viaj ripoj dum monato kunkreskiĝos – tio estas ilia ĉefa amuzo. Nu, ili palpserĉos poŝojn, se oni havas ĵetonojn por falsbrando – ili la ĵetonojn forprenos.

- Por kio? Vi diris ja ke post la falsbrando estas tre malfacile resaniĝi.
- Sed ili estas degeneruloj. Je ili falsbrando influas alie. Por ni la falsbrando estas ja unu el punoj, sed ili mem estas puno. Normalaj loĝantoj laboras, ili pro tio ricevadas ĵetonojn. Por manĝaĵo, ĉifonoj kaj falsbrando. Sed degeneruloj ne laboras, per kio ili ekzistas, mi ne scias. Verŝajne jen el tiu rubo elfosas diversan aĉaĵon.

- Ĉu estas ia savo de ili?
- Strangulo vi estas. Kiu savos vin en la infero? Savu vin mem, nur se vi povos, kaj tiel, kiel vi povos.

- Vi diris ion pri laboro. Ĉu oni ĉi tie laboras?
- Nu... Tio havas alian sencon. Laboro kiel senco kaj enhavo de la vivo – ne. Laboro ĉi tie estas ankaŭ unu el punoj. Ekzemple, vi dum duontago rulas ŝtonon sur monton, kaj ĉe la supro la ŝtono ruliĝas malsupren. Aŭ antaŭtagmeze vi fosas kanaleton, kaj posttagmeze enfosas ĝin. Kaj ceteraj stultaĵoj.

Mi komprenis finfine, kial Leo memorigas al mi vivan kadavron. Dum la tuta konversacio li eĉ unufoje ne ridetis, ne montris iajn sentojn, ne levis la okulojn de la tero. Estas nenia radio de espero por pli bona estonteco. Ĉu post kelkaj jaroj ĉiu perdas ĉion homan?

En tiu tempo post rubaj montoj aŭdiĝis laŭtaj, plej verŝajne ebriaj voĉoj.

Leo stariĝis de la ŝtono, sur kiu li sidis, kaj la fiŝhoko falis el liaj manoj. Lia vizaĝo blankiĝis kiel kreto, en la okuloj estis panika teruro – la unua emocio dum la tuta tempo.

– Nun, Joĉjo, vi pasos, ni diru, batalan bapadon, – li diris, apenaŭ movante la lipojn. – Degeneruloj venas.

Post unu monteto eliris kriplaj estaĵoj, memorigantaj homojn. Ili estis kvin aŭ ses. Purpur-bluj muzeloj, vilaj haroj kaj barboj, malpuraj ĉifonoj. Ŝajnis, ke ili devus naŭze fetori, sed mi sentis nenion similan, verŝajne tial, ke stinko sen tio ĉion ĉirkaŭe superplenigis.

La unua el la venintoj paŝis al mi, eligis ian grunton kaj kunforte elĵetis pugnon en mian nazradikon. Mi tuj senkonsciigis... ..

\* \* \*

Mi malfermis la okulojn kaj vidis, ke mi kuŝas sur lito en nekonata ĉambro. Dum mi penis kompreni, kion ĉio ĉi signifas, malfermiĝis la pordo kaj eniris junulino en blanka kitelo. Mi kuŝis kaj nekomprene palpebrumis.

– Ho! – diris la junulino. – Finfine vi rekonsciigis!

– Kie mi estas?

– Kompreneble kie, en traŭma malsanulejo.

– Ahem, ili ĉi tie ankoraŭ traŭman malsanulejon havas.

– Kiuj – ili?

– Nu, tiuj, la geheno.

La junulino gaje ekridis.

– Ĉu la geheno? – daŭrigis ŝi ridante. – Nu, tion ni ne permesos. Ha, ha, ni eĉ ne atendis, ke vi evidentiĝos tia ŝerculo.

En mia kapo ekmovis sin malforta espero. Ĉu tio vere estis nur koŝmara sonĝo? Leo ja diris, ke *tie* forestas belaj virinoj, sed la flegistino plene tion dementas.

– Kara nia malsanulo, – ŝi karese daŭrigis. – Por ni ne estas pli granda ĝojo ol tio, kiam la trafintaj al ni revenas el tiu via “geheno”.

Ŝi kliniĝis super mi, por desinfekti vundon sur la frunto, kaj en la dekolt-aĵo de ŝia kitelo mi vidis belajn junajn mamojn.

Kaj mi komencas iom post iom malblindiĝi. Nu certe! En la geheno tia beleco ne povas ekzisti tutcerte. Sendube, mi estas en nia normala mondo! Mi volis eksalti kaj ĝoje ĉirkaŭpreni la karan flegistinon, sed nur ekĝemis pro doloro.

Jes, tamen min batfalis aŭto, kia tamen aĉa rampulo estas tiu ŝoforo. Sed kia bagatelo estas tiuj cirkonstancoj en komparo kun tio, ke mi estas finfine *ĉi tie!*

*La Ondo de Esperanto*, 2015, №4-5, p. 19-21.

# Fiasko de imperio

En la Granda Urbo sur la Monto vivis libera homo kun la nomo Keneo. Laŭ sia kutimo li eliris iumatene sur la ĉefan placon. En tiu tempo gazetoj ankoraŭ ne ekzistis, oni elpensis ilin multe poste. Kaj tiam iri sur la ĉefan placon estis la nura maniero ekscii novaĵojn. Se vi sukcesos – vi vidos kaj aŭdos heroldon, kaj se ne – placaj gapuloj rakontos ĉion al vi.

Sed en tiu mateno Keneo sukcese aŭdis heroldon. La heroldo venis senpere de la Imperiestro kaj proklamis:

– Hieraŭ okazis konsiliĝo ĉe la Imperiestro mem. La kunvenintaj Grandaj Pastroj diskutis la demandon de la nombro de la loĝantaro. La Pastroj anoncis ke la nombro malaltiĝas. Kaj la kialo estas malaltiĝo de *libido sexualis*. Tiu vortokombino sonis unuafoje, kaj la Pastroj klarigis al la plebo, ke tio simple estas la seksa volupto. Al Keneo tio estis ne multe pli komprenebla, ol la libido sexualis, tamen li konjektis, ke tio estas verŝajne simpatio kun virinoj.

En tiu tempo urbanoj jam elpensis “la amaran akvon” kaj ne simplan. La posedantoj de drinkejoj, por pli oftaj venoj de gastoj, el tiu ĉi amara kaj fiodora laŭ sia naturo likvaĵo per diversaj aldonoj faris plene allogan trinkaĵon. Kaj tial la urbanoj de la vira sekso anstataŭ amuzoj kun siaj edzinoj pasigis la tempon en drinkejoj.

Sed temas pri alio. La Grandaj Pastroj proklamis, ke estas neceso de seksa revolucio. Tio estas ke ekde ĉi tago ni devas plialtigi la ĉarmon de la virinoj. Kaj ni permesas al ili por komenco iradi nudabruste en termoj.

– Kaj kie estas la revolucio? – Keneo demandis sian amikon Digono, kun kiu li estis sur la placo.

– Ha, ha! – ridetis Digono. – Ni ankoraŭ vidus...

Ni ne scias, ĉu longe aŭ nelonge Keneo ne eliris el la hejmo. Pri sia kuranta vivo li estis okupita. Kaj Digono ne venis al li. Ankaŭ lin eble la ĉiutageco kaptis. Sed finfine Keneo lasis la hejmon.

Denove li sukcesis spekti kaj aŭskulti heroldon. Kaj tiu ĉi anoncis: De

hodiaŭ al ĉiuj virinoj de la Granda Urbo estas permesite iradi nudbruste ne nur en termoj, sed ankaŭ je distanco de 100 klaftoj de ili.

“Nu bone, – kontente subridis urbanoj, – ni vagos pli proksime al la termoj!”

Sed ankoraŭ post du aŭ tri tagoj Keneo aŭdis sur la placo historion, kiu profunde teruris lin. Kiam fremdaj barbaroj vidis proksime al termo nudbrustan virinon, ili mortŝtonumis ŝin. Digono ĉion ĉi vidis, laŭ liaj vortoj tiu estis Irida. La plej malĝoja afero estas ke Keneo konis ŝin, bona fraŭlino ŝi estis. Damnitaj barbaroj! Kion ili faras al ni!

De kie tiuj sovaĝuloj subite aperis? Kiam oni iras tra la stratoj, jam ĉiu tria estas brunhaŭta kaj nigrahara barbaro. La Imperiestro kaj la Grandaj Pastroj devas ion fari kontraŭ tio. Kio, ĉu la leĝoj ne permesas? Ŝanĝu la leĝojn!

Post tiam Keneo ne estis sur la placo dum kelkaj monatoj. Kaj kiam li venis tien, lin mirigis la novaĵo: virinoj senhonte iris nudbruste tra la tuta urbo. Barbaroj nur rabie kaj envie rigardis ilin. Kiel rapide homoj al ĉio al-kutimiĝas.

Kaj tiutempe aperis heroldo kaj anoncis novan verdikton de la Grandaj Pastroj. Por plua pligrandigo de virina ĉarmo al ili estas permesite iri en siaj hejmoj, en termoj kaj proksime al tiuj lokoj ne nur nudbruste, sed ankaŭ multe pli nudigite. La permesebla grado de nudigo determinita ĉe tio ne estis. Post tiu anonco la heroldo kunvolvis sian pergamenon kaj foriris.

Baldaŭ la fabelo estas rakontata, sed ne baldaŭ la afero farata. Longe Keneo ne estis ne nur sur la placo, eĉ en la urbon li tute ne eliris. Finfine li eliris. Ho, liaj kruroj preskaŭ fleksiĝis pro surprizo. La urbo jam delonge ŝanĝiĝis. Unu afero ŝajnas plaĉi: ĉiuj virinoj fariĝis multe pli allogaj. Tre mal-multe da vestoj restas sur ili, ili kovras nur la plej interesajn lokojn, hmm, hmm... La barbaroj rigardas ilin oblikve kaj rabe, ŝajnas, ke ili tuj atakos la unuan preterpasantan knabinon, sed ili timas, verŝajne. Ili ne estas sufiĉe multaj por establi siajn sovaĝajn morojn.

Dume la Imperiestro komencis militon kontraŭ la nordaj barbaroj. Li sendis militi ĉiujn, kiuj kapablis teni glavon kaj pafarkon en siaj manoj kaj sidi en selo. Keneo aliĝis al la armeo, ĉar li havis flojn. Imperiestro scias, vi komprenas, kiun sendi. Se Keneo mortos tie, restos iu por daŭrigi la klanon. Sed Digonon li ne prenis, li havis nur filinojn. Jene...

Keneo ne spertis en sia vivo ion pli teruran ol la militon en la Nordo.

En la Imperio ili kutimis batali tiel: en ĉaro tirata de paro da bonaj trotuloj, sidas du militistoj – unu direktas, la alia pafas per pafarko kontraŭ la malamikoj.

Sed la barbaroj ne havas vojojn. La ĉaroj tie montriĝis senutilaj, la batalantoj devis forlasi ilin kaj rajdi laŭ iliaj arbaraj padoj. Kaj ili faris embuskojn sur ĉi tiuj vojoj, kaj mortigis niajn soldatojn. Kvankam la barbaroj ne kapablas legi kaj skribi, ili batalas, ne kompatante siajn vivojn. Kial do ili kompatu? Ili havas malmultan teron; ili multiĝas, sed ili havas nenion per kio ili povu vivi, tial ili subite aperis en nia Imperio. Kiom da urbanoj estis mortigitaj en ĉi tiu milito, pri tio nek la fabelo diras, nek la plumo skribas.

La Imperiestro estis devigita replenigi la armeon. Inter la alvenintoj estis amiko, kiu alportis leteron de Digo. Lia amiko skribis:

“Mia kara Keneo, mi sincere deziras al vi sani. Tri monatoj pasis, de kiam vi estas en la sovaĝa Nordo. Kaj estis neniuj novaĵoj de vi dum ĉi tiu tempo. Mi ne volas diri ion malbonan, sed venas novaĵoj, ke niaj homoj mortas tie kiel muŝoj. Dume la eventoj disvolviĝas; ekde via foresto la knabinoj promenas tra la urbo tute nudaj, ili tute ne hontas. Antaŭe viroj ekprenus ilin – kaj trenus en iun korton, sed nun neniuj havas tian deziron. Kial ni bezonas ian junulinon, se ekzistas trinkdomo sur ĉiu strato? Mi venis tien – kaj ĉiujn plezurojn havas. Estas eĉ pli da barbaroj, sed ĝis nun ili ne estis arogantaj. Mi mem ne vidis tion, kvankam cirkulas malsamaj famoj pri ili”.

La barbaroj plene venkis la imperian armeon kune kun la novaj soldatoj. Nur mizeraj restaĵoj ekiris returnen. Iuj pelis la ĉevalojn ĝismorte kaj fuĝis piede. La barbaroj atakis ilin el embuskoj kaj mortigis. Ne multaj sukcesis eskapi. Kvankam Keneo havis plurajn pusajn vundojn, li restis viva.

Li atingis la Urbon viva kaj eĉ surĉevala. En la malmultaj monatoj, kiam li forestis, la Urbo ŝanĝiĝis, kvazaŭ ĝi fariĝus tute alia. Forgesinte, kio estas honto – se ili iam havis ĝin – fraŭlinoj vagadis tra la urbo tute nudaj, kaj la urbanoj ne atentis ilin. Kaj li mem post ĉio spertita, post la sango kaj post ĉiuj vundoj kaj puse ne havis intereson al ili. La sovaĝaj barbaroj iĝis pli multaj ol la veraj urbanoj. Ili kaptis nudajn knabinojn je ĉio, kio venis en iliajn senbridajn kapojn, kaj tiris ilin al izolitaj lokoj...

Li rememoris la seksan revolucion, proklamitan de la Grandaj Pastroj antaŭ unu jaro. Kompreneble, la Grandaj Pastroj ĉiam pravas: la revolucio okazis. Pasos unu jaro aŭ du jaroj, kaj la Urbo pleniĝos per krioj de infanoj. Infanoj tamen estos brunhaŭtaj kaj nigraharaj. Sed Keneo klare antaŭvidis, ke siajn tagojn li povas nombri, kaj ke li ne ĝisvivos tiun malhonoron...

*La Ondo de Esperanto*, 2019, №11, p. 62-64.

# Troa tago

## 1

Sonoris la vekhorloĝo. Mi, ne malfermante la okulojn, malvigle etendis la manon kaj premis la butonon. Poste mi sentis, ke ĉe miaj piedoj, kiuj elstaras de sub la litkovrilo, frotiĝas Baloro.

“Ha, sentaŭga kato, – mi ridetis, – li tamen superfortis la kuirejan pordon kaj aperis”. Mi ĉiam fermas lin tie por nokto, por ke li ne venu kaj ne malhelpu dormi. Mi sidiĝis sur la lito, volis preni Baloron en la manojn kaj riproĉi. Sed kiam mi malfermis la okulojn, timigite retiris la manon. Anstataŭ nia griza-blanka Baloro ĉe miaj piedoj sidis kaj indiferente lavis sin dika katego, nigra kiel peĉo.

“Kiu diablo! Ĉu tiu penetris tra la ventolgiĉeto?” Laŭ mia dorso kuris malagrabra vento. Hieraŭ vespere tiu kato ne estis. Se estus hejme Nataŝa kaj Vika, mi opinius, ke ili alportis ĝin, kvankam ili tian deziron neniam montris, ni havas sufiĉe da zorgoj kun Baloro. Se mi hieraŭ vespere venus, ekzemple, post amika drinkado “apenaŭ viva”, mi povus, ne rimarkinte, enlasi ĝin en la pordon. Sed mi hieraŭ ne pekis, eĉ botelon da biero mi ne trinkis. Mi legis, preparis vespermanĝon, ian ordigon faris.

Mi levis min kun deziro elĵeti ĉi tiun neinvitan gaston sur la ŝtuparon, sed tio, kion mi ekvidis, devigis min ankoraŭ pli konsterniĝi. En la mezo de la ĉambro kuŝis, substerninte ian ĉifonaron, nerazita viraĉo, malpura kaj fiodora kiel senhejmulo.

Dum kelkaj sekundoj mi ne kuraĝis alpaŝi al li, poste mi kuraĝis kaj kun abomeno tuŝis per mia piedo lian ŝultron. Li malfermis la okulojn, sidiĝis kaj mire ĉirkaŭrigardis la ĉambron. Mi ne sciis, kion atendi de li, tial mi konvinkiĝis, ke miaj halteroj kuŝas sur sia loko, en ekstrema okazo ili estos utilaj.

– Kiel vi trafis ĉi tien?



– Mi ne memoras. – Li skuis la kapon kaj kulpe ridetis, kvazaŭ li volus diri: nu, trodrinkis mi hieraŭ, kio do, pardonu, bona homo.

Mi laŭtigis la voĉon:

– Nu, kiel vi ĉi tien trafis, vi ne memoras, sed kion vi memoras? Ĉu vi memoras almenaŭ, kiu vi estas?

– Homo, kiel vi vidas... – li ĉiam same kulpe, kiel al sia amiko, ridetis.

– Nu vi, aĉulo, ĉu vi komprenas almenaŭ ion?

Bati sidantan homon, kvankam li estas kanajlo, tamen ne decas, mi kaptis lian fiodoran ĉemizon kaj starigis lin.

– Fi, forlasu min! – Li forŝiris sin, saltis sur la liton, poste en la fendon inter la lito kaj la muro – kaj malaperis...

Ahem... fabeloj. Nun la instruita kato, verŝajne, komencos paroli ion. Li ĉiam ankoraŭ sidis sur la lito.

– Nu, kion vi diros? Ĉu ankaŭ vi estas el tiu fikompanio?

La kato ekkriis, kvazaŭ oni piedpremus lian voston, saltis malantaŭ la liton kaj malaperis inter la muro kaj la plankoplinto.

Kio do ĉio ĉi estas? Kial tiu tuta idiotaĵo devis okazi, kiam mi restis hejme sola, mi ne havas eĉ iun por rakonti. Sed Nataŝa kaj Vika ne kredus je tiu absurdaĵo. Jen ĵus estis viraĉo kaj kato, kaj – nenia postsigno.

Mi volis preni de la tablo liniilon por palpi per ĝi inter la muro kaj la plinto, kaj denove konsterniĝis. La aĵoj de la trampo ja restis. Li dormis sur ia malnova palto kun duone senhara astrakana kolumo, kaj apude staris lia dorsosako, polurbilanta pro malpuraĵo. Mi eksidis sur la liton, la unua penso estis la plej ĉiutaga: ĉu ne alportis la trampo pedikojn? Estus necese elporti la ĉifonaron en rubujon, sed kiel ĝin tuŝi?

Dum mi tion pripensis, knaris la enira pordo. Kia diablo? La torento de neinvititaj gastoj ne finiĝis. La pordo ja estis ŝlosita! Mi venis en la antaŭĉambron. Tie staris knabino proksimume dekdujara.

– Onklo Vlado, la patrino sendis min pruntepreni de vi iom da terpomoj.

Ahem, ŝi, ŝajnas, bone konas min, sed mi vidas ŝin unuafoje. Sed ĉu mi enketu la infanon: kiu estas vi kaj kiu estas via patrino?

En la kuirejo, saturita per odoro de io ne bongusta, min kun rideto renkontis dika flavhara virinaĉo. Mi plian fojon por momento konsterniĝis, sed, kunpremite la dentojn, reregis min kaj simple diris, kvazaŭ ĉio estus en plena ordo:

– La infano bezonas terpomojn, – kaj poste adresis al la knabino: – Kial vi ne prenis sakon por terpomoj?

– Ha, donu al mi tute iomete kaj volvu en ĵurnalon.

Kia ĉarmo estas tiu knabino!

Mi elmetis el kesto kaj volvis en ĵurnalon kvin-ses grandajn terpomojn. La knabino dankis kaj forkuris. Ahem...

– Kaj nun mi aranĝos ordon kun vi, sinjorino. Nu, unue, la plej simpla kaj natura demando: kiu vi estas?

– Vi daŭrigas viajn stultaĵojn. Prefere ni ne daŭrigu. – Ŝi iom silentis. – Jen mi preparis al vi ovaĵon kun haringo kaj kafon. Manĝu, dume ĉio ne malvarmiĝis.

– Aŭskultu, vi, dika simio!.. – Estis ega deziro ĵeti sur ŝian fizionomion la paton, sed mi detenis min. Poste mi prenis la paton kaj elĵetis en la rubujon tion, kio en ĝi estis. La kafon, aŭ kio tie estis anstataŭ ĝi, mi elverŝis en la deflukuvon.

– Almenaŭ ili laboru profesie, kiuj sendis ĉiujn vin. Por ĉiu okazo komuniku al ili: en nia familio neniu manĝas ovaĵon kun haringo, kaj kafon ni ankaŭ ne amas. Se vi volis veneni, vi devus elekti ion pli bongustan.

Sur la vizaĝo de la virino – pli volonte mi nomus ĝin porkina muzelo – aperis sincera ĉagreno.

– Kial vi elĵetis? Vi paŭtas kontraŭ mi, sed ĉu ankaŭ kontraŭ manĝaĵoj? Mi mem manĝus.

Ahem, ŝi senarmigis min per sia mildeco. Antaŭ unu minuto mi volis ĵeti la paton sur ŝin, kaj poste bati tiun porkinan muzelon, ĝis ĝi transformiĝos al sanga miksaĵo. Sed nun miaj manoj malleviĝis. Ne decas tio por viro. Jes, ŝi tre similas al porka muzelo, tamen ŝi estas virino.

Mi decidis, ke estas sence voki policon, mi povas trafi en ridindan situacion. Tiu virinaĉo malaperos en la fendo inter la muro kaj la plinto kiel tiu trampaĉo. Mi ne dubas, ke ĉiuj ili, inkluzive de la knabino kaj la kato – ĉiuj estas unu bando.

– Jen, sinjorino, – mi diris, – mi ne scias, kion fari kun vi plu. Elĵeti vin el la loĝejo, mi opinias, estas sence, ĉar ŝlosita pordo por vi ne estas obstaklo. Mi ne scias, kiu vin sendis, kion vi intencas, por ĉiu okazo mi donas informon: ni ne havas ion interesan por via bando. Komputilo, televidilo, magnetoskopo – ĉio estas tiel malnova, ke neniu ilin aĉetos. Nia tuta vestaĵo estas portita. Librojn nun estas varo ne multe aĉetata, kaj tiuj, kiuj estas, valoras nur por mi. Oron ni ne havas. loma mono estas, sed ĝi estas en banko. Kvankam... por kia diablo mi instruas vin, vi ne estas stultuloj kaj ne bezonas mian instruadon. Kaj vi atakis min, verŝajne, ne pro aĵoj kaj

mono. Sed pro kio? Dume mi ne scias. Sed mi pripensos la situacion. Mi, sciu, ne ĉagreniĝas kontraŭ menskapabloj. Ni rigardu, kiu superos.

Ŝi aŭskultis min kaj humile palpebrumis per siaj porkaj okuletoj. Ŝia nura avantaĝo estas la humileco, virina malforteco. Aliaj avantaĝoj for- estas. Ili povus sendi ĉarman belulinon, por ke viro lasu sin delogi, sed ne ŝtipon kun porka muzelo.

## 2

Mi ne povis daŭrigi tiun sensencan konversacion, estis tempo iri al laboro. Elirante el la loĝejo, mi renkontis naz-al-naze liveristinon de telegramoj. “Bone, ke mi trafis ĝustatempe. Subskribu”.

Mi certe sciis, ke al miaj parencoj ne okazis io malbona, aliel mi sentus tion eĉ trans miloj da kilometroj. De kiu povas esti la telegramo? En la enirejo estis jam sufiĉe hele, por kompreni literojn sur la algluitaj paperaj strioj. “Sxargxu orangxojn per bareloj fratoj Karamazov”.

Nu bone, mi ŝarĝos. Ho, mi al vi tiel ŝarĝos! Tio min eĉ iom trankviligis. Nenio nova, ĉio daŭras en la sama maniero.

Sur la busa haltejo evidentiĝis, ke en miaj poŝoj forestas eĉ ŝanĝmono por veturo. Tio ne estas mia distriĝo, pli verŝajne tio estas la ĉarma knabineto, la tiel nomata najbarino. Nu, *ili* ĝislime jam etanimiĝis. Mia pasporto kaj banka karto en ĝi estis bonŝance en sia loko. Mi devos iri ĝis la plej proksima ATM, al laboro mi, sendube, malfruos.

Kiam mi nur foriĝis de ATM, iu tiris mian manikon. Antaŭ mi staris Panikovskij, nu, Zinovij Gerdt en lia aspekto.

– Donu milionon, donu milionon, donu milionon! – diris Panikovskij, idiote grimacante. En alia momento mian dorson trakurus superstiĉa malvarmo. Ja Zinovij Jefimoviĉ mortis antaŭ multaj jaroj. Nun mi nur rimarkis por mi mem, ke tio estas jam la dua epizodo el *La ora bovido*<sup>1</sup>. Ĉu la fantazio de miaj nekonataj kontraŭuloj jam elĉerpiĝas?

Al laboro mi iomete malfruis. Mi antaŭsentis, ke ankaŭ ĉi tie min atendos ia embaraso.

---

1. *La ora bovido*. Satira romano (1931) de Ilja Iljif (leĥiel-Lejb Fajnzilberg) kaj Jevgenij Petrov (Jevgenij Katajev), en kiu friponoj penas ŝteli monon ĉe la kaŝita milionulo Aleksandr Ivanoviĉ Korejko. La samtitola komedia filmo kun Zinovij Gerdt kiel Panikovskij kaj Jevgenij Jevstignejev kiel Korejko aperis en 1968.

Jes, min ne rekonis la gardisto kaj la kolegoj, kiujn mi renkontis en la koridoro. La gardisto skribis al mi unufojan paspermesilon kiel al ia flanka vizitanto.

Sur mia laborloko, ĉe mia komputilo sidis la subtera milionulo Korejko. Kun satenaj manumoj. Memkompreneble, Jevgenij Jevstignejev. Tie ĉi mi finfine deprimiĝis. Kion ili faraĉas kun mi? Se ĉe mia tablo sidus iu kun abomena fizionomio, mi eble tiun fizionomion vangobatus. Sed la aktoron Jevgenij Jevstignejev mi ĉiam estimis. Mi komprenis, ke en ĉi tiu oficejo mi estas nenio.

La gardisto ĉe la elirejo, rigardinte mian paspermesilon, kriis:

- Metu subskribon pri la foriro!
- Kies subskribon?
- Nu, kie vi estis. De Aleksandr Ivanoviĉ.
- Do, de Korejko... – mi murmuris per falinta voĉo.

Ne senesperigi ĝisfine al mi helpis mia neracia optimismo. En similaj okazoj mi ne pentras bildojn de senespero por la estonteco. Ŝajne mi perdis la laboron, en la loĝejo okazas nekompreneblaj eventoj. Kaj ne nur en la loĝejo: Panikovskij, Korejko, telegramo pri oranĝoj. Mi bezonas ĉion ĉi pricerbumi. Pli bone estas ne veturi dume hejmen. La piedoj mem portis min al trolebusa stacio, mi mekanike veturis ĝis la lasta haltejo. Ĉi tie apude estas nemulthoma kafejo kun teraso sur la bordo de lageto, kovrita de salikoj kaj kanoj, loko sufiĉe romantika.

Mi sidiĝis, kompreneble, sur la teraso por ke la aspekto de la lageto estu pli bela, mendis karafeton da forta vino kaj seriozan matenmanĝon. Tiun, kiun preparis la falsnomita edzinaĉo, mi ja elĵetis, kaj la sana bezono manĝi matene ne atendigis. Dekomence mi sufokis la malsaton, poste verŝis pokalon da vino kaj, trinketante ĝin poglute, komencis cerbumi. Pokalon da vino aŭ glason da biero mi neniam trinkis plezure kaj lante, sed ĉiam eltrinkis unuglute. Mi ne volis perdi tempon por lanta plezuro, ĉiam urĝis aferoj. Sed hodiaŭ tiaj aferoj forestas...

La unua demando, veninta en mian kapon, estis ŝajne neprincipa. Kio estas tiuj homoj: "mia edzino", la senhejmulo, Panikovskij, Korejko? Kiuj estas ili: talentaj aktoroj, kiuj ludas senmakule, aŭ oni manipulas min hipnote? La intereso estas ne vana, tio estas ia vojo al solvo. Se aktoroj – ili estas kvankam ekstreme talentaj, sed homoj. Kaj se hipnoto – apenaŭ tia forta hipnoto ekzistas. Krome la senhejmulaĉo kaj la kato malaperis inter la muro kaj la plinto. Tio jam ne estas teatro...

Ĉi tie agas iaj superfortoj, kiuj ankoraŭ neniu renkontis. Kaj se iu renkontis – tiu silentas. Ĉu mi rakontu ĉion ĉi al iu? En la plej bona okazo oni priridos min, kaj en pli malbona... En la plej malbona oni metos en frenezulejon.

Ni supozu, kiel en la teda sciencfikcio: iuj aliplanedanoj faras eksperimenton pri terano, tio estas, pri mi. Kiel li kondutos, se ni ĵetos lin en la unuan cirkonstancon, en la duan, la trian? Ni supozu. Sed en tiu okazo, kial ili enĵetas min nur en malagrablaĵojn: la fetora trampo, la porkinsimila “edzino”, la perdo de la laboro?

Kial ili ne sendis al mi, ekzemple, agrablan kunparolanton? Tio estas por mi “malsana” temo. En la laboro ĉiuj konversacioj estas nur pri la produktado, kun Nataŝa – pri Vika kaj pri ŝia estonteco. Nu, libroj... Sed oni volas ja homan komunikaĵon. Mi sidus ĉe tablo kun interesa homo, ni trinkus po glaseto aŭ po du, trinkus bieron kun sunsekigita fiŝo, parolus pri la vivo, pri perspektivoj de Ruslando, kritikus ĉiujn ĉi kriplulojn, kiuj nun ĉion administras. Kun Nataŝa kaj Vika tiaj konversacioj ne sukcesas.

Aŭ ili povus sendi al mi mirandan belulinon, kiu iĝus provizore mia edzino. Nu, tio estas pura teorio, mi tute ne pensas pri ia adulto.

Sed ili sendas nek tion, nek alion, nek ion agrablan trian. Ili havas propran metodikon de eksperimentoj, kraĉi ili volas, kio al mi estus agrabla kaj male. Sed ĝis kiam ili intencas eltiri el mi nervojn per ĉio ĉi? Eltiri... Eltiri?

Mi volis fari gluton da vino, sed la mano kun la pokalo pendiĝis je kelkaj centimetroj de mia buŝo. Tiel mi sidis, verŝajne, sufiĉe longe. Du junuloj de azia aspekto ĉe najbara tablo kelkfoje mire rigardis min. Eble ankaŭ tiuj du komencos nun iajn miraklojn fari?

Neatenditan fluon de asocioj elvokis en mi la vorto “eltiri”. Eltiri... eltiri... kion? La nervojn... la animon... Aha, ili eltiras el mi la animon. Psikologia atako, tiel ni diru. Ahem, pensu, homo, pensu...

Unue, kiu kaj por kio povus bezoni mian animon? Denove eniĝas en la kapon librecaj ŝablonoj. Aliplanedanoj. Mefisto... Ne, la lasta simple venus kaj proponus marĉandon. Ne, al diablo iru la tuta absurdo: aliplanedanoj, Mefisto. Neniam ĉeestis odoro de sulfuro, mi devas serĉi ion pli proksime, sur *tiu ĉi* flanko.

Resume: ĉu iu povas bezoni mian animon? Jen la demando. Nur nun mi povis albuŝigi la pokalon kaj fari gluton da vino. Ĉu iu povas bezoni?.. Ĉu mi havas ĝin, la animon, kaj de kia kvalito estas ĝi por esti bezonata al iu? Kio estas ĝi? Pri la animo multe parolas la eklezio: venu al ni, preĝu, starigu

kandelojn, plenumu fastojn, legu Bibliion, vivpriskribojn de sanktuloj, kantu psalmojn, nur tiel vi povos savi vian animon. Ĉio ĉi estas malproksima de mi. Mi sentas la animon alie. Se oni vidas ĉirkaŭ si moralan kriplecon, nejustecon, senkompaton, mensogon, stultecon, mokadon pri beleco, kaj io doloras ene – kio estas tio, se ne la animo? Kaj se oni ĝojas pro hazarda bona rigardo, pro susuro de aŭtuna foliaro, pro ruĝaj nuboj dum sunsubiro, pro kvietaj lunhela nokto – ĉu tio ne estas animo? Kaj per kio krom animo mi povas percepti la saĝecon de antikvaromaj filozofoj, la belecon de antikvagreka kaj mezepokaj japanaj poetoj, la hindan muzikon?

Ĉio ĉi signifas, ke mi havas animon, sed kiu bezonas ĝin? Tiu, kiu ĝin ne havas, sed volas havi. Ekzemple. Vivis averaĝa knabo en urbeto, kiun oni ne sur ĉiu mapo povas trovi. Bona knabo, li ĝojis pro hazarde veninta pup-teatro, pro hokeo en la korto kun hokeilo eltranĉita el tabulo, pro lignofajro ĉe bordo de lago, kaj pro konkoj kolektitaj ĉe rando de la akvo. Kiam li estis pli aĝa, li verkis malglatajn versojn al samklasanino, kaj estis senlime feliĉa, kiam ŝi legis ilin kaj ridetis.

Poste, kiam li iĝis tute granda, venis fitempoj, kiam supre oni anoncis: ĉiujn riĉaĵojn de la lando oni rajtas disŝteli. Nia junulo komprenis, ke tia sortodonaco okazas unufoje dum mil jaroj, kaj li ekvivis laŭ la cirkonstancoj. Tie mensogis, tie perfidis, tie rabis, tie kontraŭulon en betonon enmurigis (ne juĝu severe la knabon, la tempo estis tia: se vi ne enmurigus, oni vin enmurigos). Li elvivis en ĉiuj ĉi disputoj-pafadoj kaj finfine atingis sian revon. Kaj palacon kun baseno kaj gardantaro li havas, kaj multekostajn aŭtojn ŝanĝas kiel gantojn, kaj sur ĉiajn kanariojn povas flugi, se deziro aperas.

Jen foje li sidis vespere, trinketis multekostegan, nur por li atingeblan vodkon (aŭ konjakon, viskion, tekilon), kaj rememoris la hokeilon eltranĉitan el tabulo. Kaj lia mentono subependis. Kiel? Estis nur tiu hokeilo – kaj estis ĝojo kaj feliĉo. Kaj nun estas ĉio, kion nur la animo dezirus, sed kie estas ili – ĝojo kaj feliĉo? Kiel mi diris: nur la animo dezirus? La animo, animo... Eble en ĝi estas la tuta kialo? Tiam ĝi estis, sed nun, plej verŝajne, forestas. Ĝi ie tie en disputoj-pafadoj mortaĉis. Jen fia! Nun mi ĝojus, kiam mi ĉion havas, sed ĝi elpensis mortaĉi.

Aha, animo do forestas, sed, ha, por kio mi havas monon? Kiu malhelpas aĉeti ĝin? Ha, neniam obstakloj. Sed indan animon neniu vendos, li mem ĝin bezonas. Tial mi prenu perforte.

Li trovis iajn potencajn hipnotistojn, ekstersentulojn (kia idioteca

vorto!), sorĉistojn. Mi ne kredas serioze je tio, sed se estas probableco eĉ se kun kvin nuloj post la komo, do, kredas mi aŭ ne kredas, sed ili ekzistas.

Jen la labora hipotezo. Estas spaco por pripensado. Domaĝe, ke la karafeto estas jam malplena, mi mendu ankoraŭ unu...

### 3

Ĝis la vespero mirakloj ne plu estis. Verŝajne, ili donis al mi eblecon ripozigi, ĉar vespere denove ĉio daŭris.

Kiam mi venis hejmen, la enirpordo estis neŝlosita. En la loĝejo amasiĝis kompanio de nekonatoj, ĉirkaŭ dekopo. Laŭta muziko, tabaka fumo, fiaj dancoj. Tabloj estis starigitaj meze, sur ili staris boteloj, restaĵoj de ia neapetita manĝaĵo, telero kun cigaredstumpoj. Min neniu rimarkas, mi estas konsiderata, verŝajne, kiel unu el ili, nu, li eliris provizore kaj revenis. En la kompanio estis ankaŭ tre neallogaj virinoj, sed la matenan "edzinon" inter ili mi ne vidis.

Mi miris: de kie venas la laŭta muziko? Mi neniam havis tiajn potencajn aparatojn, ankaŭ ĉi tiuj homoj (sed ĉu homoj?) nenion alportis kun si. Mi iris tra la loĝejo, penante ne malhelpi, kaj konvinkiĝis, ke iaj fontoj de la muziko forestas, ĝi simple pendas en la aero. Mi eliris sur la ŝtuparplaceton – tien eĉ unu sono ne penetris. Nu, nenio mirinda.

Mi denove venis en la loĝejon. Min ĝoje renkontis Pankratov-Ĉornij<sup>1</sup>.

– Ho-o, Vlad Ivaniĉ! Ni iru, trinku po kvindek gramojn...

Ni sidiĝis ĉe tablo.

– Mi, Ivaniĉ, estimas vin. Vi estas simpla, kun vi oni ĉiam povas trinki po unu grameton. Kaj tiu ĉi kunvenaĉo... Iru ili al diablo! Ek, Ivaniĉ. Se temas pri zakusko, tiu temo jam, verdire, ne abundas, sed jen – citronoj ankoraŭ estas, manĝu citroneton.

Tiu kunparolanto baldaŭ tedis min, ni ne diru pri la cetera kompanio, kaj mi nerimarkeble foriris. Mi ne volis iri ien konkrete. Mi ne estas ŝatanto de amuzejoj, vespere mi kutime estas okupita pri pli interesaj aferoj. Sed hodiaŭ hejme pri iaj aferoj ne temis. Mi eniris en la plej proksiman picejon, ie mi devis pasigi tempon. Same kiel en la kafejo apud la lageto mi mendis karafeton da portovino. En la kafejo mi trinkis du karafetojn,

---

1. Pankratov-Ĉornij, Aleksandr (Панкратов-Чёрный, 1949-). Sovetunia kaj Ruslanda aktoro kaj reĝisoro (aŭtente: Aleksandr Gusev).

kun Pankratov-Ĉornij ni trinkis po du glasetoj. Nenio ebriigas, la kapo estas pura kaj hela, sed ideoj en ĝi tute mankas.

Mi neniam estis en ĉi tiu picejo, kvankam ĝi estas je triminuta paŝ-distanco de mia domo. La amuzejo estas kontentiga, sed vizitantoj ne abundas. Tial mian atenton tuj allogis pitoreska paro. Precipe ŝoka aspektis la viro, proksimume samaĝa kun mi. Kvazaŭ Robinsono, reveninta hieraŭ de sia insulo. Barboza, longharara, en ledaj jaketo kaj ĉapelo, kiun li ne demetis eĉ sidante ĉe la tablo.

Sed ankoraŭ pli mistera estis lia kunulino. Mi ne arogas priskribi ŝin, tio estas super miaj fortoj. Se oni intencus priskribi nebelan virinon – kio povas esti pli simpla? Ekzemple, dikaj vangoj, etaj ŝvelintaj okuloj, nazo kiel terpomo – nenion pli, la bildo estas preta. Alia ekzemplo: longa malgrasa vizaĝo kaj longa nazo. Ĉu sufiĉas? Jene.

Tio estas verŝajne miaj ebriaj fantazioj, la vino finfine batis la kapon. Mi volus ekspliki mian penson: la kunulino de la barbulo estis tiel rare bela, ke nur pentristo de granda talento povus figuri ŝin sur tolo. Mi povas diri la nuran vorton: perfekteco. Ĉu estas vortoj por priskribi la perfektecon? Mi tiajn vortojn ankoraŭ ne inventis, kaj, verŝajne, ne nur mi.

La barbulo kaj lia kunulino ne rigardis min eĉ unufoje, sed mi sentis, ke ili min observas eĉ ne rigardante. Mi ne dubis, ke ili estas daŭrigo. Estis personaĵoj de *La ora bovido*, poste Pankratov-Ĉornij, nun estos Robinsono Kruso. Sed kiu estas lia kunulino?

Subite mi rememoris la kaprompaĵon, elpensitan en la kafejo ĉe la lageto. Diablo prenu, tio estas ia halucino, tiu bagatelaĵo ankaŭ tie ne donis al mi trankvilon. Mi desegnis sur hazarda buŝtuko kvadraton 12×12 kaj komencis enskribi ciferojn.

Kiam mi por momento deŝiris la okulojn de la kvadrato, dekstre de mi staris Robinsono. Apenaŭ rimarkeble ridetante li rigardis jen min jen la kvadraton.

– Kial 12×12? Ĉu vi estas certa, ke viaj ciferoj estas ĝustaj? – li demandis kun moko.

Laŭ tio, ke li venis al mi kaj laŭ lia ruza rideto mi komprenis, ke li estas la ĉefa aganto en miaj hodiaŭaj aventuroj, kaj ke tre baldaŭ ĉiuj enigmoj estos solvitaj...

Sed tio estas jam alia kaj longa konversacio.



# Diman

Nia vilaĝo Volkovo estis ne tre konvena por loĝado. Estis verŝajne nur unu kaŭzo, pro kiu homoj ĉi tie ekloĝis. Je duonkilometra distanco de Volkovo estas lago, granda kaj profunda. Iam dum magraj, malsataj jaroj viroj de l' vilaĝo nutris siajn familiojn per fiŝoj el la lago.

Sed, kiel mi jam diris, la vilaĝo ne estas konvena por loĝado. La tuta vilaĝo estas tranĉita per ravinoj. Printempe laŭ tiuj ravinoj fluas abunda akvo el ĉirkaŭaj arbaroj, la akvo ĉiujare profundigas la ravinojn, sed ĝi ankaŭ plenigas la lagon, kiu abundas je fiŝoj. Verŝajne pro tio homoj plu loĝas en ĉi tiuj ne tre konvenaj kondiĉoj.

Kaj neatendite en nia ne tre alloga vilaĝo aperis Diman<sup>1</sup>. Tiam ni estis knaboj 12-14-jaraj, ĉio ĉirkaŭe estis por ni interesa. Nova homo ĉe ni ne ofte aperis, kaj, se li aperis, ĉu ni povus ne konatiĝi kun li? Diman ĝis nun restas en mia memoro kiel stranga romantika homo. Detalojn mi klarigos poste.

Do, li aperis en Volkovo, kaj tiu evento ne povis resti nerimarkebla. Li ekloĝis en dometo rande de l' vilaĝo, ekbredis dudekon da kaproj. Eĉ tio estis nekutima kaj suspektinda por niaj vilaĝanoj, inter ili kaproj ne estis ŝatataj.

Li ne ĝuis estimon de niaj vilaĝanoj, kaj havis reputacion de malĝusta vilaĝa mastro. Li ne havis familion, de tempo al tempo li drinkis, estante 40-jara li ne laboris en iu difnita loko. Nun, post dek jaroj, mi klare vidas, ke li ne povis ie labori. Kie? Nur ĉe iu farmisto, kiu pagis mizerajn groŝojn, aŭ en kolĥozo, kiu tute nenion pagis. Sed la vilaĝa onidiro estis ne je la flanko de Diman. Niaj homoj alkiutimiĝis vivi laŭ siaj reguloj kaj komprenis nenion alian.

Sed ni, knaboj, rigardis ĉion ĉi alie, ni estis ĉiosciaj. Ni vidis, ke Diman

---

1. La nomo Diman, unu el la nomformoj de Dmitrij (Дмитрий, Esperante: Demetrio) estas prononcata kun la akcento je la lasta silabo, t. e. Dimán.

laboris de la matenuĝo ĝis la vesperruĝo, kiel preskaŭ neniu en la vilaĝo. Li paŝtis sian kapraron, melkis kaprinojn, preparis por ili fojnon por vintro, li faris fromaĝon, al li venis homoj aĉeti liajn produktaĵojn. Krom tio li tanis kaprajn haŭtojn kaj poste portis ilin piede dek du kilometrojn en la distrikta centron por vendado, kaj tio estis dum ĉia vetero.

Se en la vilaĝo subite malsaniĝis infano, oni venis al Diman. Li trinkigis la infanon per kaprina lakto, per herbaj dekoktaĵoj, kaj la infano resaniĝis. Kuracado por infanoj estis senpaga, sed malgraŭ tio Diman ne akiris estimon de la vilaĝanoj.

Dum la tuta somero Diman portis sur sia dorso branĉaĵfaskojn, kultivis ion en sia legomĝardeno, transportis per manĉareto akvon el la lago por sia farmeto. Apenaŭ iu en la vilaĝo laboris pli ol Diman. Sed homoj vidas kaj aŭdas nur tion, kion ili volas vidi kaj aŭdi. "He-e, malĝusta mastro", – diris ĉiu vilaĝano okaze preterirante lian dometon.

Kiam ni pro scivolemo unuafoje venis al li, ni adresis al li "onklo Demetrio", ja li estis por ni tiel aĝa. Sed li tuj diris: "Nomu min simple Diman." Ni ne kontraŭdiris, estu tiel.

Antaŭ ĉio nin frapis neordinara medio en lia dometo. Nuntempa vilaĝa domo interne neniel distingiĝas de urba loĝejo. Ĉiu vilaĝano, se li ne estas senĉesa drinkulo, havas en sia domo televidilon, molajn meblojn, kuirejon kun fridujo, gasfornelo, mikroonda kuirilo. Ĉe Diman forestis ĉiuj ĉi signoj de l' civilizo. Plej simplaj mebloj el nefarbitaj tabuloj, malnova, tre malnova teleraro, herbofaskoj sub la plafono, kaj densa odoro de tiuj herboj, de lakto, de fromaĝo.

Tio nin, knabojn, ne povis ne altiri. Ankoraŭ pli altiris nin Diman mem. Kutime li estis gaja, parolema, interesa rakontanto. Ni miris: de kie tiu simpla vilaĝano scias tiom da kuriozaj, enigmoplenaj, konsternaj faktoj? Baldaŭ ni komprenis, ke Diman scias pli multe kaj scipovas rakonti pli interese, ol niaj instruistoj en la lernejo.

Pro tio la lernejo, ankaŭ ĝis nun enuiga, iĝis apenaŭ eltenebla. Ni ĝis la tagmezo pene sidadis sur la lernobenkoj, kaj posttagmeze iris al Diman aŭskulti pri Sumero, Urarto, Mezopotamio, Egiptio, Kartageno, Paska Insulo, Tenoĉtitlano, aztekoj kaj inkoj, pri aliaj malaperintaj civilizacioj, pri iliaj forgesitaj dioj kaj idoloj, regantoj kaj saĝuloj.

Rakontante, Diman seninterrompe ion faris, li ne povis toleri, ke liaj manoj estu liberaj. Li rakontis ankaŭ pri sia metio, ankaŭ tre interese. Li diris, ke acidlakton li faris laŭ recepto de iama Urarto kaj la fromaĝon – laŭ

receptoj de la antikva Helenujo. Ni plezure helpis al Diman, por ni ĉio ĉi estis certe kvazaŭ tuŝo al mondaj misteroj. Kaj en aliaj aĵoj ni helpis al nia pli aĝa amiko. Ni povis, ekzemple, senŝeligi terpomojn por lia supo, poste ĉiuj kune sidis ĉirkaŭ la tablo kaj manĝis tiun supon el unu granda telero.

Nia ĉefa somera okupo estis fiŝado. Ni provis entiri en tiun okupon Dimanon, sed li rifuzis, li ne havis tempon por sidado kun fiŝhoko sur bordo de la lago. Sed ofte nia grupeto venis kun kaptitaj fiŝoj en la dometon de Diman, ni kune kuiris fiŝsupon, kaj gaje babilante kune vespermanĝis.

Somere ni pasigis tempon ĉe Diman eĉ pli ofte ol vintre. Inter ni ne estis frenezaj amantoj kaptadi fiŝojn ĉiutage dum tri monatoj. En aliaj lokoj knaboj freneziĝas pro futbalo, sed en Volkovo la ludo ne al kutimiĝis. Vi komprenas – pro niaj malbenitaj ravinoj. La tuta tero estas tiel per ili tranĉita, ke mankis ebena placeto por futbalo. Diman estis bonega kompano por ni somere. Ni helpis al li paŝti kaprojn, kuiris manĝaĵon sur lignofajro, kaŝis nin, kiel Robinsono aŭ indianoj, de someraj pluvegoj en arbaraj kabanoj, ĝojis pri la naturo.

Niaj gepatroj ne aprobis nian amikecon kun plenaĝulo, des pli ke tiu plenaĝulo vivas nenormale. Ni ion nenormalan ne vidis. Nur unu neagraba aĵo estis. De tempo al tempo Diman prenis tanitajn kaprajn haŭtojn kaj iris vendi ilin en la distriktan ĉefurbon, kiu estis de Volkovo je dek du kilometroj. De iu tempo li komencis iradi tien ankaŭ sen haŭtoj. Revenis li ĉiam ebria, en tiuj vesperoj li estis malafabla, neparolema, post tiuj vizitoj ni ne emis veni en lian dometon.

Tiam ni ne sciis la kialon de tiuj vizitoj, kaj ni ne povis antaŭvidi, kiel tragedie ĉio ĉi finiĝos.

Unu vesperon Diman denove revenis el la urbeto. Estis apogeo de printempo. Tio signifas ke irado tra Volkovo estis plej maloportuna. En arbaroj ĉirkaŭ la vilaĝo degelis neĝo, laŭ niaj ravinoj kuris flanken de la lago bruaj torentoj de printempa akvo. Por ke la vivo dum tiuj periodoj ne haltu, homoj konstruis pontetojn super la ravinoj. Sciante la dispozicion de la pontetoj, oni povis iri el unu fino de l' vilaĝo en la alian.

Kiam Diman venis en Volkovon, estis jam malfrua senluna vespero. Li estis ebria sufiĉe, trovi sian dometon ne sciante, kie troviĝas la necesaj pontetoj, estis nefacile. Li longe serĉis tiujn pontetojn, definitive perdis la orientiĝon, kaj iris intuicie. Sur lia vojo renkontiĝis ligna baraĵo. Li transgrimpis ĝin, sed post kelkaj paŝoj staris alia baraĵo. Li transgrimpis ankaŭ tiun kaj – falis en puton. Tio ne estis baraĵo, tio estis trabaĵo de la puto.

Oni trovis Dimanon kaj eligis lin el la puto nur matene. Li estis viva, sed ne povis jam movi sin kaj parolis nur kun granda peno. Kuracisto, vokita el la urbeto, longe klopodis revenigi lin al la vivo, sed finfine li diris: “Mi faris ĉion eblan, sed plej verŝajne li ne vivos”.

Post tio Diman vivis du aŭ tri horojn. Nur en tiuj lastaj momentoj ni eksciis ke li havas patrinon, kiun li tre amas, en la urbeto vivas liaj edzino kaj filino. Precipe li ĉagreniĝis pri la filino. Li parolis pene, malrapide kaj tre mallaŭte. Sed ni komprenis ke lia filino Inna studas en kolegio, ŝi devos studi ankoraŭ longe, kaj kiel ŝi povos studi sen lia helpo? Liaj manoj ne moviĝis, kaj li ne povis forviŝi la larmojn de sia vizaĝo. Kaj ni ne povis haltigi la larmojn.

Antaŭ la morto Diman petis enterigi lin ne en la urbeto, sed en Volkovo, kiun li amis. Pri la enterigo mi ne rakontos, estis malĝojo kaj larmoj. Venis liaj parencoj. La edzinon mi jam ne memoras, verŝajne ŝi estis ne-interesa por mia aĝo. La filino Inna estis junulino bela kaj serena (tiun vorton mi elpensis verŝajne poste). Pasis multaj jaroj, sed mi memoras ŝin, kvazaŭ tio estus hieraŭ. Ŝi restis hela momento en mia vivo. Kia iĝis ŝia sorto? Kie ŝi estas nun?

La patrino de Diman restis en lia dometo kelkajn tagojn. Mi proponis al la kunuloj konatiĝi kun ŝi. Ŝi devas scii ke ŝia filo havis amikojn en Volkovo.

La patrino estis grandaĝa, sed tute ne oldulino. Komence ŝi miris, kiam ni aperis en la dometo, sed ŝi estis same parolema kiel Diman, kaj baldaŭ ni konversaciis kiel bonaj konatoj. Paroli kun ŝi estis interese. Nur tion mi komprenis en tiama aĝo, nun mi komprenas ke ŝi estis pli klera kaj kultura ol niaj vilaĝaj virinoj.

Estis nekonvene nomi nian amikon “Diman” antaŭ lia patrino, kaj ni nomis lin Demetrio.

“Nu, por vi li estas pli konvene Demetrio Ivanoviĉ, – ŝi diris. – Tamen li havis amikojn en Volkovo... Jes, li ĉiam amis infanojn, siajn lernantojn...”

“Lernantojn?” – ni miris.

“Ĉu li nenion diris pri sia lernejo?.. Ah ha, li certe ne volis ion rakonti. Mia modesta filo... Tio estas tre malgaja cirkonstanco. Sed, se vi estis liaj amikoj, vi devas ankaŭ pri tio scii. Ĉiuj ni ne estas anĝeloj...”

Kaj ŝi rakontis al ni, ke Demetrio Ivanoviĉ laboris en la distrikta ĉef-urbeto, li instruis historion en mezgrada lernejo.

“Laŭ ĉiuj liaj kolegoj, li estis bona instruisto, – ŝi diris, – sed li emis sincere kaj malŝate paroladi pri la potenco, pri la maljusto en Ruslando,

pri la mensogo en la gazetaro kaj en la lernolibroj. Li diris, ke kulturo, scienco, klerigo kaj moralo en la lando degeneras. La prezidento disvendis la landon kaj nun sidadas en Kremlo kaj drinkadas. Ne povis Demetrio gardi sian langon, li diris tion, kio doloris lian animon. Burokratoj el la sekcio de klerigo ne povis pardoni tion al li. Kiu permesis? Ne rajtas simpla instruisto paroli pri tio. Komence ili diris, ke li instruas historion malĝuste, ankoraŭ iajn elpenaĵojn, finfine ili maldungis lin el la lernejo. Kaj en sia vivo li konis nenion krom la lernejon, sian amatan historion kaj siajn lernantojn...”

Ŝi viŝis la larmojn kaj iom silentis. Poste ŝi daŭrigis:

“Kun sia edzino li ne vivis pace. Mi ne dirus, ke ŝi estas maldigna virino. Ne, ŝi povus esti bona edzino, sed... Ili ĉiam havis malsamajn opiniojn kaj ne povis veni al konkordo. Do, oni devigis lin forlasi la lernejon, la familion li mem forlasis... Jen tiel li trovis en Volkovo sian eternan rifuĝejon...”

Dum kelkaj tagoj la patrino de Demetrio Ivanoviĉ vendis la kaprojn, prenis por memoro kelkajn aĵojn de sia filo kaj forveturis. Pri vendo de la dometo oni ne povis eĉ paroli, neniu ĝin aĉetus.

Ni, ĉiuj kunuloj, ankoraŭ iom da tempo kolektiĝis dum vesperoj en la dometo kiu post ĉiuj ĉi eventoj estis jam nur nia, tie estis nia eta knaba mondo. Sed niaj kunvenoj daŭris nelonge, iu sencerbulo bruligis la dometon kaj la kaprostalon. Ni venis matene – ĉio komplete forbrulis...

\* \* \*

Ŝajnis, ke ĉiuj spuroj de nia mortinta amiko malaperis. Sed ne, la historio de Diman per tio ne estis finita.

Kiam lia patrino forveturis, kaj la dometo iĝis nia, en ĝi restis kelkaj personaj aĵoj de Diman. En negranda ligna kofro kuŝis kvar dikaj plenskribitaj kajeroj. Miaj kunuloj ne interesiĝis pri ili, kaj mi prenis tiujn kajerojn.

Mi ĝis nun konservas tiujn kajerojn. Ili ĉiuj, de l' unua ĝis la lasta paĝo, estas plenskribitaj per nekompreneblaj signoj. Tiam mi pensis, ke tio estas en iu fremda lingvo. Sed nun mi jam delonge vivas en granda urbo. Mi montris la kajerojn al multaj homoj, kiuj scias lingvojn, sed neniu povis diri, kiu lingvo ĝi estas. Finfine, la plej saĝa el tiuj erudiciuloj trarigardis dikan informlibron kaj diris, ke neniu el la mondaj lingvoj havas tian skribon, kaj ke tio estas ne lingvo, sed plej verŝajne – kriptaĵo. Li volis aĉeti tiujn kajerojn, kaj ĉe tio proponis ridindan monon. Mi ĝentile rifuzis.

Ah ha, kriptajo, – mi diris al mi mem, – tio estas sekreta skribo. Tio signifas la rusan lingvon, skribitan per sekretaj signoj. Mi tuj rememoris ke antaŭ eble dek jaroj mi legis la rakonton *La ora skarabo* de Edgar Poe. Mi plej atente kaj zorge relegis la rakonton. Ahem, kiel facile tio estis en la rakonto, sed kiam mi uzis tiun manieron, la rezulto estis nula. Demetrio Ivanoviĉ ne estis tiel simpla, kiel la pirato de Poe. Multajn literojn mi jam scias, sed el ili ne rezultis vortoj.

Dum vesperoj mi ofte sidas super la kajeroj, preskaŭ nenion komprenante, mi pririgardas liniojn de la sekretaj signoj. Jen sendube versoj, klare estas videblaj versokvaroj, versotrioj. En aliaj lokoj estas sendube prozo. Mi volas ĉion ĉi deĉifri kaj pli aŭ malpli frue mi tion nepre deĉifros.

Kion do Demetrio Ivanoviĉ volis diri al homoj? Nia Diman, la ribela instruisto de historio, bredisto de kaproj, tanisto de haŭtoj, produktisto de fromaĝo. Eble li estis nek instruisto, nek bredisto kotopo, eble li estis poeto kaj filozofo. Kaj li volis per ĉi tiuj kajeroj malfermi al la homoj novan koncepton de l' vivo. Sed kial li tiel senglore finis sian propran vivon? Ahem... Sed aliflanke, kiu rusa poeto mortis kiel normala homo, en sia propra lito kaj pro sia maljuna aĝo?

*La Ondo de Esperanto*, 2020, №2, p. 78-82.

# Diabla semajnfino

Apenaŭ mi kaj Teddy pene atingis la limkvartalon, mia aŭto sen ia videbla kaŭzo haltis. Ĉu ni povis klarigi la kialon? Granda aro da monstroj persekutis nin senmetafore post niaj kalkanoj. Ni haste forlasis la aŭton kaj apenaŭ dekuris de ĝi kelkajn paŝojn, kiam al ĝi saltis du grandegaj troloj, kun aĉa ridego levis ĝin kaj ĵetis ĝin en apudvojan kanaleton. En mia ĉeesto mia brilanta "Toyota" transformiĝis je amaso da rompita fero. Nin la monstroj ne tuŝis, nu, gloron al dio.

Mi kaj Teddy aliĝis al la homa torento kaj daŭrigis nian vojon perpiede. Kvankam, kiun, al diablo, nian vojon? Ĉu ni sciis, kien ni iras, kaj kie estos la fino de tiu panika fuĝo?

Kiam ni elkuris el la urbo, la monstroj lasis nin en trankvilo, kaj la torento da fuĝantoj komencis disiĝi. Al mi kaj Teddy aliĝis ankoraŭ du homoj. Aŭ ni al ili aliĝis, mi jam ne memoras, tia estis la paniko kaj tumulto.

Kaj poste mi vidis, ke ĉiuj iras perpiede. Nu, ĉe mi kaj Teddy la aŭto senkaŭze haltis, sed kio okazis ĉe la aliaj? Ĉu ankaŭ ĉe ili neatendite haltis? Kvankam, kial do ne? Se komenciĝis tiu diablaĵo, atendu ion ajn.

Nia vojo iris tra arbaro. Simioj, vampiroj, troloj, la tuta ĉi monstraro, ŝajne, restis en la urbo. Ĉiuokaze ili jam ne sekvis nin, kaj la brulanta sulfuro kaj ceteraj fiodoroj malaperis.

Teddy ĉiam ankoraŭ ekscitiĝis. Al li, verŝajne, tedis esti sola en tiu okupo, kaj li komencis instigi tiujn du nekonatojn. Pri mi li certe longe jam sciis, ke kun mi li ne sukcesos, mi babili ne emas. Ankaŭ mi atente rigardis tiujn virojn. La pli alta kaj pli juna, barbhava Douglas, eĉ plaĉis al mi. Li estis trankvila, prudenta. Videblis, ke el la hejmo li fuĝis ne panike, nun li estis en varma jako kaj ankoraŭ portis ion en sia dorsosako. Malsame ol Teddy, kiu kuregis en tiuj vestoj, kiujn li surhavis hejme. Sed la alia, Arturo, estis nek fiŝo, nek viando. Griza, mizeraspekta, li ĉiam ion flustris sub sian nazon. Preĝojn, verŝajne. Aŭ eble tute freneziĝis, malfeliĉulo.

Krepuskiĝis. Laŭ la konsilo de l' barbulo Douglas ni devojiĝis en la

arbaron kaj komencis konstrui kabanon el branĉoj. Ĉiuj ja estis diable lacaj. Sub la gvido de Douglas ni rapide konstruis tiun kabanon. Teddy denove komencis ekscitiĝi:

– Nu, eskimoj vi estas, kunuloj! Vi kiel volas, sed mi tiel sovaĝe ne povas dormi.

Mi ja scias, ke li dormos kiel kadavro, nenio al li okazos, simple li havas tian malagraban naturon, li nepre devas atentigi sin mem. Douglas, mi opinias, ĉion komprenis kaj diris:

– Ne maltrankviliĝu, amiko. Oni ne timu tiel panike malpuron. La malpuro estas tiel same natura, kiel la suno, aero kaj akvo. – Li ridetis. – La kabanon mi promesas al vi bonegan, mi en ekspedicioj lernis konstrui. En ĝi estas certe ne kiel en la dia paradizo, sed tamen...

La griza Arturo nur aŭdis pri la dio, tuj svingis siajn manojn:

– Mi petas vin, ne blasfemu, – li ekmurmuris, – ĉar ni sen tio jam ricevis punon pro kontraŭdiaj agoj niaj...

Por Teddy tio estis bonega preteksto por alkroĉiĝi.

– Silentu vi, fariseo! Sen vi estas naŭze. Paroli en nia tempo pri dio estas primitiva malprogresemo. Sendube, vi opinias, ke la tuta hodiaŭa diablo estas dia puno. Por vi tio estas la plej natura klarigo, por io alia vi havas nek saĝon, nek fantazion. Ĉu vi memoras, kiel viaj samkredaj fratoj forbruligis Giordanon Brunon? Sed nun estas alia tempo. Nun vi ne malpermesos al mi kredi je multo de loĝataj mondoj!

Nu, Teddy ekparolis! De kie nur li prenas tiujn sciencajn vortojn? Eĉ Douglas ekinteresiĝis:

– Vi, – li diris, – estas, verŝajne, ega ŝatanto de sciencaj fabeloj.

Teddy rigardis lin kiel sovaĝulon.

– Hm! Ega ŝatanto! Mi tute ne komprenas vian ironion. Ne ŝati la sciencan en nia tempo estas simple primitiva profaneco. Vi do ne ŝatas, ĉu? Ĉu vi volas, mi diros, kio vi estas? Vi estas malklerulo, konservativulo, mal-amiko de la scienco!

– Ne estas bezonataj tiaj laŭtaj vortoj, karulo. Mi ne estas malamiko de la scienco. Mi mem estas sciencisto.

– Vi?! Sciencisto? – Teddy rondigis la okulojn. – Diru tion eble al li, – Teddy montris per la okuloj Arturon, – kaj mi en tio komprenas ion. Sciencisto! Kvankam, kial ne? Diversspecaj scienculoj multiĝis. Jen kelkaj sidas kaj deĉifradas egiptajn kojnoskribaĵojn. Ankaŭ ili konsideras sin sciencistoj. La homaro ne bezonas vian egiptan kojnoskribon, ĝi ĵetis sin al la steloj! Al



ni jam senditoj de aliaj mondoj flugadas. Ĉu vi aŭdis eble pri neidentigitaj flugantaj objektoj? – grave demandis Teddy.

Douglas longe kaj sincere ridis.

– Nu, kompreneble, vi, seka scienculo, certe ne kredas je ili. Aŭ eble vi, estimata sciencisto, je dio kredas? Mi aŭdis, ke ankaŭ tiaj Ejnŝtejnoj ekzistas. Tiuokaze vi estas lia samideano. – Teddy turnis sin al la diotima Arturo. – Kiel via plej sankta inkvizicio konsideras la problemon de la nifoj? Ne penu respondi, ni sen vi scias. Same kiel la ortodoksa scienco: nifoj ne ekzistas, kaj finite. Kaj tio, kion ni hodiaŭ suferis, estas dia puno. Kaj ĉu vi volas, sinjoro sciencisto, mi donos al vi hipotezon de la tuta afero?

– Hipotezon? Mi plezure aŭskultos. Se via hipotezo en la estonteco ricevos konfirmon, vi estos aŭtoro de eltrovaĵo de l' jarcento. Kaj mi estos inter la unuaj, kiuj gratulos vin. Mi ne ŝercas.

– Mi anticipe dankas, – degne ridetis Teddy. – Do jene. Vi, sinjoro sciencisto, ignoras la “sciencajn fabelojn”. Sed nur ili helpis al mi proponi tiun hipotezon, kiu sole povas klarigi ĉiujn okazaĵojn. Aŭskultu kaj memorfiksi. Do. Mi komencos esence. Nu, dum vi ĉiuj en la urbo panikiĝis, mi observis. Ĉu vi rimarkis, okaze, kion ĉiuj ĉi troloj kaj drakoj rompis? Ne rimarkis! Kaj mi observis ĉion. En mia ĉeesto brulis unu biera uzineto. La plej bonan en la urbo restoracion ili transformis je betonaj eroj. Preter tabaka vendejo ni veturis – ĝi kvazaŭ sub la teron falis. Ek – kaj vaka tero. Mi estas certa, ke luddomoj, ĉiaspecaj malĉastejoj same falis. Aŭtojn ili disbatas, nur polvo leviĝas. Ĉu vi rimarkas koheron?

– Mi rimarkis, – nedefinite diris Douglas.

– Do! Ili rompas ĉion, kio malutilas al la homo fizike aŭ morale. Kaj kion ĉio ĉi signifas? Jen kion. Ekzistas supercivilizacio, kiu jam longe observas nin. Jen, ekzemple, tiuj “flugantaj teleroj”. Ni iel interesas tiun civilizacion. Nu, mi ne estas tia idealisto, kiel kelkaj humanaj sciencistoj, kiuj opinias: se nin vizitos iuj aliplanedanoj, do nepre kun paca kaj amikeca celo. Ili vizitos nin eble nian sangon trinki, kiel marsanoj de Wells. Eble ni estas bezonataj same, kiel ni iam bezonis sklavojn el Afriko, aŭ pro alia kialo, ni ne povas pri tio juĝi per nia mizera intelekto.

Brave, Teddy, li hodiaŭ estas en humoro! Elokventas, kvazaŭ legante libron.

– Nu, kompreneble, – diras Douglas. – Tio signifas, ke ĉiuj troloj kaj drakoj alflugis per tiuj teleroj, ĉu?

– Mi gratulas vin! – krias Teddy. – Vi momente ĉion komprenis. Tuj videblas scienca preparado.

– Nu, kio do, ankaŭ mi vin gratulas, – ridante diris Douglas. – Ĉio estas laŭ la plej tradiciaj sciencaj fabeloj, eĉ interstelaj militoj ĉeestas kotopo. – Li iom silentis. – Ĉu via hipotezo sufloros, kiam finiĝos ĉi malordo?

– Ahem... Ne, ĝi ne sufloros.

– Do mi al vi diros. Morgaŭ ĉio estos kiel antaŭe, kaj ni reiros urben. Mi havas, komprenu, alian hipotezon. Kaj laŭ ĝi estas la plej bona tempo dormi, mi diras tion honeste.

– Kiel oni povas ĉi tie dormi! – ekkriis Teddy kaj klakis sian vangon. – En la epicentro de tiu kula aro...

– Kuloj estas same nepra elemento de l' naturo, kiel ĉio alia, – diris Douglas kaj plezure oscedis. – Enlitiĝu, kunuloj, jen mia bona konsilo al vi.

Li levis la kolumon de sia jako, kuŝigis sub la kapon anticippe preparitan herban kusenon kaj baldaŭ trankviliĝis.

\* \* \*

Mi vekigis, kiam la suno jam brilis rekte en miajn okulojn. La vizaĝo kaj la kolo doloris min kaj jukis pro kulaj mordoj, sed mi rememoris, kiel Douglas diris vespere, ke tio estas utila, same kiel la tuta cetera naturo. En la nazon batis iaj nekonataj ĝis nun, sed agrablaj odoroj. Mi eliĝis el la kabano, plezure etendis miajn membrojn kaj rigardis al la urbo. Alte super la urbo pendis pura blua ĉielo, kaj super ni laŭtvoĉe pepis, ĉirpis, kantis diversaj birdoj, kiujn mi neniam en mia vivo aŭdis.

\* \* \*

Post ĉi tiuj eventoj pasis jam preskaŭ jaro; dum tiu jaro ripetigis nenio simila.

Komence, tuj post tiuj niaj aventuroj Teddy kuradis kun sia hipotezo, skribis en diversajn ĵurnalojn, kaj ofte tio eĉ aperis en ĵurnaloj. Sed la pasioj iom post iom ĉesis, la ekscitiĝo komencis trankviliĝi, tiuj eventoj iĝis preskaŭ forgesitaj, kaj lastatempe, kiam Teddy adresas sin al gazetoj, oni demandas lin: "Pardonu, pri kio vi?.."

Sufiĉe ofte mi renkontiĝas ankaŭ kun Douglas. Ni fariĝis se ne amikoj, sed ĝuste proksimaj kunuloj. Kiam li eksciis, ke mi estas inĝeniero kaj

efektivigas en nia kompanio memstarajn projektojn, li komencis al mi laŭgrade kaŝproksimiĝi. Nu, li aludis simile al tio, ĉu mi estas preta transiri en ilian kompanion? En kiun kompanion, – mi demandas, – pri kio ĝi okupiĝas? Li rekte ne respondis – li donis, mi pensas, obligacion pri sekreteco – sed iom post iom mi komprenis el niaj konversacioj, ke ili okupiĝas pri armeaj mendoj. Post tio mi diris al li, ke en ilian establon mi neniam iros. Mi delonge decidis, ke mi pro nenia mono ligos mian vivon kun militistoj. Mia patro iam pereis en Afriko dum stulta interbatalo, kiun elpensis niaj idiotecaj fuŝbatalantoj. Unu familiano fordoninta sian vivon al milito – tio por ni pli ol sufiĉas.

Sed la plej interesa estas ne tio. El miaj konversacioj kun Douglas mi intuicie komprenis, ke la pasintjaraj eventoj estis armeaj eksperimentoj. Kaj Douglas mem en tio iel partoprenis. Certe, rekte li pri tio ne diris, li ja donis la obligacion. Sed intuicio en nia inĝeniera laboro estas eoneanstataŭebla. Jen mi konkludas. Ekzemple, kial en tiu tago li anticipe prepariĝis kaj estis la plej trankvila el ĉiuj? Kiel li povis tiuvespere konfirmi, ke ĝis la mateno ĉio finiĝos? La respondo estas sola: li sciis. Kaj estas ankoraŭ multaj aliaj observoj, pripensoj kaj konkludoj...

# Vasilio kaj posteuloj

La ekonomo Vasilio aperis en nia vilaĝa lernejo nerimarkeble. Simple la malnovan – drinkulon kaj friponon – oni eksigis, kaj anstataŭ li venis Vasilio, pro kio la direktoro tre ĝojis – ne ĉiu vilaĝa viro kontentiĝos per la salajro de lerneja ekonomo.

Sed post kelka tempo, kiam oni bonege ekzamenis Vasilion, evidentiĝis ke li ne estas tute taŭga homo. Havante aĝon pli ol tridek jarojn, li estis fraŭlo kaj amikis kun vilaĝaj nenifaruloj, li ofte estis ebrieta eĉ dum la laboro. Nia mildkora direktoro laŭ sia forto kelkfoje mallaŭdegis lin. Sed poste li komprenis ke per tio estas malfacile ion atingi, kaj se forpeli Vasilion, kie oni serĉu novan ekonomon? Kaj fariĝis stabila ekvilibro: Vasilio drinketadis, la direktoro lin mallaŭdetadis.

Sed venis tragedia fino – sufiĉe kutima fino por la homoj de la Vasilia tipo. Foje, estante tre gaje ebria, li, forlasante la laboron, iris ne tra la pordeto, sed transgrimpis la barilon. Loĝanta apud la lernejo nia samklasano Tolka Krivonosov konstruis por si memfaritan rekon kaj fiksas ĝin per metalaj stangoj. Vasilio falis de la barilo kaj trafis per la brusto sur unu de tiuj stangoj. Kiam al li alkuris vidintoj, li jam foriris en la transan mondon.

Matene min, inter kelkaj aliaj deklaklasanoj, la direktoro vokis en sian kabineton. Ni nekuraĝe sidiĝis apud la muro kontraŭ lia tablo, kaj la direktoro simple, kiel al plenaĝuloj, diris al ni:

– Nu, kion fari, kunuloj, necesas fosi tombon por Vasilio...

La enterigo okazis en la sekvanta tago. Larmoj kaj plorego, kiel mi memoras, forestis; evidentiĝis, ke Vasilio ne havis parencojn. Ĉeestis instruistoj kaj kelkaj amikoj de Vasilio. Kiam oni superŝutis la tombon kaj starigis sur ĝin lignan obeliskon rapide kunnajlitan en lerneja metiejo, la amikoj de Vasilio sopiris, angoris, kaj unu el ili diris:

– Ha-a, la homo estas kiel muŝo: vivis, vivis – kaj ne plu estas...

Nia matematikisto Kuzma Sergejeviĉ, homo de plej striktaj reguloj –

nur li havis en tiu tago nigran kostumon kaj kravaton – plene serioze riproĉis tiun pesimiston:

– Bonvolu tiel ne diri! La homo ne estas muŝo! Kiam foriras homo, post li restas postsigno sur la tero.

Nia vilaĝa Schopenhauer malĝoje ekridis:

– Nu, vi instruas infanojn, al vi konvenas tiel diri. Sed se racie kompreni – kia, diable, postsigno? Montru ĝin al mi. Tio estas nur parolado...

\* \* \*

De tiam pasis multaj jaroj. Niaj vilaĝo kaj tombejo nun kuŝas sub la ondoj de artefarita maro. Homoj, memorintaj Vasilion, mortis, aŭ jam forgesis lin, aŭ disveturis tra la tuta lando. Eble nur mi sola memoras lin.

Mi ofte rememoras lin konekse al jeno. Nia rimarkinda samlandano Nikolao Fjodorov<sup>1</sup> foje diris ion similan: “Iam scienco kaj tekniko tiel progresos, ke homoj povos rekonstrui nin laŭ niaj postsignoj, kiujn ni lasos en la kosmo. Tial oni devas vivi racie kaj noble, por ke ne estu honto antaŭ la posteuloj, kiam ni aperos antaŭ ili kun nia tuta aspekto”.

Iuj modernaj pensuloj konsideras tiun vidpunkton mekanika kaj senbaza. Sed mi kredas al Nikolao Fjodorov. Ĉe tiu lavanga evoluo de la scienco kaj tekniko, kiun ni havas nun, eĉ niaj ne tre malproksimaj posteuloj scios kaj scipovos tiom pli multe ol ni, kiom ni scias pli multe ol antikvaj egiptoj...

Sed ĉu ili povos trovi postsignojn de Vasilio? Kaj kie ili serĉos tiujn?

Aliflanke Donkiĥoto, Hamleto, Faŭsto, Onegin, Peĉorin, Bazarov neniam vivis, sed ili lasis kaj plu lasas sur la tero tiom da postsignoj, ke ili sufiĉos por centoj kaj miloj da vivintoj.

Kaj kiam niaj posteuloj en la estonteco komencos rekonstrui homojn, ili multe pli facile povos rekonstrui, ekzemple, Hamleton ol Vasilion. Sed iu Hamleto neniam estis, kaj Vasilio estis. Mi povas ĵuri per ĉio, kion vi volas, ke vivis li, nia ekonomo Vasilio. Vivis ja!

Domaĝe estas pri la homo...

---

1. Fjodorov, Nikolaj Fjodoroviĉ (Фёдоров, 1829-1903). Rusa filozofo, kristana pensulo, pedagogo, futurologo, aŭtoro de la doktrino “Filozofio de la komuna afero”. Li estas konsiderata kiel kunfondinto de la rusa kosmismo kaj kiel unu el la antaŭuloj de la transhumanismo.

# Kato en la kabano

– Zosimo estas mortanta, – triste diris la olda Markelo, kiam la dommastro malfermis la pordon antaŭ li. – Li apenaŭ ĝisvivos la vesperon...

Markelo iris tra la vilaĝo, pasis de domo al domo, kaj ĉie diris la samon. Viroj triste balancis la kapojn aŭ rigardis flanken, por ke Markelo ne vidu iliajn larmojn, sed li ĉion vidis kaj komprenis. Virinoj ofte ne kaŝis siajn larmojn, ili krucoŝignis sin kaj mallaŭte diris: “Ĉiuj ni estas sub Dio”.

Markelo ankoraŭ ne trairis la tutan vilaĝon, sed ĝiaj loĝantoj jam komencis kunveni en la domo de Zosimo. Neniu diris “bonan tagon” unu al la alia, ĉu povis tiu tago esti bona?

Kiel la vilaĝo vivos sen Zosimo?

Nu, vivas bestoj en la arbaro, birdoj en la ĉielo, fiŝoj en la akvo. Vivas ili sovaĝe, sen amo, sen koro, sen boneco, fortaj bestoj manĝas la feblajn, grandaj birdoj kaptas la malgrandajn... Homoj ne devas tiel vivi, sed kiel ili devas? Kiom vilaĝanoj memoras, ili lernis de Zosimo ami unu la aliajn, ami pli junajn, ŝati pli aĝajn, estimi la tombojn de la antaŭuloj.

La vilaĝanoj aŭdis, ke en urboj ekzistas iaj tiel nomataj leĝoj kaj tre gravaj uloj – juĝistoj, prokuroroj, advokatoj – klarigas al la homoj, kiel ili devas vivi laŭ tiuj leĝoj. Obskuraj estas tiuj leĝoj, nekomprenoblaj kaj stultaj. Ekzemple, la vilaĝano Varlamo antaŭ kelkaj jaroj veturis ĉevale tra la arbaro malfrue vespere, kaj iu sentaŭgulo atakis lin, volis lin prirabi kaj murdi. Sed Varlamo estas viro nefebla, en la batalo li mem mortigis la aĉulon. La tuta vilaĝo laŭdis Varlamon kaj fieris pri sia heroo, sed en la urbo oni decidis, ke krimulo estas li. Jene... Post tio Varlamo estadas en la urba prizono.

Zosimo neniam diris eĉ unu vorton pri tiuj idiotecaj leĝoj, li malŝatis ilin, same kiel ĉiuj aliaj vilaĝanoj, kaj ĝuste danke al tio la homoj kun siaj disputoj kaj kvereloj venis al li kaj forlasis lian domon, mirigitaj de la justeco kaj saĝeco de Zosimo. Homoj simplanimaj kaj kredemaj ricevis reen sian havaĵon, sed avaruloj kaj mensoguloj ricevis malaprobos de la komunumo. Iom post iom la vilaĝo alkiutimiĝis vivi laŭ la justeco kaj konscienco.

Kiam Markelo vizitis ĉiun domon en la vilaĝo kaj revenis al Zosimo, en la domo de la justulo jam estis la tuta plenaĝa vilaĝanaro. Zosimo kuŝis sur tabula lito, ĉirkaŭita de siaj parencoj. Liaj okuloj estis fermitaj. Li ne suferis, kaj sur liaj lipoj eĉ videblis apenaŭ rimarkebla rideto. Li kvazaŭ ankoraŭfoje diris al ĉiuj: foriro de maljuna homo en ĉirkaŭo de dankemaj infanoj kaj genepoj ne estas tragedio, ĝi estas simple foriro...

Ĉiuj venintaj najbaroj atendis, ke la preskaŭ sankta homo Zosimo en la lastaj momentoj de sia surtera ekzisto eldiros al la samvilaĝanoj ĉiujn saĝajn pensojn, kiuj akumuligis en lia klara kapo dum lia longa vivo. Inter ili nur li havis kaj legis sanktajn librojn, pensis ĉiutage pri ili. Kelkajn fragmentojn el tiuj libroj la vilaĝanoj povis, post multaj ripetoj de Zosimo, diri laŭmemore: *“Ne avaru, ne avidu kaj ne envidu”, “Ne tuŝu fremdan havaĵon”, “Hastu fari bonon”, “Kuru for de stulteco”, “Ĉio en la mondo ne estas nia, ĉio apartenas al nia Patro Kosmo”, “Nia Patro ĉion vidas kaj ĉion scias pri ĉiu el ni”, “Faru nenian malbonon al la homo, besto, birdo, vermo kaj planto”, “Ĉio ĉirkaŭe estas Dio, Dio estas en vi kaj ekster vi”...*

Neatendite Zosimo malfermis siajn okulojn, rigarde vokis al si Markelon kaj ion mallaŭte diris al li. Poste li denove fermis la okulojn kaj eligis sian lastan elspiron.

Inter la ĉeestantoj aŭdiĝis mallaŭta murmuro.

- Markelo, kion li diris? Ĉu en kelkaj vortoj estas lia tuta vivo?
- Li diris tion, kion mi atendis, – respondis Markelo. – Li diris: “Homoj, ne enlasu katon en vian kabanon”. Jes, en tiuj vortoj estas lia tuta vivo...
- Ho-o, kiel do? Kiu kato, kiu kabano? Markelo, vi estis la plej proksima al li. Eble vi ion en tio komprenas?
- Kiu kato, kiu kabano... – diris Markelo. – Donu, Dio, memoron... Vi, genajbaroj, sidiĝu, la rakonto estos longa.

Ĉiuj sidiĝis, kie estis eble. En la mezo sidiĝis Markelo kaj ekparolis:

- Vi vidas, ke mi estas maljuna. Zosimo estis ankoraŭ pli aĝa. Kiel li komencis, mi ne povas memori. Kiam mi estis ankoraŭ knabo, li estis juna viro jam ŝatata en la vilaĝo kiel homo proksima al Dio. Nu, vi komprenas, li estis tia homo ĝis sia lasta spiro.

La plej aĝaj el vi eble memoras lian kabanon. Nun de ĝi restas nur malgranda monteto ekster la vilaĝo. La kabano, konstruita el tavoloj de turfo, estis la plej modesta el ĉiuj vilaĝaj dometoj. Ĝuste tiel devas esti. Dia homo devas esti modesta en siaj deziroj. Sed... la plej saĝa el ĉiuj. Tia estis Zosimo ankoraŭ junaĝe. Homoj venadis al li kun siaj disputoj, problemoj, petoj,

sed li petis de la homoj nenion kaj neniam. Li nur solvis moralajn problemojn de homoj, kuracis ilin per herboj, legis sanktajn librojn, pensis, preĝis.

Sed tutegale unufoje li estis devigita plendi al vilaĝanoj. En lia kabano aperis musoj. Ili manĝacis la kuracajn herbojn, difektis la sanktajn librojn, mordis lin mem nokte. Kion fari? La Diaj leĝoj ja diras: *“Faru nenian malbonon al homo, al besto, al...”* k. t. p. Musoj estas animaloj, parteto de la Kosmo. Ni, homoj, ne rajtas fari malbonon al ili. Sed ili malhelpas vivi... Vilaĝanoj diris: *“Ne estas bone, ke Dia homo suferas pro la aĉaj estaĵoj. Ni donos al vi bonan katon, kaj ĝi elkaptos ilin”*.

Dirite – farite. La kato estis fortika kaj agresema. Baldaŭ en la kabano restis neniu muso. Bone. Sed la kato havis bonan sanon kaj bonan apetiton, sen musoj ĝi estis malsata. Pri tio ĝi memorigis per laŭtaj krioj. La vilaĝanoj, kiuj venadis al Zosimo, vidis, ke la kato ne permesas al li normale vivi. *“Venu al ni, – ili diris, – kaj ni ĉiutage donos lakton por via katego”*.

Zosimo ĉiutage alportis lakton, la kato trankviliĝis. Sed la vilaĝanoj komprenis, ke ne indas al la Dia homo iri ĉiutage en la vilaĝon por lakto. *“Ni donos al vi kaprinojn, – ili diris. – Vi ne devos plu ĵeti viajn sanktajn librojn kaj elspezi vian tempon por tia bagatelo: irado por lakto”*.

Sed tutegale, Zosimo estis devigita elspezi sian tempon por la kaprino. Homoj venadis al li solvi problemojn, sed li estis okupata pri melkado. Krome, proksimiĝis la vintro, la kaprino bezonis fojn. La vilaĝanoj cerbumis kaj diris: *“Ni sendos, Zosimo, bonan mastrinojn al vi. Ŝi okupiĝos pri la kaprino, pri la kato, pri la fojno...”*

La veninta mastrino estis juna, laborema, bonkora. Post unu jaro naskiĝis ilia unua infano, poste la dua. La kabano de Zosimo estis tro premanta por kvar homoj. Li devis fosi turfon, alporti el la arbaro kelkajn falintajn arbojn por la tegmento, kaj li pligrandigis la kabanon. Sed tio helpis nelonge. Naskiĝis aliaj infanoj, la kabano denove iĝis malvasta. Kiel loĝi en la kabano kun granda familio? Tion oni imagi ne povas.

Ĉu konstrui grandan lignan domon? Sed kiel oni povas haki arbojn? Ili estas ja vivaj estaĵoj. *“Faru nenian malbonon eĉ al planto.”* Kaj la arbaro *apartenas ne al ni, sed al Patro nia Kosmo*. Mi mem, estante unusola, – pensis Zosimo, – povus kiel ajn longe vivi en kabano, sed tio ne estas bona loĝejo por la edzino kaj por la infanoj. Pardonu, Patro, al mi mian pekon. Mi, kondamninda, devas haki kelkajn dekojn da viaj arboj...”

Kiam Zosimo vivis sole, li manĝis nur terpomojn kaj arbarajn herbojn. Por sia granda familio li devis bredi bovinojn, kaprojn, ŝafojn, kokinojn,



buĉi ilin por havi viandon. Por la brutaro li devis denove haki arbojn kaj ĉarpenti vastan stalon. Krome li lernis kapti fiŝojn, plugi la teron kaj kreskigi tritikon kaj legomojn, baki panon. Por la sanktaj libroj restis malmulte da tempo...

Kaj hieraŭ, antaŭsentante la proksiman finon, li diris al mi:

– Markelo, vi estis apud mi preskaŭ dum mia tuta vivo. Vi scias, ke mi ĉiam strebis esti kun Dio, vivi laŭ Liaj leĝoj kaj alvokis la homojn al tia vivo. Sed vidas Dio, ke mi estis nesufiĉe forta por tiu glorago. Mi dronis en la surteraj zorgoj. Kaj ĉio komenciĝis, kiam mi enlasis katon en mian kabanon...

# Kio estas vero

Kiam mi eniris vagonon kaj trovis neokupitan lokon, apude jam lokiĝis grandaĝa virino kun senesprima vizaĝo, juna viro kun larĝa barbo kaj knabo proksimume dekjara. Ili duonvoĉe interparolis pri io, kaj mi tuj rimarkis, ke ili estas strangaj homoj. Precipe la junulo. Lia ĵinzo estas de iu fama firmao, lia ĉemizo estas verŝajne de Versace, sed la larĝa barbo estis kiel tiu de la ortodoksa popo. La maldikeco de ĉi tiu junulo kondukis al la penso pri longdaŭraj, dum multaj jaroj, ekzercoj de subpremo de la karno. La brilo en liaj okuloj estis viva kaj energi plena, sed kvazaŭ ne de ĉi tiu mondo.

Kiam la trajno ekmoviĝis, la virino demandis la junulon kaj la knabon:

– Ĉu vi manĝos la tagan panon?

La vira parto de ĉi tiu stranga societo rifuzis manĝi la panon. La virino elmetis el sia korbo kukon, kiu ŝajnis dika bovina platbulko laŭ la koloro kaj formo, poste ŝi stariĝis, sin deturninte al angulo longe ion flustris, signante sin per larĝaj krucoj. Post tio ŝiaj dioj verŝajne permesis al ŝi manĝi, kaj ŝi nekuraĝe sidiĝis ĉe la vagona tablo. Rigardi, kiel ŝi manĝas sian bovinan platbulkon, estis sufiĉe enua vidaĵo, kaj mi forturniĝis. Mia rigardo nevole falis al la juna barbulo. Li legis la revuon *Rusa fuĝpopano*<sup>1</sup>. Jes, ni havas nun liberon kaj demokration. Antaŭe ĉi tiu revuo verŝajne estis titolata *Sovetia fuĝpopano*, presata en Usono, kaj liverata en valizoj kun duobla fundo. La demokratio progresas laŭ tiu direkto. Verdire, laŭ aliaj direktoj ĝi ne povas per io laŭdi sin.

Interesa kompanio. Oni ne ĉiutage povas renkonti fuĝpopanojn. Ili

---

1. Fuĝpopanoj (беглопоповцы). Branĉo de la malnovritana rusortodoksa eklezio, kies anoj akceptas la pastrojn ordinitajn en la rusortodoksa eklezio kaj poste forlasintaj ĝin (бегствующее священство = fuĝinta pastraro) kaj aliĝintaj al la malnovritanismo. Malkiel pensas la protagonisto, la fuĝpopanoj havas siajn pastroj kaj preĝejojn.

preĝas al Dio, kvankam ili ne havas pastrojn, kaj verŝajne ankaŭ preĝeojn ili ne havas. Nu, bone, ili preĝu, pli bone estas troviĝi en beataj revoj ol esti plena idioto. Tiuj tri homoj ja ne faris al mi ion malbonan, kaj apenaŭ ili estas kapablaj al io malbona.

Mi ne povas diri, ke mi estas indiferenta al ĉiuj religiuloj. Ne, mi eĉ estimas ilin sendepende de la konfesio.

Mia panjo, baptita judino en la dua generacio, en nia Tizeko frekventis la preĝejon, ĝis kiam iu fervora prezidanto de la vilaĝa soveto fermis ĝin, transforminte ĝin je ŝafejo. Eĉ tieaj germanoj vizitadis la ortodoksan preĝejon, ĉar luterana kirko en Tizeko kompreneble forestis.

Kiam la preĝejo en Tizeko funkciis, multaj vizitis ĝin, ili estis bonkoraj kaj siamaniere belaj homoj. Sed malbonuloj ne venis al ĝi. Estis kelkaj tiaj personoj en la tuta Tizeko, malfeliĉaj homoj, ĉiu siamaniere. Neniu el ili vizitadis la preĝejon. Kaj la Tizekaj kazaĥoj estis mahometanoj. Ili ne havis moskeon, sed ili preĝis al Alaho, kiel konvenis, kaj ĉiuj estis homoj meritaj.

Miajn pripensojn interrompis du novaj pasaĝeroj, kiuj aperis post laŭvica stacio. Eniris malaltkreska rondeta vireto... Ne, netrafa vorto. "Vireto" – tiel oni povus diri pri subpremita duonmalsata rusa viro de la 19a jarcento. Sed ĉi tiu ne aspektis subpremita kaj duonmalsata. Li estis rozvanga, glacea, kaj malgraŭ sia malalta staturo rigardis ĉiujn de supre. Li ĵetis ironian rigardon al miaj piaj kunvojaĝantoj, diris "Nu, bone" kaj sidiĝis sur neokupitan lokon apud mi.

La dua enirinto malpli falis en la okulojn, kvankam li havis altegan staturon. Li havis malsuprenpendantajn manojn, malsuprenpendantajn senkolorajn lipharojn, kaj lia tuta vestaĵo pendis malsupren. Li modeste trovis lokon en angulo, poste vokis la malaltkreskulon:

- Do, kio, Konstantin Lukiĉ, ŝajnas, ke ni trovis bonan lokon?
- Kaj do?... – la homo, nomata Konstantin Lukiĉ, palpebrumis.

El tiu mallonga konversacio mi komprenis, ke tiuj du tre malsamaj kunuloj estas ebrietaj, antaŭ tio ili sidis iom en la stacia bufedejo, interparolis tie kaj nun daŭrigos tion. Bone, bone, iufoje tio estas interesa: vodko helpas al la homoj malfermi la animon.

– Vi, Niĉjo, forĵetu tiun okupon – kuŝi sur la flanko. Ĉu vi opinias, ke oni ne batas kuŝanton? Tiel estis antaŭe. Sed nun tiuj novaj batas ankaŭ la kuŝanton, ho, kiel ili batas! Nu, vi eble mem tion spertis.

– Ho-o, mi spertis. Trafis mi en tian embarason. Ili batas, kion ili volas. Ili ne hezitas, ĉu tio estas viaj hepato, ripoj aŭ kojonoj.

– Ĉion vi komprenas. – La rondeta Konstantin Lukiĉ per nekomprenebla maniero transformis sian sakon je io simila al tableto, starigis botelon kaj unufojajn plastajn glasojn, metis zakuskon. – Vi verŝajne tiun aĵon, – li klakis la botelon, – amas pli ol estas konvene. Kiel unu el miaj nevoj. Havas mi sentaŭgan nevon. Li estas nur 25-jara, sed jam trifoje estis en prizono. Foje li fuĝis el la armeo, aliffoje ŝtelis aŭton, kaj foje batis iun kunulon ĝis duonmorto, tiu post tri tagoj mortis. Kaj tio, komprenu, ne estas murdo. Jen, se li mortus surloke – tio estus murdo, sed ĉi tiel – ili tie havas alian artikolon. Ha, ha. Nu, Dio juĝu lin. – Li haste krucosignis sin per la liva mano, ĉar en la dekstra li havis glason. La fuĝpopanino antipatie forturniĝis.

– ...jen mi, Niĉjo, diras al mia nevo. – Konstantin Lukiĉ daŭrigis, ŝajne, la konversacion, komencitan en la stacio. – Nu, kial vi ĉiam drinkadas kaj vagadas kiel peniso en larĝa pantalono? Vi ja havas la familion, kie estas via prudento? Nu, mi donos al vi kelkan sumon, aĉetu porkidojn, aĉetu nutraĵon, kreskigu ilin, vendu la viandon – ĉio donos profiton eĉ kun superfluo. Ne, vane! Oni ne komprenas, kiel vivi en ĉi mondo. Oni promesis al ili: ni elĵetu komunistojn, kaj ni vivos kiel en Usono. Ha! Al Hitlero ĉiam judoj malhelpis, kaj al ĉi tiuj komunistoj malhelpas. Ne vivos vi kiel en Usono! Oni devas labori!

– Vi, mi vidas, komprenis tion, Konstantin Lukiĉ.

– Ha, mi diris al vi jam en la stacio: Niĉjo, oni devas vivi per sia propra cerbo. Vi malatentis, mi opinias, ke en la nuna aĉa tempo, pro tio estas ĉiuj viaj plagoj. Eble vi pensas, ke mi ion ricevis, kiam oni dispartigis la kukon? Diablon mi ricevis! Jes, mi laboris en la distrikta komitato de komsomolo. Mi pensis tiam, ke mi vidas antaŭen je kvindek jaroj, mi eĉ kompilis por mi mem personan programon: iĝinte pensiulo, mi veturos en mia propra aŭto laŭ la tuta limo de Sovetunio. Sed Sovetunio ne plu ekzistas... Aĉaj kaproj! Kaj poste oni komencis ĉion disrabi. Mi en tiu rabado gajnis nenion, rabadis aĉuloj kun pli longaj brakoj. Mi havis nur difinitan sumon en ŝparkaso. Mi vidis, ke ankaŭ tiu negranda mono post kelkaj tagoj malaperos. Ĉu vi scias, kion mi aĉetis per tiu mono?

– Ne, mi ne scias.

– En la sovĥozo oni tiam vendis nelikviditan metalan reton. Mi aĉetis ĉion, kion ili havis.

– Ba, kion oni povas fari kun ĝi?

– Jen! Tie ĉi komenciĝas laboro per la cerbo! Mi faris el tiu reto barilon kaj aĉetis kokidojn.

– Nu vi, Kosta, estas bravulo! – La alta Niĉjo atingis tian nivelon de la gajeco, kiu permesis al li familiarecon.

La malaltulo faris teruran vizaĝon.

– Ĉit! Tie ĉi ne estas vilaĝo. Mi por vi estas ne Kosta. Mi estas Konstantin Lukiĉ, ĉu vi komprenis?

– Mi komprenis, Konstantin Lukiĉ.

– Nu jen tiel ankaŭ plu. Komprenema vi estas, Niĉjo. Nu, aŭskultu plu. Do, mi aĉetis kokidojn. Tion povos ĉiu stultulo, se li havas ian monon en poŝo. Sed per kio ilin nutri plu? Per kio nutri tiujn kokidojn, estas mia *know-how*<sup>1</sup>.

– Kio-o?

– Mi nutras ilin per blatoj.

– Ba! Kiel estas tio?

La maljunulino kaj la barbulo ekkriis kaj signis sin per larĝaj krucoj.

– Tion mi eĉ sub pafiltubo ne diros al iu. Tio estas mia *know-how*. Ĉu vi scias, kio ĝi estas?

– Precize mi ne scias. En Ĉinio estis io simila dum Maŭ Zedong.

– Prefere silentu, Niĉjo, vi jam babilas stultaĵojn. Mallonge, mi havas ĉi tie kokidojn, kaj la nutraĵo estas preskaŭ senpaga por mi, trovis mi tian nutraĵon. Vidu, Niĉjo, en ĉiu socio, ĉe ajna reĝimo oni devas trovi al kio alkroĉiĝi. Jen... Atendu! La gorĝo estas seka, ni malsekigu. Ek, patrino, flankeniĝu, vi ne unusola veturas, ĉu? Kaj vi, etulo, deiru, onkloj volas sidi ĉe la tablo.

Konstantin transportis la botelon, la glasojn kaj la zakuskon sur la tableton, kaj ambaŭ kunuloj sidiĝis kun plena komforto.

– Kunulo, ĉu vi aliĝos? – Li adredis sin al mi. Mi rifuzis. – Nu, la volo estas via.

Li verŝis duonglason al la alta Niĉjo, poste trinkis mem, ili rapide manĝetis kolbason kuŝantan sur la ĵurnalo sternita sur la tableto.

– Jen, nun mi daŭrigos la konversacion, mi ne perdis la fadenon. Pri kio mi diris al vi? Ha, pri tio, ke en ajna vivo oni devas trovi al kio alkroĉiĝi. Mi estis en la komsomola laboro. Kiel vi opinias, ĉu mi havis por tio iun kleron? Neniun! Simple, mia lango moviĝas kiel balailo. Paroladas mi multe,

---

1. Know-how (Angle: scii kiel). Produktosekreto: la tuto da diversspecaj (produktadaj, teĥnikaj, organizaj k. a.) informoj pri la intelekta agado kaj pri la metodoj de la produktado, kiuj havas realan aŭ latentan komercan valoron.

sed, ha, ha, ne pli, ol estas necese. Mi diris tion, kion oni atendis de mi. Nu tie, en la komsomola laboro. Ha, mi diras: “edukado de la nova generacio en la etoso de la aktiva kaj partia rilato al la vivo”, “inokuli la ideojn de la kolektivismo ekde la plej junaj jaroj”, “ni havas la evoluintan socialismon”, “la ekonomio povas esti ŝparema!” Jen – oni min promociis. Kvankam mi konscias, ke mi estas plena stultulo. Kion diri pri matematiko, fiziko? Kaj miaj infanoj kreskas ne pli bonaj ol mi. Sed tamen mi al vi konkrete deklaras, – li frapis la tablon per la fingro, – ili ricevos superan kleron, kaj ne servos en tiu fiadora armeo. Ĉar mi aĉetos diplomojn por ili kaj elaĉetos ilin el la armeo. Ĉar mi per ĉi tiuj manoj ĉion perlaboris. – Li skuis en la aero siajn pugnetojn. – Sur tiuj manoj ne estas sango, malpuraĵo aŭ ies larmoj. Kiel vi opinias: ĉu tiuj friponoj en Kremlo komprenas tion? Diablon ili komprenas! Ili metis fidon sur ĉubajsoj, nemcovoĵoj, ĵirikoĵoj-mirikoĵoj<sup>1</sup>, sed laborulon ili ne bezonas. Kaj mi ilin cent jarojn ne bezonas! Ha, ha, ha! Mi diras al vi, Niĉĵo, trovu por vi aferon, kaj levu vin. Vi ja nun, diablo prenu, staras sur genuoj, atendas, kiam oni donos al vi ion de sur sinjora tablo. Kiu al vi donos?..

– Mi opinias, ke vi estas prava, Konstantin Lukiĉ. Antaŭnelonge iu el la registaro en televidilo parolis. Li diras, ke ĉio ĉi estas dume ekskremento. Mi estas homo neklerita, mi ne scias, kio estas ekskremento. Sed donu al ni vivi, tiam ja ni vivos?

– Neniu al vi donos ion, neniam vi vivos! Kaj kion signifas vivi? Se vi volas vivi, do laboregu. Ĉu vi opinias, ke tiuj, kiuj vin plenŝtelis, al vi ion alportos? Ha, ha, ha, pretigu sakojn! Ho, Niĉĵo, ne por niaj personoj estas ĉiuj ĉi eksperimentoj. Ĉio ĉi estas por ili mem. Ek, posttrinku vian ĉagrenon.

Li verŝetis al Niĉĵo en glason.

– Mi ja diras al vi: ĉesu fidi al iu. Oni elĵetis vin trans ŝiprandon: se vi volas vivi – do baraktu, se ne – do metu la manojn sur la bruston – kaj al la fundo. Certe, multaj ĝuste tiel agas, sed, Niĉĵo, vi estas ja viro, diablobĵo batu vin! Ne permesu al tiuj fiadoraj kaproj difini vian vivon, mem difinu ĝin. Kio estas por vi tiu Jelĵcin, ne konsideru lin serioze. Ne, mi al vi konkrete diras. Jen rigardu niajn kunvojaĝantojn. Jen diru, patrino, al vi, kiel mi

---

1 ... ĉubajsoj, nemcovoĵoj, ĵirikoĵoj-mirikoĵoj. Temas pri tri Ruslandaj juddevenaj politikistoj, kiuj rapide kariieris en la epoko de Boris Jelĵcin, nome: Anatolij Ĉubajs, Boris Nemcov, Vladimir Ĵirinovskij. Ili estas malŝategataj de la plimulto de la popolo.

komprende, patriarko Nikon<sup>1</sup> ĉion malbonigis? Vi povas ne respondi, mi mem ĉion scias. Ĉu vi vidas, Niĉjo, patriarko Nikon antaŭ pli ol tricent jaroj ĉion al ili malbonigis, kiel nun Jeljcin al ni, kaj ili dum pli ol tricent jaroj jam suferas, ne povas rekonsciigi.

– Viro, elektu la esprimojn! – La grandaĝa virino, silentinta ĝis nun, subite komencis furioze defendi sian kredon. – Vi ja nenion scias el nia historio, do ne aŭdacu ridaĉi!

– Por kio mi bezonus vin! Kaj ne nur mi, vin entute neniu bezonas. Mi al mia kunvojaĝanto nur prezentis ekzemplon, kiel oni povas eviti la vivon. Jen nun la tiel nomataj demokratoj faraĉis ion, sed Niĉjo bezonas vivi! Por kiu diablo li bezonus Jeljcin-on kaj ĉiujn liajn ĉubajsojn? Kion vi, diablo prenu, kaj vi, Niĉjo, kaj vi, sinjorino! Iu al vi ĉion malbonigis! Al iuj Nikon, al aliaj Jeljcin. Sed por kio vi havas la kranion sur viaj ŝultroj?! Kio, vi havas ne sufiĉe da anfraktoj, por preteriri Nikon-on kaj Jeljcin-on? Nu, pri Niĉjo estas kompreneble, li ankoraŭ ne sukcesis konscii. Sed vi, sinjorino, kun Nikon? Ĉu vi dum tricent jaroj ne povis ion konscii?

– Ĉesu, mi petas vin, ĉesu. Vi ja estas homo tute fremda al la religio. Kiu permesis al vi priparoli niajn sanktaĵojn?

– Certe, certe, vi havas neatingeblajn sanktaĵojn. Sed ĉu dum via tuta longa vivo en vian kapon venis la kompreno, ke ĉiuj viaj sanktaĵoj kostas nur kupran groŝon? Jen, klerigu min, analfabeton: de kie la homo aperis sur ĉi tiu peka tero? Kion via kredo pri tio diras?

Li elmetis el poŝo agendon kaj mem respondis:

– Mi nun diros al vi, aŭskultu: “Kaj kreis Dio homon laŭ aspekto kaj similo Sia”<sup>2</sup>. Tio estas la ĉapitro unua, la verso 27a el la Biblio. La similo de Dio, certe, iĝis malsukcesa: oni nur manĝaĉas kaj fekaĉas. Sed kia estis la modelo mem de ĉi tiu similo? Kiel li aspektis? Ĉu blanka, nigra, flava? Kaj kion havis inter la gamboj: guŝon aŭ fendon?

– Ho, de kie estas tiu malfeliĉo? Ĉesu finfine, ĉesu! Ni ja ne devigis vin al konversacio. Vi havas vian vivon, ni – la nian. Nu diru, Vladimir, – ŝi adresis al la barbhava junulo. – Diru al li kiel viro al viro.

---

1. Patriarko Nikon (Никон, 1605-1681). Naskita kiel Nikita Minin, li, kiel Moskva kaj Ruslanda patriarko (1652-66), entreprenis kaj ekrealigis reformadon de la rusortodoksa eklezio, rezulte de kio okazis skismo, dum kiu la tradiciuloj restis ĉe la malnovaj ritoj kaj tradicioj; ili estas konataj kiel malnovritanoj.

2. “Kaj kreis Dio homon laŭ aspekto kaj similo Sia”. Laŭ la Zamenhofa traduko: “Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio Li kreis lin” (*Gen 1:29*).

La malfortika barbhava Vladimir stariĝis kaj, ŝajne, volis ion diri al la malalta Konstantin, sed la trajno jam venis al Emsko, mi devis eliri. Tre do-  
maĝe, interesa kompanio renkontiĝis, mi volonte plu aŭskultus ilin.

Ofte la vivo elvagonigas nin en stacion, kiun ĝi mem difinis, kiam ŝaj-  
nas, ke antaŭe malfermiĝas novaj allogaj horizontoj...


Mi eliris en mia stacio, ankoraŭ ekscitita pro la vagona epizodo. Kiel fin-  
iĝis la interpuŝo de Vladimir kaj Konstantin? Kiu venkis: ĉu la multjarcenta  
kredo aŭ la naskiĝanta ruslanda burĝo?

Sed ju pli mi malproksimiĝis de la stacio, des malpli min interesis, kiu  
tie venkis. Tutegale, tie la vero ne triumfos. La disputon pri la Vero entre-  
prenis ankoraŭ Kristo kaj Pilato dudek jarcentojn antaŭ tiu vagona inter-  
puŝiĝo. Sed ĉu en tiu disputo la vero triumfis? Vi diros: venkis Kristo. Sed  
kial ankaŭ post du mil jaroj la homoj mortigas, ŝtelas, adultas kaj deziras  
azenon de sia najbaro? Ridinde estas pensi, ke la vero triumfos en la vago-  
na kverelo. Mi vidas en ĉi tiu situacio du rezultojn. La unua: la malalta, sed  
bone nutrita Konstantin metos al la malfortika Vladimir kelkajn batbloojn  
sub liaj fajrerantaj okuloj – tio estas la malbona varianto. Aŭ la dua: Kon-  
stantin iom skuos Vladimiron, kaptinte lian ĉemizon, kaj diros: “Ne elpaŝu,  
knabo, sidiĝu jen ĉi tie kaj legu viajn gazetetojn. Aŭ eble mi verŝetu al vi?  
Posttrinku vian ĉagrenon”.

Ambaŭ variantoj ne estas al mi interesaj.



## Pri la aŭtoro



Miĥail Kórotkov (Михаил Гаврилович Коротков) naskiĝis la 5an de majo 1948 en laborista rusa-ukraina familio en la siberia distriktocentra vilaĝo Ródino (Altaja teritorio). Post la lernado en la mezlernejo de Rodino li studis en la Tomska Politekniko kaj ekde 1976 loĝas en la siberia minista urbo Léninsk-Kuznéckij (Kemerova regiono). Edziĝinta, patro de tri infanoj, li ŝatas multon en ĉi tiu mondo: literaturon, lingvojn, filozofion, religiojn, sciencojn, naturon...

Miĥail Korotkov longe serĉis sian lokon en la vivo, li laboris kiel ŝoforo, aŭtoseruristo, inĝeniero en scienca instituto, lingvoinstruisto, tradukisto kaj interpretisto, mineja aŭtomaciisto, konstrukiisto. Ĉi tiuj profesioj donis rimedojn por la vivo, sed neniu el ili iĝis por li la plej ŝatata kaj unusola. Esprimi siajn sentojn kaj pensojn li povis nur en verkado. Estante 30-jara, li komencis publikigi siajn rakontojn, artikolojn, eseojn, sukcese partoprenis en literaturaj konkursoj kaj aperigis multajn verkojn en Sovetunia, Ruslanda kaj alilanda gazetaro.

La estonteco ŝajnis brila, sed komenciĝis la konataj revoluciaj eventoj en la lando. La vivo por la honestaj homoj iĝis pli ol peniga. Por la simpla ekzistado oni devis labori en du-tri lokoj. Sed la ŝanĝo de la socia sistemo kaŭzis ankaŭ rompon de la idearo en la mensoj. Multaj verkistoj subite konstatis, ke verki laŭ la antaŭa maniero ne plu eblas, sed verki nove ili ankoraŭ ne povas... Ankaŭ Korotkov kiel beletristo longe silentis.

En Siberio Miĥail Korotkov estas konata kiel "poligloto, scianta cent lingvojn". Tamen li mem konfesis, ke centon da lingvoj li nur studis, dediĉinte al ĉiu el ili ĉirkaŭ unu monaton, sed aktive li uzas nur la rusan, germanan, anglan, polan, ukrainan kaj Esperanton kaj pasive – la francan, italan, hispanan, nederlandan, jidan, afrikansan, ĉeĥan, slovakon, bulgaran

kaj kelkajn aliajn lingvojn. En la rusa, germana, ukraina kaj Esperanto li verkas. Li ankaŭ tradukas (krom ambaŭdirekte inter la rusa kaj Esperanto) el la hungara, rumana, japana, sveda, litova, persa, taĝika, ĉina, estona.

Post longa paŭzo li revenis al la verkado. Dum la lastaj jaroj en Germanio estis eldonitaj liaj koncizaj lernolibroj de kvar lingvoj: uzbeka, taĝika, kirgiza kaj tatara.

Esperanton Miĥail eklernis en 1979, sed li neniam aktivis movade, preferante legi, traduki kaj verki. Ekde la 1985a jaro liaj originalaj rakontoj ekaperis en la samizdata<sup>1</sup> almanako *Sezonoj*, kaj en 1988 ĉe la samnoma samizdata eldonejo aperis lia 88-paĝa kolekto *Homo, kiu mortigis*, kiu estas la unua sciencfikcia kaj fantasta libro en Esperanto eldonita en Sovetunio/Ruslando.

Ses el la 16 rakontoj de *Homo, kiu mortigis* reaperas en la nuna eldono. Ilin komplementas ok verkoj, intertempe aperintaj en la almanako *Sezonoj* (1) kaj en *La Ondo de Esperanto* (7), kaj kvar diverstempe verkitaj tekstoj, kiuj ĝis nun ne estis publikigitaj.

Ni esperas, ke la duan rakontaron de Miĥail Korotkov la legantaro kaj la kritiko akceptos ne malpli bone ol la unuan.

**Aleksander Korĵenkov**

---

1. Samizdata. Eldonita neleĝe, t. e.: ekstercentzure kaj senimposte.

# Enhavtabelo

Mamutĉasisto.....	4
Ni neniam militis.....	9
Homo, kiu mortigis .....	17
Mi estas vi post unu jaro .....	25
Meteoro .....	29
Kaj aldone – senmortecon.....	34
Sen hejmo, sen familio .....	42
Kaliko amara.....	46
Io devas okazi.....	54
Eksa kosmopiloto .....	63
lom da geheno .....	69
Fiasko de imperio.....	76
Troa tago .....	80
Diman .....	89
Diabla semajnfino.....	95
Vasilio kaj posteuloj.....	100
Kato en la kabano.....	102
Kio estas vero.....	106
Pri la aŭtoro (Aleksander Korĵenkov).....	113

# Virtuala Biblioteko de **Sezonoj**

№1. Aleksandr Puŝkin. *La pika damo.*

Tradukis Aleksander Korĵenkov.

Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 30 paĝoj.

№2. Anton Ĉeĥov. *Sveda alumeto.*

Tradukis Aleksander Korĵenkov.

Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 24 paĝoj.

№3. Edgar Allan Poe. *La falo de la domo Usher.*

Tradukis Edmund Grimley Evans.

Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 24 paĝoj.

№4. Fjodor Dostojevskij. *Blankaj noktoj.*

Tradukis Grigorij Arosev.

Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 48 paĝoj.

№5. Arthur Conan Doyle. *La ĉashundo de la Baskerviloj.*

Tradukis William Auld.

Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 168 paĝoj.

№6. Harrison, Harry. *Naskiĝo de la Rustimuna Ŝtalrato.*

Tradukis Reinhard Fössmeier, Edmund Grimley Evans,  
Rob Helm, Konrad Hinsen, Pierre Jelenc, Jorge Llambías,  
Kevin Schoedel, Mark Weddell.

Kaliningrado: Sezonoj, 2011. 195 paĝoj.

№7. Nikolaj Gogol. *Palto.*

Tradukis Aleksander Korĵenkov.

Kaliningrado: Sezonoj, 2011. 35 paĝoj.

№8. Aleksander Korĵenkov. *Fjodor Dostojevskij en Esperanto.*

Kaliningrado: Sezonoj, 2011. 33 paĝoj.

№9. Charles Dickens. *La postlasitaj paperoj de la Klubo Pikvika.*

Ĉapitroj 1–7.

Tradukis William Auld.

Kaliningrado: Sezonoj, 2012. 121 paĝoj.

№10. Aleksander Korĵenkov.

*Unu Ringo ilin Regas: John Ronald Reuel Tolkien en Esperanto.*

Kaliningrado: Sezonoj, 2012. 22 paĝoj.

№11. Georges Simenon. *Maigret hezitas.*

Tradukis Daniel Luez.

Kaliningrado: Sezonoj, 2012. 142 paĝoj.

№12. Miĥail Lermontov. *Princidino Mary.*

Tradukis Nikolaj Danovskij.

Kaliningrado: Sezonoj, 2014. 86 paĝoj.

№13. L. M. Zamenhof. *Kongresaj paroladoj.*

Kaliningrado: Sezonoj, 2015. 64 paĝoj.

№14. Aleksandr Saĥarov. *Superforta ambicio.*

Kaliningrado: Sezonoj, 2017. 31 paĝoj.

№15. Valerij Brjusov. *Kvar noveloj.*

Tradukis Grigorij Arosev, Aleksander Korĵenkov, Ilsa Novikova.

Kaliningrado: Sezonoj, 2018. 33 paĝoj.

№16. *Orienta Almanako.*

Tradukita el la araba, armena, ĉeĉena, hebrea, hinda, ĥina, japana, kartvela, lezgina, sanskrita kaj tatara lingvoj.

Kaliningrado: Sezonoj, 2018. 80 paĝoj.

№17. *El la rusa poezio.*

Tradukis Valentin Melnikov.

Kaliningrado: Sezonoj, 2019. 90 paĝoj.

№18. Miĥail Korotkov.

*Io devas okazi.*

Kaliningrado: Sezonoj, 2020. 117 paĝoj.

Nia elŝutejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Libro/Libro.php>